

La Notoj Aŭditaj de Doŭgen

正法眼藏隨聞記

tradukita de Niŝi Jasuhiro

la volumo 1-a

Vol. 1-1 (timu la olulon de klarvidantoj)

La majstro Doŭgen montris: Se temas pri timo, timu la okulon de klarvidantoj. Kiam mi estas en Song (=tiam Ĉinio. en la 13 jc), la zenisto Ĵuĝjing (=gvidanto de Doŭgen, la vihar-estro) proponis al mi postenon kiel lian asistanton (=samtempe kiel la ĉefon de lernantaro, kaj sukcedanto de la zenisto), kaj diris "Kvankam vi estas eksterlandano, tamen sufiĉe kompetenta."

Mi malakceptis rezolute.

Ĉar "Kvankam posteni kiel via asistanto estas alta honoro por mia renomo en nia lando kaj oportuna por la lernado de la budhismo, tamen povus elveni kritiko el klarvidantoj en via samgo, dirante, ke nia majstro elektis alilandanon kiel la asistanton de tiu ĉi granda viharo (=budhisma templo), kvazaŭ ne troviĝus kompetentuloj en tiu ĉi granda lando. Ilia kritiko mi timas (por vi)." Tion mi prezentis al la zenisto per skribaĵo. La zenisto pardonis min malakcepti la proponon pripensante la dignecon de la granda lando kaj mian cedemon, kaj ne plu ĝin proponis.

Vol. 1-2 ("Mi estas malsanema kaj ne bonkvalita")

La majstro montris: Iu diris "Mi estas malsanema kaj ne bonkvalita (je naturo), ne povos elteni la severan lernadon. Pro tio, aŭdinte la kernon de la instruo, mi volas ermitiĝi kun la malsanetoj ĝis la morto."

La majstro daŭre montris: Iamaj zenistoj ne ĉiuj havis fortikan korpon, kaj ne ĉiuj estis bonkvalitaj. Post la morto de Budho pasis ne tiom da tempo (ĉ.1600 jaroj), mi povas imagi, ke eĉ en Lia tempo ne ĉiuj disĉiploj estis saĝaj, kaj troviĝis ne nur bonuloj sed ankaŭ malbonuloj. Foje troviĝis bikuoj (=budhismaj ekzercantoj), kiuj faris nekredeblajn malbon-farojn, aŭ havis tre malaltan kvaliton. Sed tute ne troviĝis tiuj, kiuj ne eklernis, nek sinekzercis pretekste, ke li estas malbone kvalita.

Se vi ne eklernus en la kuranta vivdaŭro, en kiu renaskiĝo vi (lernos) havante bonkvaliton kaj sen-malsanan korpon!? Ignorante la korpon kaj la viv-longon tuj eklerni kaj sinekzerci estas plej grave en la lernado.

Vol. 1-3 (Lernantoj ne avidu pli da vestoj nek manĝaĵoj.)

La majstro montris: Lernantoj ne avidu pli da vestoj nek manĝaĵoj. Ĉiuj homoj nature havas sian porcion dumvivan kaj sian viv-longecon. Eĉ se vi deziras pli da kvanto de manĝaĵoj kaj viv-longon, ne povas akiri. Al budhismaj lernantoj venas ofero-donaco de la kredantoj, kiu estas ne komparebla al tiu de laika almozulo (pro

budha virto). Kaj troviĝas (komuna) provizaĵo de viharo, kiu ne estas akumulo fare de homoj (sed de la budha virto). La 3 manĝaĵoj, t.e. fruktoj de arboj kaj herboj, ekzercaj almozaĵoj kaj ofer-donacoj de kredantoj, estas manĝaĵoj permesataj al budhistoj. La kvar 4 manĝaĵoj perlaboritaj (per sia mano) de terkulturo, komerco, oficado kaj aĵ-farado estas malpermesataj. Tiujn kvar manĝaĵojn vi ne prenu.

Iam estis bikuo (=budhisma ekzercanto). Kiam li mortis kaj iris la transan mondon, la subtera reĝo Jama diris “Lia viv-longeco ankoraŭ restas. Li reiru.” Oficisto de la reĝo raportis “Lia viv-longeco restas, sed lia porcio de manĝaĵo jam ne restas.” La reĝo ordonis “Li manĝu la foliojn de lotuso.” Post la reviviĝo la bikuo ne povis manĝi ordinarnajn manĝaĵojn, sed nur lotus-foliojn por teni restantan vivdaŭron.

Por la budhistoj la manĝaĵoj ne elĉerpiĝos pro la merito de la lernado de labudhismo, ĉar restas la favoro de la blanka haro sur la glabero de Budho (=Unu el la simboloj de Budhaj kompatoj) kaj la favoro de la 20 jaroj de Budho¹.

Ambaŭ favoroj neniam elĉerpiĝos por ĉiam. Pro tio la lernantoj ne bezonas avidi vestojn kaj manĝaĵojn, sed devas rektanime lernadi.

Medicinaj studentoj ofte diras “kiam la korpo bone iras, ankaŭ la koro sekvas”. Se tio pravas, la lernantoj ordigu la korpon observante la ŝilaron laŭ la maniero de antaŭuloj, sekve de tio la koro ordiĝos.

Lernantoj! Kiam vi ekdiros ion, repensu 3 fojojn, ĉu la dirotaĵo alportos meriton al vi aŭ la aliaj. Kaj se ĝi havas meriton, tiam vi diru, sed se ne, vi devas ne diri.

Subite ŝanĝi ĝisnunan dir-manieron estas malfacile, sed se vi pendigas tion en la koro, iom post iom vi alĉutimiĝos.

Vol. 1-4 (Vi ne timu pri vestoj kaj manĝaĵoj)

Post babilado la majstro montris: Lernantoj! Vi ne timu, ke vi malhavas vestojn kaj manĝaĵojn. Kvankam nia lando estas malgranda kaj situas for de la budhisma centrejoj (=Hindio kaj Ĉinio), mi neniam aŭdis, ke eĉ unu el budhistoj, kiuj historie konataj en budhismoj esotera kaj ekzotera, estis riĉa je vestoj kaj manĝaĵoj. Ili eltenadis la malriĉecon, kaj forlasinte kromajn aferojn rektanime sinekzercis. Pro tio iliaj nomoj altiĝis. Kaj ĉar vi jam forlasis vivtenan laboron, kial vi povas plu esti riĉaj!?

Malgraŭ, ke nun estas la degenera periodo (de budhismo), en la viharoj de la granda lando Song troviĝas tre multe da lernantoj. El la tieaj lernantoj, venintaj de malproksime kaj de ĉirkaŭe, preskaŭ ĉiuj estas malriĉaj. Ili ne timas esti malriĉa, sed timas nur, ke ili mem ankoraŭ ne ver-vekiĝas². Ili zen-sidas en aŭ ekster la domo, kviete kvazaŭ ili funebus la mortintajn gepatrojn.

Mi mem vidis la lernanton el la regiono Ŝu (=fora okcidento en Ĉinio, dume la viharo troviĝas apud orienta maro), kiu jam ne havas propraĵon. Li aĉetis malbonkvalitan paperon per la kelkaj tuĉoj restantaj, kiuj valoras je proksimume 300 monnoj t.e. nialande 30. Kaj li faris de la papero vestojn. Pro tio por stariĝi kaj sidiĝi

¹ Budho mallongigis 20 jarojn de Sia viv-longeco por ĝin donaci al estontaj lernantoj. Li vivis 80 jarojn el la promesita 100. (budhisma mito) –tradukanto

² ver-vekiĝi; Koni darmon, kiel rezulton de zen-sidado.

la vestoj difekte bruis, sed li ignoris kaj ne hontis. Vidinte tion oni admonis “Reniru hejmen kaj kolektu necesajojn.” La lernanto respondis “Mia hejmloko troviĝas tre malproksime. Pro tio sur la vojaĝo mi perdos la tempon por lernado.” Li plue sinekzercis senhezite eĉ en malvarmo. En granda lando inter tiaj lernantoj naskiĝas respektindaj zenistoj!

Kaj mi aŭdis. Kiam oni fondis viharon sur la monto Ŝueŝan, la viharo estis tre malriĉa, kaj la samganoj foje ne manĝis aŭ manĝis fabaĵon (, kiun ordinare oni ne manĝas pro malbona gusto), sed mil 500 da lernantoj ĉiam loĝadis kaj lernadis en la viharo. Tiamaj lernantoj lernadis tiele, ankaŭ nuntempuloj devas sekvi tion.

Ofte riĉaĵo kaŭzas devojiĝon de budhistoj. (Legende oni diras.) La fiero de Devadatta³ kaŭzis, ke li ricevis tage kvincent vetrilojn da oferaĵoj (de la reĝo Aĝatasattu). La riĉaĵo devojigas ne nur la koncernantojn, sed ankaŭ igas aliulojn fari malbonon. Do, esti riĉa estas konvene al la lernanto!? Eĉ se la ofero devenis de ies pieco, sed kiam ĝiaj kvantoj plimultiĝis, la ofer-ricevinto sentas dankŝuldon kaj pensas kiel rekompenci.

En nia lando oni regalas superulon dezirante sian propran estontan profiton, kaj oni afable akceptas tiujn, kiuj vizitas kun rideto. Tio, tamen, estas natura homa konduto. Sed se la lernanto zorgas alies profiton, tio estas obstaklo de la lernado. La lernantoj nur eltenu malsaton kaj malvarmon, kaj rektanime lernadu.

Vol. 1-5 (Malnovulo diris “Aŭdu,vidu.”)

Iun tagon la majstro montris: Malnovulo diris “Aŭdu, vidu.” Kaj plue “Se vine spertis, vidu. Se vi ne vidis, aŭdu.” Plidetale dirite “Estas pli bone vidi ol aŭdi, pli bone sperti ol vidi. Se vi ankoraŭ ne spertis, vidu. Se vi ankoraŭ ne vidis, aŭdu.”

Kaj la majstro montris (pri la alia temo): Por bone kompreni la instruon foriguobsedon en la koro. Se vi plibonigos la fizikan konduton ĉiutagan, ankaŭ la koro sekvos. Unue vi observu la ŝilojn⁴ kaj vinajojn⁵, kaj la koro ŝanĝiĝos. Kiel ĉina moro ĉinoj kune ŝajnigas sin plorantaj antaŭ la tombo por montri la fidelecon al mortintaj gepatroj, dumtempe ili reale esploras. Kiel tio eĉ se komence vi ne havus la voj-koron⁶, sed se vi klopodos direkti la koron al la vojo⁷ kaj daŭrigos la lernadon, iam naskiĝos en vi la aŭtentika voj-koro.

La komencantoj unue lernu la vojon kun kolegoj, sed (tiam) ne necesas al vi scii la detalan manieron de la ekzerco. Ĝi necesas sen-erare, nur kiam vi (izole) sinekzercos inter montoj, aŭ ermitiĝos en urbo. (Sed) vi povas atingi la vojon (=ver-vekiĝon), kiam vi lernas kun kolegoj (kolektive). Nome, kiam vi veturas per ŝipo, vi ne bezonas scii la rapidecon nek direkton, ĉar vi komisiis ĉion al lerta ŝipisto, kaj vi povas atingi

³ Devadatta; Legende li estas kuzo de Budho, kaj ribelanto. Sed la citita anekdoto estas vera? Kredita legendo ne ĉiam estas sama kun la vera historio. -tradukanto

⁴ ŝilo; Memvola disciplino por lerni la budhismon.

⁵ vinajo; Ordonita regulo por lerni la budhismon.

⁶ la voj-koro; Decida koro laŭiri la budhismon.

⁷ la vojo; Metodo kaj ekzerco laŭiri la budhismon.

la alian bordon. (Tiel same) la lernantoj lernu kun kolegoj sub la bonaj gvidantoj foriginte propran opinion, kaj tiam vi jam nomiĝas la voj-iranto.

Lernantoj! Eĉ se vi pensis, ke mi jam ver-vekiĝis, ne ĉesu la lernadon pensante, ke vi jam atingis. La vojo ne havas finon. Post la ver-vekiĝo la vojo ankoraŭ daŭras.

Rememoru la anekdoton, ke Ljangsŭej vizitis la zenisto Baŭĉe.⁸

Vol. 1-6 ("Mi eklernu iam poste".)

La majstro montris: La lernantoj ne pensu "Mi eklernu iam poste." Oni devas eklerni ĝuste hodiaŭ, ĝuste nun, ne perdante la tempon.

Nun, imagu laikon malsaneman. En la pasinta printempo li promesis al mi kaj diris "Mi volas unue resaniĝi, poste eliri el la hejmo, farinte ermitejon apud la viharo, ĉeesti en la regulaj lerno-kunvenoj en la viharo por aŭdi la lernometodon kaj la instruon, kaj observante ŝilojn mi volas pasigi tempon ĝis la viv-fino." Post tio li iom resaniĝis per kelkaj kuracadoj, sed denove malboniĝis. Tiele li senfare pasigis monatojn. En la januaro de tiu ĉi jaro neatendite lia malsano fariĝis grava. Pro la kreskanta doloro li jam ne havis tempon fari ermitejon, kvankam li pretigis lignojn kaj ilaron. Li luis alies ermitejon kaj transloĝiĝis, sed post unu-du monatoj li mortis. La antaŭan vesperon de la morto li akceptis la bodisattan ŝilaron⁹, kaj eknamis¹⁰ je la tri juveroj.

Li povis morti pli bone, ol morti kun konfuzita koro al la familia amo kiel laiko. Tamen, se li povus vivi laŭ sia lastjara plano, nome, foririnte de la familo, loĝante apud la viharo, gvidate de la budhistoj, li povus lernadi almenaŭ unu jaron. Tion mi bedaŭras. Rememorante tiun aferon mi pensas, ke ni ne prokrastigu eklerni budhismon.

Se oni planas, ke li unue resaniĝu kaj poste eklernu, tio signifas, ke li ne havas voj-koron. Ĉar nia korpo estas nur kombinaĵo el la 4 elementoj (=tero, akvo, fajro kaj vento), ne ĉiuj homoj estas sanaj. Estas certe, ke ne ĉiuj antaŭuloj havis fortikan korpon. Ili sinekzercis pro elkora ambicio forgesinte aliajn kondiĉojn. Ĝenerale dirite, kiam oni renkontas gravan aferon, li forgesas aliajn malgrandajn aferojn. Vi devas

⁸ Kiam unuan fojon Ljangsŭej vizitis Baŭĉe, Baŭĉe foriris al kampo kun plugilo. Ljangsŭej postkuris lin, sed li ignoris Ljangsŭej-n, kaj li reniris en sian domon, fermis la pordon. Sekvantan tagon Ljangsŭej denove lin vizitis, sed li denove fermis la pordon. Senpacience Ljang- ŝuej frapis la pordon. Baŭĉe demandis "Kiu vi estas?" Kaj kiam Ljangsŭej respondis "Mi estas Ljangsŭej.", tiam li hazarde ver-vekiĝis. Ljangsŭej diris "Majstro! Ne lasu min foriri. Se mi ne sekvus vin, mi vojerarus dum la tuta vivo kaŭze de la budhisma teorio." Poste li fermis sian lernejon, en kiu li instruas budhisman teorion, kaj fariĝis disĉiplo de Baŭĉe. (Pied-noto: "Kiu vi estas?" "Mi estas Ljangsŭej." devas esti "Kio vi estas?" "Mi estas teoriisto." Oni ne povas ver-vekiĝi nur per la teorio. Cetere, ĉu tiu ĉi anekdoto estas konvena al la temo. –tradukanto.)

⁹ bodisattan ŝilaron; baza ŝilaro por komencanto.

¹⁰ nami; formale fariĝi disĉiplo de budhisma adorato.

decidi en vi “Ĉar budhismo estas plej grava, kiun mi finlunu dum la vivo, kaj ne vane pasigu tempon.” Malnova antaŭulo diris “Ne pasigu tempon senfare.”

Foje okazas, ke malglau kuracado, malsano progresas. Kaj kiam doloro pli grandiĝas, oni domaĝas, ke li ne lernis budhismon dum la doloro malgranda.

El tio ni devas pensi, ke ni lernu antaŭ ol la doloro grandiĝos, kaj kiam la doloro grandiĝas, ni lernu antaŭ la morto. Ni imagu diversajn okazojn de malsanoj. Iuj el malsanoj estingiĝus pro kuracado, pligraviĝus spite al kuracado, estingiĝus sen kuracado, aŭ pligraviĝus, se oni ne kuracas. Tion vi komprenas.

Kaj oni ne pensu, ke li eklernu aranĝinte ermitejon kaj devotaĵojn. Malriĉuloj ne ĉirkaŭkuru por aranĝi la devotaĵojn. Dum li atendas tempon fin-aranĝi ilin, ankaŭ la morta tempo proksimiĝas tage post tago, kaj li senfare pasigus la tempon dum la vivdaŭro. Li eklernu kuraĝe, pensante, ke ankaŭ laikoj povas lerni eĉ sen la devotaĵoj, ĉar iasence la devotaĵoj estas akcesoraĵoj de budhismo. La aŭtentika budhismo ne dependas de la devotaĵoj. Se iuokaze li povus havi la devotaĵoj, li havu. Sed li ne bezonas pensi nepre havi, tamen, ne pensu, ke li neniam havu. Se oni ne kuracas sin de malsano atendente la morton, tio estas eksterbudhisma ideo. Ni diras “Ne domaĝu la vivon, ne maldomaĝu la vivon.” Laŭokaze oni povas kuraci malsanon per medikamento aŭ akupunkturo, kio ne baras la lernadon. ‘Unue malsano poste lernado’ estas malĝusta ordo.

Vol. 1-7 (Sur la maro troviĝas la loko nomata ‘la nagaraĝa pordo’)

La majstro montris: Sur la maro troviĝas la loko nomata ‘la nagaraĝa pordo’, kie senĉese ondiĝas. Ĉiuj fiŝoj nepre ŝanĝiĝas al nagaraĝoj, kiam ili trapasis la pordon. Pro tio oni nomis la lokon ‘la nagaraĝa pordo’. En la loko la ondoj ne estas malsamaj kiel en la aliaj lokoj, ankaŭ la akvo estas same sala. Sed pro tiea mirinda forto fiŝoj nepre fariĝas nagaraĝoj, kiam ili trapasis. La skvamoj ne ŝanĝiĝas, la korpo estas sama kiel la antaŭa, sed ili subite fariĝas nagaraĝoj. Vi komprenu, ke la ceremonio por ŝramaniĝo. estas simila al ‘la nagaraĝa pordo’. La loko estas simila al la aliaj ordinaraj, sed kiam ili eniris en la viharon, nepre fariĝas budhismo. Manĝi por nutri korpon kaj vesti por ŝirmi de malvarmo estas same kiel tiuj de laikoj, sed razinte la kapon, portante kaŝajon kaj manĝante laŭregule laiko tuj fariĝas budhismo. Vi ankaŭ ne bezonas serĉi la lokon malproksime por budhiĝi aŭ majstriĝi. La diferenco inter homo kaj budho estas nur, ĉu li eniris en la viharon aŭ ne, same kiel la fiŝo trairas ‘la nagaraĝan pordon’ aŭ ne.

Daŭre la majstro montris: Oni diris “Mi vendas oron, sed neniuj aĉetas” La vojo de la budhismo estas simila al la or-vendado. Ni ne ŝparas montri la vojon (=instruon), ĉiam ni povas disdoni, sed oni ne ricevas. Por scii la vojon ne rilatas al la natura kvalito, ĉu alta aŭ ne. Ĉiuj senescepte povas kompreni la vojon. Nur la diferenco, kompreni frue aŭ malfrue, dependas de lia diligenteco, nome, ĉu li havas fortan esperon aŭ ne. Por kompreni la vojon necesas scii la malkonstantecon (de la mondo). Ĉiuj mortas momente post momento, neniam haltas. Kiam vi vivas, ne vane pasigu la tempon.

Oni diras “Rato malsatas en grenejo, bovo, kiu kulturas riz-kampon, estas ĉiam malkontenta je herboj.” Nome, malgraŭ, ke la rato kaj bovo estas ĉirkaŭataj de

manĝaĵo, ĉiam malsatas. Homoj estas samaj, loĝante en budhismo, ili ne vivas laŭ budhismo. Se oni ne povas ĉesigi la koron avidi¹¹, ili ne povos feliĉe vivi ĝis la fino.

La ago de eminentuloj ĉiam havas signifon, eĉ se tio ŝajnas al ni bona aŭ malbona. Iam antaŭe la budhisto Eŝin (japano) ordonis al iu bati kaj forpeli cervon, kiu estis manĝanta herbojn sur la vihara korto. Tiam oni diris “Nia majstro eble ne havus kompaton. Ŝparante herbojn li persekutis la cervon.” Eŝin klarigis “Se mi ne batis, la cervo intimiĝos al homo. Kaj kiam la cervo alproksimiĝas sence al malbonulo, ĝi estus mortigita. Timante tion mi ĝin forpelis.” Tiu anekdoto rakontas, ke bati cervon aspektas ŝajne senkompata, tamen, en lia koro superfluas kompatato.

Vol. 1-8 (Kiam oni demandis vin pri la instruo)

Iun tagon la majstro montris: Kiam oni demandis vin pri la instruo aŭ lernometodo, vi devas respondi en la unuagrada teorio. Sed vi devas ne respondi en la duagrada aŭ provizora, supozante, ke laikoj kaj komencantoj ne povus kompreni. En la bodisatta ŝilaro estas skribite, ke eĉ se la kredanto de hinajano demandis pri hinajana instruo, vi devas respondi en mahajana instruo. Malgraŭ, ke ĉiuj sutroj estas Budhaj instruoj, la duagrada ne havas meriton, nur la lasta instruo (=la sutro Darma Floro) de Budho havas la veran meriton.¹²

Pro tio vi devas respondi la veran instruon ne supozante, ĉu la demandanto komprenas aŭ ne. Se en la demandantoj troviĝas veraj virtuloj, ili povas kompreni la instruon per la virto, kaj ŝajnaj virtuloj ankaŭ povus kompreni. Sed vi ne juĝu la demandantojn nur per lia ekstera figuro kaj la virteco.

Iam iu venis al Konfuceo (=ĉina majstro de konfuceanismo) kun peto fariĝi lia disĉiplo. Konfuceo demandis “Pro kio vi volas esti mia disĉiplo?” Li respondis “Mi vidis vin, kiam vi vizitis la palacon. La procesio estis prospera kaj impona. Pro tio mi venis por aniĝi.” Konfuceo venigis al si la ponpan veturilon, formalan veston, oron, arĝenton kaj aliajn multekostaĵojn, kaj donis al li, kaj diris “Vi venis ne pro mi (sed pro la bela parado).”

Plue la majstro Doŭĝen rakontis: Kortegano Jorimiĉi iris al akvo-boliga budo por spekti fajron. Tiea deĵoranto skoldis lin “Kiu vi estas, kiu eniras en la budon de la palaco sen permeso?”. La kortegano forpelita ŝanĝis la veston al la formala. Kaj kiam li reiris al la budo, la deĵoranto forkuris trovinte de malproksime la imponan figuron. Poste, la kortegano riverencis la formalan veston pendigitan sur la muro. Oni demandis lin “Kial?” La kortegano respondis “Oni respektis min ne pro mia virteco, sed pro la vesto.” Respekto de ordinaluloj estas tia ĉi, ankaŭ tutsame, ke oni respektas la literojn de sutroj. (Literoj estas kondukiloj, sed ne la celo de la instruo.)

Malnovulo diris “Kiam la (bonaj) diraĵoj (de reĝo) disvastiĝas en la regno neniuj kontraŭas. Kaj kiam la (bonaj) faroj (de reĝo) diskoniĝas en la regno, neniuj kovas

¹¹ “Eta deziro, ega kontento” estas budhisma tezo.

¹² nur la lasta instruo; Li diras laŭ la sutra klasifiko fare de Ĝĵiji (ĉino). Sed tiu klasifiko nun ne validas science. Nome, la sutro Darma Floro kaj aliaj mahajanaj sutroj ne rekte rilatas al Budho. Oni devas kompreni, ke la mahajano heredas nur la spiriton de Budho. -tradukanto

malamon (=teksto en konfuceanismo), ĉar la reĝo diras la direndajn, faras la farendajn. Tio ĉi estas la plej alta virteco, kaj plej observinda ago (ankaŭ por niaj lernantoj).

En laika mondo oni diras kaj faras laŭ sia bontrovo, mulrfoje ili erarus. Dume, por budhistoj troviĝas klaraj ekzemploj (en biografioj de budhismaj eminentuloj). Tiujn vi devas ne ŝanĝi per via opinio, ĉar tiuj estas diraĵoj kaj faroj hereditaj de la antaŭuloj.

La lernantoj devas foje retrovidi sian konduton, nome, pripensi kiel ordigi sian koron kaj la agojn. Ĉar 'budhisto' signifas Budhan filon, ni devas imiti la konduton de budho. Por la korpo, buŝo kaj koro (=sinteno, parolo kaj kor-pretado) troviĝas etikoj, kiujn ĉiuj budhistoj devas observi, ankaŭ vi devas. Eĉ laikoj diras "Veston surmetu laŭ la tradicio, parolon diru laŭ etiko." (=konfuceanismo). Vi tute ne aldonu viajn arbitrajn opiniojn.

Vol. 1-9 (Inter la nuntempaj lernantoj)

La majstro montris. Inter la nuntempaj lernantoj troviĝas tiuj, kiuj preter-aŭdas la lekcion por lerte respondi serĉante spritan vorton. Entute ili ne havas la volon lerni, sed insistas pri si.

Kiam vi ricevas lekcion, antaŭ ĉio vi forgesu vin, kaj atente aŭskultu la parolon. Poste, sola re-lerninte, se vi trovis ne-logikan parton aŭ dubon, demandu la lekciinton. Kaj se vi konvinkiĝis de lia klarigo, vi obeu al li. Intervenii en la parolon de lekcio indikas, ke li ne aŭdas.

Vol. 1-10 (Kiam regas la imperiestro Tajzong)

La majstro montris. En la dinastio Tang (Ĉinio) kiam regas la imperiestro Tajzong, oni donacis ĉevalon, kiu povas kuri mil riojn. Vidinte la ĉevalon Tajzong ne ĝojis, kaj pensis "Eĉ se mi povas sola kuri mil riojn, se la vasaloj ne povas sekvi min, kion fari." Li petis opinion de lia konsilanto Vejĝeng. Vejĝeng respondis "Jes, vi pravas. Mi samopinias." Pro tio Tajzong resendis la ĉevalon aldonante or-silkan ŝtofon.¹³

Nun mi (=Doŭgen) volas diri. Eĉ imperiestroj ne havigas al si neuzeblan objekton. Des pli, al budhistoj ne necesas aĵoj krom tri vestoj kaj bovlo. Kion faru kolektinte senutilajn aĵojn!? Eĉ en laika mondo persono, kiu strebas al sia unua celo, ne tenas bienon nek feŭdon, sed li rigardas popolon kiel sian najbaron aŭ parencon.

La budhisto Ĝisoŭ testamentis al sia filo "Nur al la vojo vi strebu." Des pli, la lernantoj devas forlasi ĉion ajn aliajn (ne necesajn), kaj rektanime strebi por la vojo. Tiel pretigu la koron.

Vol. 1-11 (Okaze de vid-al-vida gvido)

¹³ Alia historieto restas. Kiam Tajzong aĉetis bonkvalitan ĉevalon el Centra Azio, Vejĝeng deadmonis lin konsultante malnovan ekzemplon. Simila anekdoto jam troviĝis pri la malnova imperiestro Vendi en Han-dinastio. Vendi diris "Mia ordinara promenado kun ĉevalo ne superas tridek riojn, apartaokaze eĉ kvindek riojn. Kien mi sola iru per la mil-ria ĉevalo?" Li resendis la ĉevalon prenante sur sin la ir-reniran vojaĝ-koston.

La majstro montris: Okaze de vid-al-vida gvido vi demandu instruanton pri io ajn plej profunde ĝis la ekstremo, redemandu (de diversaj flankoj), kaj decidu la konkludon . Se vi ne demandas pri la demandenda, kaj ne aŭdas la aŭdenda, tio estas via malprofito.

La instruanto ĉiam atendas demandojn de instruato. Vi ankoraŭ demandu pri eĉ jam sciatajn aferojn plurfoje por klare kompreni. Ankaŭ instruanto devas demandi, ĉu la instruato sufiĉe komprenis aŭ ne.

Vol. 1-12 (La kor-pretigo de la voj-iranto)

La majstro montris: La kor-pretigo de la voj-iranto estas foje alia al tiu de laikoj.

Kiam la forpasinta zenisto Eisai (japano) estis en la viharo Ken'nin-ĵi, okazis tagoj sen manĝaĵo. Iutage oni oferis silkan rulaĵon. La zenisto ĝoje reniris la viharon kunportante ĝin propramane(, ne per la alies mano). Li transdonis ĝin al oficisto kaj diris "Per tiu ĉi vi aranĝu kaĉon por morgaŭ."

Sed oni venis kaj petis la majstron dirante "Io neatendita okazis, al kio necesas 2 aŭ 3 silk-rulaĵoj. Se vi havus, volu doni ĝin al mi." La zenisto tuj reprenis la rulaĵon de la oficisto kaj ĝin donis al la veninto. Konsekvence la oficisto kaj samganoj estis malkontentaj pri la faro de la zenisto.

Poste li mem klarigis. "Certe vi bedaŭris la rulaĵon. Sed mi tiam pensis, ke vi ĉiuj kolektiĝis ĉi tien por lerni budhismon. Do, ne gravas, eĉ se ni malsate mortus por helpi laikon, kiu alfrontas malfacilon. Ke vi helpis laikon per unutaga manĝaĵo, donas al vi pligrandan meriton sur la lernado."

La pensmaniero de la eminenta voj-iranto (klare) montriĝas en tiu ĉi anekdoto.

Vol. 1-13 (Ĉiuj budhoj kaj majstroj origine estis ordinaruloj.)

La majstro montris: Ĉiuj budhoj kaj majstroj origine estis ordinaruloj. Kiam ili estis laikoj, kelkaj el ili okaze farus malbonfaron, havus malbonan koron, estus malsagacaj aŭ malsagaj. Sed ĉar ili eklernis kaj praktikis budhismon sub eminentuloj, ili povis fariĝi budhoj aŭ majstroj.

Ankaŭ nun la homaj kondiĉoj estas samaj. Vi ne bezonas heziti pro via kvalito malsagaca aŭ malsaga. Se vi ne starigos la bodi-koron en la nuna vivo, kiun vivon vi atendas? Se vi ŝatas, nepre povas.

Vol. 1-14 (Oni diras pri reĝa politiko)

La majstro montris. Oni diras pri reĝa regado "Reĝo devas havi marĝenon en la koro por akcepti admonon." Nome, por racia regado la reĝo konsultas lojalajnvasalojn sen ia obstina koro.

Ankaŭ la lernado por la lernanto devas esti sama. Se li estas obstina de sia opinio, la instruado de instruanto ne eniras en la orelon. Se la instruado ne eniras, la lernanto ne povas adopti la spiriton de la instruanto.

Nur kiam vi forigis vian scikonon malsaman al la instruanto, forlasinte laikajn sentojn, forgesinte malsaton kaj malvarmon, sed aŭdas rektanime sen ia malpuraĵo en la koro, tiam la kerno de la instruado eniras en vin. Kaj kiam tiele vi aŭdas, la pensmaniero (de la budhismo) fariĝas klara al vi, kaj viaj duboj (spontane) solviĝos.

Por ver-vekiĝi vi forlasu ĝisnunan konvinkiĝon laikan, kaj rekte sekvu la instruanton. Tiam vi estas vere nomata 'la voj-iranto'. Tio ĉi estas la unua kor-pretado.

la volumo 2-a

Vol. 2-1-1 (En la libro "el la Agoj de Eminentaj Budhistoj 2")

Iun tagon la majstro montris. En la libro <El la Agoj de Eminentaj Budhistoj 2> troviĝas jena anekdoto. En la samgo de iu zenisto troviĝis ekzercanto, kiu havas la ŝariron¹⁴ kaj budhan statueton el oro. Li ĉiam adore prizorgis ambaŭ, riverencis kun incenso eĉ en biblioteko.

Iam la zenisto diris al tiu ekzercanto "La ŝariro kaj la statueto, kiujn vi adoras, iam alportos al vi malbonon." La ekzercanto ne konsentis. La zenisto aldonis "Tiu ĉi estas skolto de Marao¹⁵. Tuj forĵetu!" La ekzercanto turnis sin al pordo kun kolero. La zenisto postkure alvokis "Tuj marfermu la skatolon!" La ekzercanto kun malkontenta mieno malfermis ĝin kaj tie trovis venenan serpenton.

Mi pensas pri tio. Certe budha statuo kaj ŝariro estas heredindaj memoraĵoj, ni devas respekti, sed se oni intencas ver-vekiĝi per ili, tio estas neĝusta metodo. Male tie regas Marao kaj venena serpento. Ĉar en la sutro estas skribite, ke la adorado al budha statuo donas meriton, nome, oni povas ricevi feliĉon, kvazaŭ li ricevus ĝin de la vivanta Budho. Antaŭ ĉio, estas certe, ke pro la adorado al la tri juveloj oni sentas sin feliĉa, nome, estingiĝo de siaj pekoj, ricevo de la budha favoro, estingiĝo de la malbona karmo kaj espero renaskiĝi kiel homo aŭ budho (sed ne insekto aŭ besto). Sed se oni volas ver-vekiĝi nur per la adorado, tio estas malĝusta metodo.

Por estiĝi Budha filo oni devas mem klopodi laŭ la gvido de la instruo. Por tio la valida ekzerco estas nur rektanima zen-sidado, kiun nia viharo gvidas. Tion vi devas kompreni.

Vol. 2-1-2 (Eĉ se vi observas la ŝilaron)

La majstro plue montris: Eĉ se vi observas la ŝilaron, kiel la ĉefan metodon de la ekzercado, sed se vi volas ver-vekiĝi per la ŝilaro, tio ankaŭ estas erara metodo. Ĉar la ŝilaro estas budhista viv-maniero kaj budhisma moro, ni lernas ĝin kiel normon. Observi la ŝilaron estas laŭdinde, sed se vi pensas tion kiel la ĉefan aferon de ekzercado, estas erare.

Sed mi ne diras, ke vi povas ignori la ŝilaron kaj esti senbrida. Konduti laŭ sia plaĉo estas miskompreno, tio ne estas nia vojo. Ni observas ŝilaron nur kiel budhisman normon kaj kiel kutimon de zen-viharo. Mi ne vidis, kiam mi estis en Song tiujn, kiuj sinekzercis nur per la ŝilaro.

Por ver-vekiĝi oni devas nur zen-sidi. Tio ĉi estas la rekta heredo de Budho. Iam oni deadmonis al Gogen (japano), kiu estis disĉiplo de Eisai, recitadi la ŝil-sutron tage kaj nokte en ĉina viharo.

¹⁴ ŝariro; La osterio de Budho. Preskaŭ ĉiuj estas science falsaj. -tradukanto

¹⁵ Marao; Diabro, kiu baras la vojon de budhismo.

Tiam mi (=Ejōū) demandis: Estas certe, ke ni devas observi la precepton de la zenisto Bajĝang (ĉino). Kaj en la precepto estas skribite, ke unue la lernantoj devas akcepti kaj observi la ŝilaron. Kaj nun ni ordonas la tradician fundamentan ŝilaron al novuloj. Ankaŭ en nia viharo ni ordonas vid-al-vid la ŝilaron, kiu devenas de Hindio, t.e. la bodisattan ŝilaron. Kaj en la ŝil-sutro troviĝas la teksto 'Recitu ĝin tage kaj nokte'. Sed Vi (=Doŭgen) diris, ke oni deadmonis reciti ĝin al Gogen, kial?

La majstro respondis. "Vi pravas. La lernantoj devas nepre observi la precepton de Bajĝang. Sed en la sutro troviĝas ankaŭ, ke la observindaj estas ŝilaro kaj zen-sido. 'Reciti la ŝil-sutron tage kaj nokte, kaj observi ŝilaron' signifas, ke oni devas zen-sidi kiel la viv-maniero de malnovuloj. Kiam oni zen-sidas, kiuj ŝiloj estas malobservataj, kiuj budhaj favoroj ne venas? La manieroj de malnovuloj certe havas profundan signifon. Sen sia arbitra kontento oni devas sin-ekzerci kun la samganoj laŭ la maniero de la malnovuloj.

Vol. 2-2 (Se oni naskiĝis en ia profesia hejmo)

Iun tagon la majstro montris: Se oni naskiĝis en ia profesia hejmo, kaj volas lerni la profesion, li devas lerni la hejman profesion. Li devas scii, ke estas erare lerni ne sian profesion kaj lerni ne sian labor-kampon.

Ĉar vi eliris el la hejmo, eniris en budhan domon, vi devas lerni budhisman laboron. Por tio necesas al vi la kor-pretado, ke vi devas forigi ĝisnunan laikan pens-manieron, kaj sekvi eminentan gvidanton. Pli konkrete diri, estas necese forigi deziremon. Por forigi la deziremon vi devas forigi vin mem. Por forigi vin mem vi devas scii, ke la mondo estas malkonstanta.

Multaj ordinaruloj pensas 'Mi volas esti laŭdata', sed tiu penso ne kondukos vin esti laŭdata. Iom post iom forigu la memon kaj sekvu eminentulon, kaj tio altigos vin. Se dirante "Mi komprenis la gvidon, sed ne povas ŝanĝi mian kutimon." vi daŭrigus vian sintenon, tio malaltigos vin.

Por altigi vin la unua rimedo estas zen-sidado. Por la zen-sido ne necesas pensi kvaliton de vi, ĉu sagaca aŭ ne, saĝa aŭ ne. Ignorante ilin se vi zen-sidados, tiam vi altiĝos.

Vol. 2-3 (Oni ne povas vaste lerni kaj samtempe profunde studi.)

La majstro montris. Oni ne povas vaste lerni kaj samtempe profunde studi. Vi devas senhezite ĉesi vaste lerni. Estas rekomendinde sinekzerci nur en unu metodo lerninte la kor-pretadon kaj sid-manieron. studu ankaŭ la agojn de malnovaj antaŭuloj. Kaj rektanime sinekzercu, sed ne afektu vin esti gvidanto aŭ superulo.

Vol. 2-4-1 (Kio signifas tio)

Iam mi (=Ejōū) demandis la majstron; Kio signifas tio, ke 'La principo de kaŭzo kaj rezulto ne estas malklara'?

La majstro respondis; "La principo ne estas ŝanĝebla."

Mi; "(Se la principo estas tiel fortika), ĉu ni ne povas elkateniĝi el ĝi?"

La majstro; "La kaŭzo kaj rezulto aperas klare kaj samtempe."

Mi; "(Se samtempe aperas la rezulto) Kiel naskiĝas la rezulto?"

La majstro; “Rezulto tuj naskiĝas. Ekzemple mi parolu, pri la afero de la zenisto Nan-ĉjŭan, kiu fortranĉis katon. La samganoj ne povis respondi, kaj la zenisto fortranĉis katon¹⁶. Poste la zenisto Ĝaŭĝoŭ surportis sandalon sur la kapo. Ankaŭ tio estas admirinda konduto.”

La majstro Doŭgen daŭre parolis: Se mi estus la zenisto Nanĉjŭan, mi dirus. “Eĉ se vi povas pledi por la kato, mi tranĉos ĝin, kaj eĉ se vi ne povas, mi tranĉos ĝin. Kiuj kverelis pri la kato? Kiuj volas savi ĝin?”

Anstataŭ la samganoj mi respondus “Jam neniuj pledis. Volu tranĉi la katon.” kaj plue “Nia majstro nur scias duonigon, sed ne unuonigon.¹⁷”

Mi (=Ejoŭ) demandis “Kiel fari la unuonigon?”

La majstro respondis. Se la samganoj plue ne respondas, la zenisto diru “Tio, ke vi nenion diras, estas silenta diraĵo (de la vojo)” Kaj li povas liberigi la katon.

Malnovaj eminentuloj diris “Kiam la granda forto (de darmo) aperas, ne troviĝas anticipe reguligita procedo.” Tiu ĉi ‘tranĉi katon’ estas la prezento de la granda forto (de darmo) kaj estas unu el la turnigaj vortoj*.

Se la la turniga vorto ne troviĝas, ver-vekiĝintoj ne povas diri, ke la natura fenomeno antaŭokula neatendite ŝanĝiĝas al kristale pura kaj hela pejzaĝo. Kaj same ili ne povas diri ‘budho en la homa koro’. Nome, ĉi-okaze oni devis vidi la katon kiel budhan (=darman) korpon. Kaj la samganoj ĉeestantaj devis tuj ver-vekiĝi. “Tiu ĉi ‘tranĉi katon’ estas unu el la esprimoj de Budha (=darma) instruo.” diris la majstro.

Mi (=Ejoŭ) demandis “Kiel ni nomu tion?” La majstro respondis “Nomu ‘tranĉi katon’.”

Mi; “Ĉu tio estas peka aspekto?” La majstro; “Jes, ĝi estas peka aspekto.”

Mi; “Ĉu oni ne povas forigi la pekan aspekton (de tiu ĉi turniga vorto)?” La majstro; “Budha instruo kaj peka aspekto estas malsamaj aferoj, sed ĉi-okaze ambaŭ aperas (bedaŭlinde) samtempe.”

Mi; “Ĉu tiu ĉi okazo apartenas al tiel nomataj elkatnigaj ŝancoj?” La majstro; “Jes, vi pravas. ---tamen, tia rimedo (mortigi katon por ver-vekigi) ne estas ŝatinda, eĉ se tio estis bona ŝanco”.

Vol. 2-4-2 (Ĉu ni povas nomi la pekon ‘ignori ŝilon’)

Mi (=Ejoŭ) demandis: “Ĉu ni povas nomi la pekon ‘ignori ŝilon’, antaŭ ol oni akceptas ŝilon, same kiel post la ŝil-akcepto?” La majstro respondis “Diru ‘ignori ŝilon’ nur post la ŝil-akcepto. Peko, antaŭ ol li akceptas la ŝilon, estas simple kulpo. Ĝi ne estas ‘ignori ŝilon’.”

¹⁶ Nanĉjŭan fortranĉis katon; Iam la zenisto trovis, ke la samganoj disputas en du partioj pri kato (, kiu envenis en la viharon). La zenisto kaptis la katon kaj diris “Kiu povas pledi por la kato? Se iu povas pledi por ĝi eĉ unu vorton, mi liberigos ĝin. Sed se ne, mi ĝin fortranĉos.” Sed ĉar neniuj respondis, la zenisto fortranĉis la katon. Post kiam lia sukcedonto Ĝaŭĝoŭ venis de ekstere, la zenisto rakontis la aferon al li en sia ĉambro. Ĝaŭĝoŭ senforte eliris portante sandalon sur la kapon. La majstro murmuris “Se vi estus tie, mi ne bezonis tranĉi la katon.”

¹⁷ unuonigo; Ne duonigi, sed savi la vivon de la kato. -tradukanto

Mi; “En la teksto ‘la kvardek ok malpezaj ŝiloj’ oni skribis ‘li pekis’ antaŭ la ŝil-ceremonio. Kiel vi opinias?” La majstro; “Ne tiel. Kiam ni ordonas ŝilaron, oni konfesas ĝisnunajn pekojn. Sur tio ni ordonas al li la dek ŝilojn. La pekojn antaŭ la ŝil-ceremonio ni ne diras ‘ignori ŝilon’.

Mi; “En la sutro estas skribite, ke oni instrue legigu la 10 pezajn ŝilojn kaj la 48 malpezajn ŝilojn al ŝil-akceptonto por la konfeso en la ŝil-ceremonio. Sed aliloke troviĝas, ke oni ne klarigu ŝilojn al laikoj. Kial troviĝas la diferenco en la du tekstoj?” La majstro “Akcepti ŝilojn kaj legi ŝilojn estas malsamaj aferoj. Ĉar legi ŝilojn estas por la ceremonio, klarigi ŝilojn al ŝil-akceptontoj ne estas peko. Al la dua teksto aldoniĝas ‘por sia profito’. Ni malpermesas scii ŝilojn por sia profito.”

Mi legis ‘En la ŝil-ceremonio la akceptonto devas konfesi ankaŭ la 7 perfidojn.¹⁸ Kiel vi pensas?” La majstro respondis “Fakte li devas konfesi. Estas skribite en la ŝil-sutro ‘Ne ordonu ŝilaron al la perfidulo’, tio signifas, ke portempe ni detenas lin eniri en samgon dezirante lian seriozan pentadon. Kaj laŭtekste, eĉ ŝil-ignorinto povas akcepti ŝilaron, se li pente konfesis, kaj fariĝis senpeka. Li ne estas sama kiel laiko, kiu ankoraŭ ne akceptas ŝilaron.

Mi “Ĉu la perfidulo estas permesita akcepti ŝilaron, se li konfesis?” La majstro “Jes tiel. Tiun precepton starigis la zenisto Eisai mem. Se oni jam permesis konfesi, ankaŭ povas ordoni ŝilaron al perfidulo, se li pentis kaj volas akcepti ŝilaron, tiam oni povas ordoni ŝilaron. Des pli, budhisto devas ordoni ŝilaron al li, eĉ se la ordoninto mem poste ricevis punon pro la ordono.

Vol. 2-5 (Ne riproĉu budhiston.)

En vespera lekcio la majstro montris: Ne kalumniu, riproĉu budhiston. Eĉ se lia konduto estis maldeca, senkonsidere ne insultu. Eĉ se kiom ajn li estas malbona, se kolektiĝas pli ol kvar, budhistoj konsistas samgon t.e. ‘landa trezoro’ plej respektinda. Eĉ se vi estus vihar-estro, gvidanto aŭ eminentulo, vi devas eduki kaj konduki lin kun kompato kaj patrina koro. Se necese bati, batu, aŭ necese riproĉi, riproĉu, sed vi ne malamu lin.

Iam mi estis en la samgo de la zenisto Ĵuĝjing. La zenisto batis per la sandalo dormantan zen-sidanton kaj forte skoldis, sed ĉiuj sidantoj dankis kun ĝojo kaj admiris la zeniston.

Post la lekcio la zenisto ĉiam parolis “Mi jam maljuniĝis. Mi volas ekŝigi kaj ermitiĝi, sed ankoraŭ laboras kiel vihar-estro, ĉar kiel via antaŭulo mi devas savi vin de deĵiĝo kaj montri la ĝustan vojon. Por gvidi vin mi foje riproĉas kaj frapas per banbua vergo. Tio estas tro aroganta, mi scias, sed mi devas eduki vin anstataŭ budho. Fratuloj! Volu pardoni min en la nomo de budha kompato.” Por la parolo ĉiuj lernantoj dankis kun larmoj.

En tia koro la zenisto povis gvidi lernantojn kaj disvastigi budhismon. Nur ĉar vi estus vihar-estro, vi devas ne regi arbitre subulojn, nek riproĉi kvazaŭ sian propraĵon.

¹⁸ La 7 perfidoj; 1/ eligi sangon de budho 2/ mortigi patron 3/ mortigi patrino 4/ mortigi budhiston 5/ mortigi gvidanton 6/ mortigi ŝilordoninton 7/ mortigi sanktulon.

Des pli, sen la posteno oni devas ne ordoni aŭ riproĉi aliulojn. Tio estas malpermesita. Vi estu sufiĉe atentemaj pri tio.

Kiam vi trovis alies malbonfaron, kaj volas deadmoni lin en kompatato, por ne kolerigi vi alparolu ne rekte sed kvazaŭ alia rakonto.

Vol. 2-6 (Iam estis ŝoguno MINAMOTO Joritomo.)

Daŭre la majstro montris: Iam estis ŝoguno MINAMOTO Joritomo. Kiam li estis suboficiero, ĉeestis en festeno kiel gardanto de iu konsilanto. Tie troviĝis maldeca persono. La konsilanto ordonis al Joritomo aresti la personon. Joritomo respondis "Volu ordoni ne al mi, sed al Rokuhara (=ŝtata policejo fare de la familio TAIRA =tiam potenca klano), ĉar la persono apartenas al la familio TAIRA." La konsilanto diris "Ĉar vi estas ĉi tie." Joritomo respondis "Mi ne rajtas (regi la familianon de TAIRA)".

La respondo de Joritomo estas bela. En tia kor-pretado poste li fondis la (unuan) feŭdisman registaron. Ankaŭ nuntempaj lernantoj lernu lian sintenon. Senrajte ni devas ne kritiki aliulojn.

Vol. 2-7-1 (Iam estis la generalo Ĝongljan)

La majstro montris en vespera lekcio: Iam estis la generalo Ĝongljan en la regno Lu (ĉinio). Ĉar li konkeris malamikojn, la princo Pingjuan proponis doni al li multajn trezorojn kiel honorarion. Sed Ĝongljan malakceptis dirante "Kiel generalo mi nur militiris, sed ne atendas kroman honorarion." Tio estas konata afero kiel 'la honesteco de Ĝongljan'¹⁹.

Eĉ inter laikoj saĝulo aplombe faras sian laboron estante profesiulo en siakampo, sed ne deziras kroman honorarion. La lernantoj estu samaj. Enirinte en budhismon ni laboras por budhismo, ne deziru ion profitan por la laboro. En budhismo kaj aliaj instruoj, ĉiuj rekomendas ne atendi profiton. Mi (=Ejoŭ) notis ĉi tie nur skizon de la lekcio.

Vol. 2-7-2 (Kiam vi parolas laŭrezzone)

Post la lekcio la majstro montris: Kiam vi parolas laŭrezzone, sed oni kontraŭas per kurbigita logiko. Tiukaze venki lin per teoria argumento estas ne rekomendinde. Kaj eĉ se via rezono estas prava, sed se vi retiras dirante "Mi eraris", ankaŭ ne estas rekomendinde.

Plej bone estas lasi senfare, ne spite al li, nek retirante vin. Ŝajnigu vin ne aŭdinta kaj forgesu, ankaŭ li forgesos kaj ne plu koleros. Vi estu singarda.

Vol. 2-8 (Ĉio rapide ŝanĝiĝas, grava estas ĉiutaga vivo.)

¹⁹ La interpretisto prezentas la historieton el alia formo. Sed la celo estas sama; Ĝongljan ne akceptis honorarion dirante "Tiel nomata honora sinjoro estas respektata, ĉar li forigas malfacilon kaj solvas problemon por plebo, sed ne ricevas honorarion. Se mi ricevos, tio fariĝos nur komerca negoco." -tradukanto

La majstro montris: Ĉio rapide ŝanĝiĝas, grava estas ĉiutaga vivo. Dum la mallonga vivdaŭro de homo, se oni volas fari ion kaj ŝatas lerni, li lernu budhan instruon kaj sinekzercu en la budha vojo. Literaturo, poemo, kanto kaj aliaj estas, post ĉio, sensignifaj. Tiun kialon jam ne estas necese menci.

Por lerni budhismon vi devas ne alpreni diversajn rimedojn. Des pli, teoriajn instruojn en sutroj esoteraj kaj ekzoteraj vi ne bezonas lerni. Eĉ budhaj vortoj ne ĉiuj estas necesaj. (=Por ver-vekiĝi per zen-sidado ne necesas scikono - tradukanto.)

Por ni, kiuj naskiĝis kun malalta kapablo, estas malfacile lerni eĉ unu solan rimedon. Des pli, ĉu lerninte multajn rimedojn ni povas kvietigi kaj ordigi la koron? Tute ne.

Vol. 2-9 (Iam estis la zenisto Ĝijjue)

La majstro montris: Iam estis la zenisto Ĝijjue (ĉino). Mi rakontu pri lia eliro kaj starigo de la bodi-koro. Li unue estis ŝtat-oficisto. Kaj li estis bonhava, honesta kaj saĝa. Kiam li estis provinca oficisto, li ŝtelis ofican monon kaj donis ĝin al malriĉaj homoj. Lia kolego raportis tion al reĝo. La reĝo estis ege surprizita kaj suspektis lin pri la kialo, ankaŭ ĉiuj korteganoj suspektis. La kulpo ne estas malpeza, oni decidis lin ekzekuti.

La reĝo diris "Tiu ĉi oficisto estas virtulo, eble li intence kulpis. Li devus havi ian kaŝitan celon. Se ŝajne malĝoja ĉe la ekzekutejo, tuj ekzekutu, sed se ne, ne ekzekutu." Kiam oni kondukis la kondamniton al ekzekutejo, li tute ne aspektas malĝoja, male li ĝojas morti, kaj diris "Mi oferos mian ĉifojan vivon al ĉiuj vivaĵoj." Oni tuj sciigis tion al la reĝo. La reĝo diris "Devas esti. Certe li havas ian celon. Tion mi antaŭvidis." Kaj la reĝo demandis la kialon. Ĝijjue respondis "Mi volas ekŝiĝi de la ofico, kaj morti. Kaj pere de la mort-ofero mi volas kunligi min kun la tuta vivaĵo. Kaj en la venonta fojo mi volas renaskiĝi en budhan domon por rektanime sinekzerci en la budha vojo."

La reĝo kortuŝiĝis de lia diro, kaj permesis fariĝi budhisto doninte al li novan nomon Janŝou (=etendita vivo), ĉar lia vivdaŭro longiĝis savite de la ekzekuto.

Ankaŭ nuntempaj budhistoj devas starigi la bodi-koron kiel Ĝijjue. Pensu la vivon malpeza, kompatu ĉiujn vivaĵojn, kaj vivu laŭ la budha vojo. Se vi jam starigis

la bodi-koron, vi devas plu ĝin teni kaj ne forgesu. Kaj se vi ne povas decidi la koron, vi ne povos ver-vekiĝi.

Vol. 2-10 (Por kompreni la lecion de gvidanto)

La majstro montris en vespero: Por kompreni la lecion de gvidanto forigu vian scikonon ĝisnunan. Vi ŝanĝu vian vidpunkton iom post iom al kutimiĝante al la instruo de la gvidanto. Ekzemple. Vi scias, ke Budho kaj Amitabo havas specialan figuron; disradias lumon el la korpo, predikas darmon, kaj degnas doni favoron al ni. Sed se gvidanto diris, ke bufo kaj tervermo estas budhoj, vi kredu tiujn budhoj, kaj forigu ĝisnunan scion. Sed se vi serĉas sur tiuj la budhan figuron, tio signifas, ke vi ankoraŭ ne ŝanĝas la vidpunkton. Vi nur sciu, ke nun vidata korpo estas budho. Se tiu metode vi plu ŝanĝos la scion, vi povos spontane renkonti la mondon, kiun gvidanto montras.

Tamen, nuntempaj lernantoj insistas pri sia opinio, ke budho devas esti tia, kia li imagas. Kiam la figuro de budho estas malsama al lia imago, li pensas ĝin malvera. Spite al gvidanto, se vi vagas serĉi budhan figuron, kiu koincidas kun via imago, vi ne progresos en budhismo.

Kaj kiam gvidanto ordonis “Antaŭen unu paŝon de sur la stango je cent ŝakuoj²⁰ alta.”, lernanto ne obeas al la gvidanto dirante “Nur vivante oni povas lerni budhismon.”. Ĉu Vi komprenasi, kion mi diras?

Vol. 2-11 (lerni diversajn aferojn sed neniun mastri.)

La majstro montris en vespera lekcio: Estas preferinde, ke lerni unu solan aferon kaj mastri ĝin ĝis la grado elmontri antaŭ alies okuloj, ol tio, ke lerni diversajn aferojn sed neniun mastri. Ĉar budhismo, kiu superas homan mondon, ne estas lernata en la ĉiutaga vivo de antaŭe. Pro tio ankoraŭ nun oni ne povas klare kompreni. Kaj ĉar al ni mankas kapablo, kaj ĉar budhismo estas alta kaj larĝa, estas malfacile finlerni eĉ per unu metodo, des malpli, se ni lernus ĝin per diversaj rimedoj. Kaj ĉar ni estas nature malbon-kvalitaj, estas malfacile finlerni en la kuranta vivo, eĉ se ni strebos per unu sola metodo. Pro tio lernantoj devas lerni per nur unu metodo.

Mi (=Ejoŭ) demandis. Se tiel okazas, kiun ni preferu el la diversaj rimedoj?

La majstro montris. Kvankam oni eklernas laŭ sia motivo kaj laŭ la kapablo, tradicie lernita de ĉiuj majstroj estas zen-sido. Tiu ĉi metodo taŭgas al ĉiuj motivoj kaj al ĉiuj denaskaj kvalitoj.

Post kiam mi (=Doŭgen) eksciis tiun fakton, ke zen-sido estas plej bona metodo por ĉiuj en la samgo de la zenisto Ĵuĝjing, mi kuraĝe sidadis tage kaj nokte, kvankam la kolegoj ne zen-sidis timante malsaniĝon dum tre varmaj kaj malvarmaj sezonoj. Tiam mi pensis. Eĉ se mi malsaniĝus kaj mortus, mi nepre devas sinekzerci. Kio rezultos al mi (, kiu venis por lerni trans la maro riskante la vivon), senfare pasigante la tempon sen malsano sen ekzerco? Estas preferinde, se mi mortus pro malsano dum la ekzercado, lernante en la samgo de la granda lando, kaj mortinte funebrita de la eminentuloj, mi certe ricevos la grandan favoron de Budho. Se mi mortus en Japanio, oni ne funebros min per la formula ceremonio far de tiel eminentaj budhistoj. Se mi mortus survoje sur la ekzercado, kiel rekompenco far Budho mi renaskiĝos en budhan domon. Kio rezultos, se mi longe vivos sen ekzerco!? Por kio mi vivas? Dum mi prizorgas la korpon kontraŭ malsanoj, kiom mi pentos, se mi mortus droninte en la maron aŭ renkontinte neatenditan akcidenton! Tiel pensinte mi senhezite zen-sidadis tage kaj nokte. Sed malsanoj tute ne atakis min.

Nu, ankaŭ vi kuraĝe sinekzercu. Dek el dek ekzercantoj povos ver-vekiĝi.

La gvido de la zenisto Ĵuĝjing estis tia.

Vol. 2-12 (laikoj povas facile mortigi sin)

La majstro montris: Laŭokaze laikoj povas facile mortigi sin aŭ fortranĉi sian manon aŭ piedon. Pro socia rilato, sia honoro, profito aŭ obsedo li decidas difekti sin. Male, estas malfacile ordigi la koron alfronte al okazoj kaj aferoj.

²⁰ 1ŝakuo=30cm

Lernantoj! Unue ordigu la koron, kaj profunde pensu, ĉu tio, kion vi volas diri aŭ fari, estas laŭrezona aŭ ne. Se jes, vi diru dirindan, sinekzercu ekzercindan.

Vol. 2-13 (La lernantoj ne ĉagreniĝu de vestoj kaj manĝaĵoj.)

La majstro montris: La lernantoj ne ĉagreniĝu de vestoj kaj manĝaĵoj. Nur observu budhismon, kaj ne direktu la koron al laikaj aferoj. Budho diris “Por vesto troviĝas ĉifonaĵo (, kiun laikoj forĵetis), por manĝaĵoj troviĝas ekzerca almozado”. La du rimedoj neniam finiĝas en ĉiuj tempoj. Neforgesinte la sag-rapidan ŝanĝiĝon de la mondo vi devas ne rilatu al laikaj aferoj neutilaj. Dum la rosa vivdaŭro vi pensu nur pri budhismo, sed ne pri aliaj aferoj.

Oni demandis: Kvankam la deziremo al honoro kaj profito estas malfacile forigebla por homoj, tamen ĉar ĝi estas granda obstaklo por ekzercado, ĝin ni devas nepre forigi. Nun ni ĝin forigu. Sed la vestoj kaj manĝaĵoj estas ne forigeblaj por ekzercantoj, eĉ se ambaŭ estas malgrandaj problemoj, kiel vi diras. La ekzercado per la ĉifonaĵo kaj almozaĵo estas rimedo nur por bonkvalitaj budhistoj, kaj tio estas hinda maniero. La viharoj en Ĉinio havas provizaĵon. Pro tio ĉinaj budhistoj ne bezonas prizorgi. Dum la viharoj en nia lando ne havas provizaĵon, kaj la kutimo de almozado jam ĉesiĝis, ne herediĝis. Ĉar mi estas malbon-kvalita kaj senforta, kiel mi faru? Preni la oferaĵon de kredantoj akompanas la pekon senrajte preni. Labori per terkulturo, komerco, ofico aŭ metio estas malpermesite. Vivi nur laŭ destino alportos nur mizeran rezulton. Kiam venas malvarmo kaj malsato, tiuj baros la ekzercadon.

Pro tio Iu admonis min “Vi ege eraras, ne pensas la kondiĉojn de la tempo kaj via kvaliteco. Nun estas la degenera periodo, kaj vi ne apartenas al bonkvalita klaso. Se vi daŭrigos ekzercon laŭ via rimedo, tio kaŭzos la regreson en la ekzerco. Konsultinte subtenanton aŭ promesinte kun protektanto vi sinekzercu en kvieta loko, ne ĉagrenate de la vestoj kaj manĝaĵoj. Tiu rimedo ne havas signifon avidi riĉaĵon. Vi povas sinekzerci pretiginte portempe nur necesajn aĵojn.” Kvankan li admonis tiel, sed mi ankoraŭ dubas. Kia vi opinias la admonon?

La majstro respondis: La vivmaniero de budhisto estu sama, kiel tiu de Budho. La kutimoj de la tri landoj (=Hindio, Ĉinio kaj Japanio) ne estas samaj, sed ne troviĝis tiu, kiu sinekzercis kun protektanto. Vi nur strebu en budhismo, ne interriltu kun laikoj.

Budho diris “Budhistoj posedu nenion krom la tri vestoj kaj bovlo. La troan parton de armozaĵo donu al malsataj homoj.” Eĉ se vi ricevis oferaĵon troe, vi ne plu posedu ĝin. Des pli, vi ne ĉirkaŭkuru por manĝaĵo.

En ekster-budhisma instruo tekstas “Se mi povas scii la vojon matene, povas morti vespere.” (=konfuceanismo). Eĉ se vi mortus malsate aŭ malvarme, vi devas vivi laŭbudhisme eĉ unu horon aŭ unu tagon. Kiomfoje vi mortis kaj renaskiĝis dum senfina pasinteco!? Tiuj vivoj estis motivitaj de via obsedo al la efemera mondo. Se ĉifoje vi mortus pro malsato pro budhisma vivo, tio invitos vin al eterna trankvilo (=nirvano).

En la tuta sutraro ne estas skribite, ke budhistoj mortis pro malsato aŭ malvarmo en ĉiuj landoj. La necesaj vestoj kaj manĝaĵoj estas jam nature deciditaj. Tiuj ne ĉiam venos malgraŭ via deziro, male ne okazas, ke tiuj ne venos sen via deziro. Pro tio vi ne zorgu pri tiuj.

Pretekste, ke nun estas la degenera periodo, kaj vi estas malbonkvalita, se vi ne starigas la bodi-koron, en kiu renaskiĝo vi povas ver-vekiĝi!? Kvankam vi ne estas Subhuti nek Mahakassapa (=ambaŭ estas budhistoj en Budha tempo), vi devas sinekzeri (kiel eble plej alten) en via kvaliteco.

En alia ekster-budhisma teksto estas skribite "Tiu, kiu amas virinon, amas virinon, kvankam ŝi ne estas tiel bela, kiel Ŝjiŝi aŭ Maŭĉjang (=belulinoj en ĉina historio). Tiu, kiu amas ĉevalon, amas ĉevalon, kvankam ĝi ne estas tiel bona kiel Fejtu aŭ Ljue (=bravaj ĉevaloj en ĉina historio). Tiu, kiu amas frandaĵon, amas frandaĵon, kvankam ĝi ne estas tiel bongusta kiel Longgan aŭ Baotai." Ili strebas al sia amata kiel eble, ankaŭ lernantoj devas strebi.

Kaj plie Budho restigis Sian 20 jaran provizaĵon²¹, kaj donacis ĝin al ni vivantaj en la degenera periodo. Pro tio ne elĉerpiĝas la ofero al la viharoj fare de homoj kaj budhoj. Malgraŭ, ke Budho havis di-forton, iam Li pasigis someron manĝante hordeon²². Kiuj el ni, la disĉiploj en la degenera periodo, ne dankas al Lia favoro!?

Lernanto demandis. Mi volas sentime sinekzeri perlaborante sub laiko por subteni la vivon, ol senrajte ricevi oferaĵojn de homoj kaj budhoj ignorante la ŝilaron, kaj vane konsumante la Budhan donacon sen la voj-koro. Kiel vi opinias?

La majstro respondis: Kiu diris, ke vi povas ignori la ŝilaron kaj esti sen la voj-koro!? Vi devas perforte starigi la bodi-koron, kaj sinekzeri en budhismo. La Budha donaco estas egale disdonata ne temante, ĉu vi tenas aŭ ignoras la ŝilaron, kaj ĉu vi estas novulo aŭ veterano. Se oni ignoras la ŝilaron, li fariĝu sekulara. Neniuj estas permesitaj ne sinekzeri, eĉ se li ne starigis la bodi-koron. Kiuj starigis la bodi-koron de la komenco!? Oni iom post iom progresos, se li starigos la bodi-koron malfacile starigeblan, kaj se li sinekzeros malfacile ekzerceblan. Ĉiuj homoj nepre havas budhecon, sen-kiale ne malaltigu sin.

La majstro plue montris. Estas skribite en la poemaro Venŝjŭan 'Unu regno fondiĝas per unu homo. Faro de saĝulo neniĝas pro posta malsaĝulo.' Tio signifas, ke se ne plu naskiĝis saĝuloj en la regno, la saĝa rezulto pereos. Pri tio vi profunde pensu. (=Budhismon fondis Budho. Ankaŭ vi ĝin heredu, ne estu mal-saĝaj! - tradukanto)

Vol. 2-14 (iu ajn viro, virino, juna aŭ maljuna)

Post babilado la majstro montris: Foje oni, iu ajn viro, virino, juna aŭ maljuna, babilas pri am-aferoj. Oni diras, ke en tia temo ili igas sin malstreĉi, kaj ĝuas kiel petoran rakonton. Kvankam ĝi donas amuzon portempe, tamen, por budhistoj ĝi estas rigore malpermesita. Eĉ en laika mondo personoj respektindaj kaj sinceraj ne

²¹ Sian 20 jaran provizaĵon; Budho povus vivi 100 jarojn, sed Li mortis 80 jaraĝe (=legendo). Troviĝas sama teksto en Vol. 1-3.

²² Reĝo invitis Budhon kaj 500 disĉiplojn por somero. Sed la reĝo forgesis pretigi manĝaĵon. Kiam ĉevalisto proponis oferi por-ĉevalan hordeon al Budho. Budho kaj la disĉiploj vivis 90 tagojn nur de la hordeo. Tiu ŝparo de Budho estas por disĉiploj de plipostaj generacioj, oni legendigis.

parolas ĝin okaze de kunveno deca kaj serioza. Oni ĝin parolas nur en ebria kaj sendeca festeno. Budhistoj pensu nur la budhan vojon. Tiu, kiu parolas tian aferon, estas nur malofte trovebla kiel freneza budhisto.

Ĉar ĉe la viharoj en Ĉinio neniu babilas bagatelaĵojn, oni ne bezonas mencii tian temon en Ĉinio. Nialande, kiam la zenisto Eisai vivas, la samganoj tute ne babilis pri tia temo. Post kiam li mortis, ĉar liaj rektaj disĉiploj ankoraŭ restis, estis tutsame. De antaŭ 7 aŭ 8 jaroj (=de kiam Doŭgen revenis de Ĉinio) nuntempaj novuloj foje babilas pri am-aferoj. Tute ne permeseble!

En la tradicia sutro troviĝas jena teksto; Ekscesa malbon-faro foje enkondukas homon en ver-vekiĝon, sed sensenca parolo baras la voj-iradon. Eĉ sensenca simpla elparolaĵo foje fariĝas obstaklo por ver-vekiĝi. Homoj emas delogiĝi de parolata temo, ni devas esti atentemaj. Sed vi ne bezonas forte ĉesigi al vi eldiri tiun temon, tamen, se vi komprenis, ke tio estas baro de la vojo, baldaŭ vi povos ne diri.

Vol. 2-15 (kiam li faris bonfaron)

La majstro montris en vespera lekcio: Oni volas diskoniĝi, kiam li faris bonfaron. Sed li ne volas koniĝi, kiam li faris malbonon. Pro tio tiuj faroj ne plaĉas al ĉieluloj. Konsekvence al la bonfaro diskonigita ne venas budha favoro, male venas puno pro malbono kaŝite farita. Se vi pensas, ke ne venas budha favoro al la farita bonfaro, tio estas via eraro. Vi devas ŝanĝi vian eraran konduton.

Vi faru bonfaron, kiam la aliaj ne vidas. Kaj kiam vi faris malbonon, vi konfesu kaj pentu la pekon. Se vi tiel faras, vi ricevos la favoron pro kaŝite farita bonfaro, kaj via malkovrita peko estingiĝos pro la konfeso. Sekve de tio vi ricevos dumvivan meriton kaj scios estontan rekompencon bona.

Kredanto venis kaj demandis: Kvankam laikoj regalias budhistojn kaj namas (=respektas) je budhismo, tamen, multaj malbonoj okazis. Pro tio ili ekhavis dubon pri budhismo, kaj ne emas nami je la tri juveloj. Kiel Vi opinias?

La majstro respondis: Tio ne estas kulpo de budhistoj kaj budhismo. La laikoj mem eraras. Nome, ili respektas kaj regalias nur ŝajne seriozajn budhistojn, sed ne regalias tiujn, kiuj senhonte ignoras ŝilaron, drinkas sakeon, kaj manĝas viandon. Tia diferencigo vere kontraŭas al la budha koro. Pro tio la efiko de la adorado fariĝas vana, kaj ili ne povas ricevi favoron. Ankaŭ en la ŝil-sutro tie kaj ĉi tie estas skribite, ke oni ne diferencigu budhistojn. Se iu nomiĝas budhisto, oni devas regali lin sendiference, ĉu li estas virta aŭ ne. Precipe oni ne juĝu per ekstera aspekto la internan virtecon. Budhistoj en la degenera periodo estus ŝajne ortodoksaj, sed interne foje malbon-kora kaj malbon-fara. Pro tio oni mem ne taksu budhistojn bona aŭ ne, sed egale respektu kaj regalu ilin, nur ĉar ili estas budhaj disĉiploj. Kaj kiel rezulto, lia kredo nepre atingos ĝis Budho, kaj li ricevos tuj la favoron.

Krome troviĝas la kvar frazoj; Kaŝita rekompenco por kaŝita faro. Klara rekompenco por klara faro k.t.p. (=la kaŝita por la klara, la klara por kaŝita), ankaŭ la tri-tempaj karmoj; Ricevi rekompencon de karmo en la kuranta vivo, en la sekvanta vivo, en la pliposta vivo. Tiujn vi profunde lernu.

Vol. 2-16 (Kiam laiko venis kaj petis vin)

Vespere la majstro montris: Kiam laiko venis kaj petis vin skribi pet-leteron²³, aŭ paperojn por proceso, tiam vi pensus “Mi jam izoliĝis de socio, kaj estas ermito. Estas ne konvene interveni en sekularajn aferojn.” Kaj rifuzus la peton. Sed vi pripensu atenteme la okazon.

Tia via sinteno ŝajne pravas kiel ermito. Sed tio ne estas prava, ĉar en via koro troviĝas io alia, nome, “Mi estas ermito. Se mi intervenus en sekularan aferon, certe oni kritikos.” En tiu pensmaniero mi (=Doŭgen) ankoraŭ trovas la obsedon kaj sistemon de via honoro. Vi devas skribi por la merito de la petanto ignorante la kritikon de la leter-ricevonto. Ĉu io malbona okazos, eĉ se vi malamikiĝus kun tia sen-rezona homo, kiu kritikos vian konduton? De ekstere oni vidus vian konduton malbona, tamen, interne vi povas forigi la obsedon de la honoro. Ni devas tiel pensi.

Oni diras, ke Budhoj kaj bodisattoj fortranĉas kaj donas eĉ sian manon aŭ piedon, kiam oni venis kaj petis. Des pli, ja estas peko de la obsedo, se vi ne skribas la petitan leteron timante la renomon pro ŝajne malbona faro. La ricevinto de la letero dirus “Ne estas konvene al li, kiel ermito, fari tiun ĉi senpravecan.” Senkonsidere li tiel pripensus, sed tio utilas forigi vian obsedon de la honoro, kaj doni profiton al iu, nome, tio estas fidera al la vera vojo. Tiamanieraj rakontoj foje troviĝis ĉe la anekdotoj de malnovuloj. Ankaŭ mi (=Doŭgen) aprobas tion. Estas facile skribi al iu sciigon por la kredanto kaj konato, dume vi konsumas nur kelke da papero.

Mi (=Eĵoŭ) demandis: Mi konsentas vian opinion. Okaze de sciigo pri ĝojinda aŭ profitodona afero restas nenia problemo. Sed povas okazi sciigo de defraŭdo pri alies propraĵo aŭ kalumnio al iu alia. Kiel Vi opinias pri tiuj okazoj?

La majstro respondis: Vi ne rilatas al tio, ĉu la enhavo estas ĝusta aŭ malĝusta. Sed tiam vi anoncu al la leter-petanto kaj enskribu en la leteron, ke ‘Ĉar oni petis min skribi, mi nur skribis, kaj ke vi mem juĝu (la enhavon), ĉu la afero estas justa aŭ maljusta’. Kaj la leter-ricevonto mem konkludos, ke vi ne estas respondeca.

Kompreneble sendi tian leteron mem estas maljusta flanke de la sendanto. Kaj eĉ se vi trovis, ke la enhavo de la letero estas maljusta, sed kiam vi sendas ĝin al intima aŭ klera konato, kiu estas konata de justeco, tiam vi aldonu, ‘Ne povinte rifuzi mi skribis al vi. Volu bontrovi laŭ via rezono, mi petas.’ Se vi tiel prizorgas, vengemo al vi ne restos.

En tiel malfacilaj okazoj vi pripensu ne nur la enhavon, sed ankaŭ la homan rilaton. Nun mi diru, ke vi forigu la obsedon kaj honoron en ĉiuj okazoj.

Vol. 2-17 (Nuntempe multaj homoj, laikoj kaj ankaŭ elirintoj)

La majstro montris en vespera horo: Nuntempe multaj homoj, laikoj kaj ankaŭ elirintoj, volas nepre diskonigi sian faritan bonfaron, kaj kaŝi faritan malbonfaron.

Pro tio la ekstera afekto kaj la interna koro malproporciiĝas. Vi devas klopodi, ke la koro estu proporcia al la ekstero, pentu vian malbonon, kaŝu virton, ne ornamu la eksteron, cedu bonan rezulton al aliaj, kaj ŝuldu malbonon sur vin.

²³ skribi pet-leteron; Tiama plebo estis preskaŭ sen aboco, dume budhistoj havis ŝancon edukiĝi. -tradukanto

Mi (=Eĵoŭ) demandis: Kaŝi virton kaj ne ornami eksteron estas natura sinteno por (sincera) budhismo, kiel vi diras . (Dume) doni meriton al vivuloj estas ĉefa temo de budha kompato (, mi pensas). (De tio mi demandas.) Se ordinaraj homoj sensaĝaj malbone traktus budhiston pro lia ekstero malbela, ili ricevos punon pro la peko blasmfemi budhiston. Male al tio, se oni respektas kaj regalas budhiston pro nur lia bela ekstero senrilate al lia virteco, tamen ili ricevos iom da favoro (de budho). Kiel vi opinias pri tiuj okazoj?

La majstro respondis: Eĉ se tiu budhismo estas malatentema pri sia ekstero, se li faras tion troe, ankaŭ tio estas ekster moralo. Kaj eĉ se li volas kaŝi virton, se li faras malbonon antaŭ kredantoj, ankaŭ tio estas granda ŝil-ignorado. (Probable) li esperas koniĝi kiel admirinda voj-iranto, aŭ kaŝi sian alian malbonfaron de alies okuloj. (Certe) li ne hontas, ke budhoj kaj la tri juveloj vidas ĉiujn liajn kondutojn, sed spite al tio li volas esti respektata de kredantoj. Mi deadmonas vin de tia kor-pretado. Ni devas pensi kiel trakti la aferojn laŭokaze nur por la merito de vivuloj kaj por prospero de budhismo.

“Diru post pripenso, faru post pripenso, kaj kondutu ne sovaĝe.” Antaŭ ĉio ni devas fari ion ajn post rezonado.

Estas klara fakto antaŭ la okulo, ke ĉio fluas momente post monento, kaj ke ĉio rapide ŝanĝiĝas. Pri tio vi ne bezonas atendi vortojn de eminentulo nek skribon de sutroj. Ne atendu morgaŭon. Neniu scias, kio okazos morgaŭ. Se jes, laŭiru la budhan vojon por hodiaŭ, en kiu vi almenaŭ vivas. La voj-irantoj devas ĉiam vivi por prospero de budhismo kaj la merito al vivuloj forgesinte sian vivon kaj korpon.

Mi (=Eĵoŭ) demandis: Ĉu ni devas praktiki almozadon laŭ budhisma tradicio?

La majstro respondis: Jes, vi pravas. Sed vi devas praktiki ĝin laŭ la regiona moro. Kiam la vojo estas kota, la vestoj malpuriĝos. Kaj kiam loĝantoj estas malriĉaj, foje vi ne povus plenumi la regulan almozadon (=almozi de 7 laŭvicaj domoj), tiam via ekzercado regresus, kaj la merito al vivuloj estus malmulta. Sed se vi praktikas laŭ la regiona moro, baldaŭ la loĝantoj de siaflanke ekoferos al vi. Kaj tio signifas, ke via ekzercado kaj la disvastigo de budhismo progresas. En ĉiuj okazoj vi pensu nur por bono de budhismo kaj merito al vivuloj ignorante alies kritikon kaj vian profiton.

Vol. 2-18 (Kiam vi foriras de laika socio)

La majstro montris: Lernantoj! Kiam vi foriras de laika socio, vi devas pripensi deĉiuj flankoj. Vi devas foriri de la socio, foriri de la familio, forferi vian korpon kaj la koron (al budhismo). Pri ĉi 4 temoj vi estu atentemaj.

(Ekzemple,) troviĝis tiu, kiu ermite loĝis inter montoj foririnte de la familio, sed ankoraŭ zorgas la familian prosperon kaj la vivojn de parencoj. Kaj estis la alia, kiu definitive eliris el la familia rondo, kaj forlasis la parencojn. Sed li decidis ne fari tiujn, kiuj suferigos lin, timante malsaniĝon li ne sinekzercas. Tio signifas, ke tia li ankoraŭ ne forferas la korpon. Aliokaze, kvankam oni pene sinekzercis kaj asketadis, tamen, li ne faris tion, kio ne praĉas al li, eĉ se tio estas metodo de la vojo. Nome, li ankoraŭ ne forferas la koron.

la volumo 3-a

Vol. 3-1 (Se la ekzercanto povas regi unue sian koron)

La majstro montris: Se la ekzercanto povas regi unue sian koron, estas facile forlasi sin kaj laikan socion. Sed ordinaruloj timas alies okulojn pri sia diraĵo kaj konduto. Kaj ili ne faras malbonon timante riproĉon de najbaroj, kaj faras bonfaron esperante laŭdon de ĉirkaŭo. Ambaŭ estas homaj naturoj. Dume, se oni faras malbonon laŭ sia dispono, li estas simple malbonulo. Antaŭ ĉio ni devas forgesi nin, kaj rektanime klopodi por budhismo. (lernu budhismon ne por si, sed por budhismo -tradukanto) Ĉiuokaze, laŭnecese ni devas bontrovi.

La ekzerco-komencantoj detenu sin de malbono je la koro, sed faru bonfaron. Tio estas la metodo forlasi sin.

Vol. 3-2 (Kiam ankoraŭ la zenisto Eisai vivas en la viharo Ken'nin-ĵi)

La majstro montris: Kiam ankoraŭ la zenisto Eisai vivas en la viharo Ken'nin-ĵi, malriĉulo venis kaj diris "Ni estas malriĉaj. Jam kelktage ni ne manĝas. Ni, t.e. mia edzino, la filo kaj mi, alfrontas al malsat-morto. Volu savi nin je la budha kompato."

Tiutempe ne troviĝis vestoj, manĝaĵoj nek riĉaĵo en la viharo. Oni ne povis trovi bonan solvon. Sed tiam troviĝas en la viharo iom da kupraj bastonetoj por fari budhan statuon. La zenisto Eisai prenis tiujn kaj faskigis, kaj ĝin donante al la malriĉulo diris "Per tiu ĉi aĉetu manĝaĵon." La malriĉulo reniris kun ĝojo.

Liaj disĉiploj kritikis la zenisto "Tiu estis la materialoj de budha statuo. Kiel vi opinias pri la peko proprigi budhan havaĵon?" La zenisto Eisai respondis "Vi certe pravas. Sed mi aŭdis, kiam vivuloj petas, budho fordonas eĉ sian manon kaj piedon. Se budho vidus homon mortonta pro malsato, certe permesos fordoni eĉ la tutan statuon. Kaj eĉ se oni kondamnis min iri al narako²⁴, mi volas savi malsatulon." Ni lernu la altecon de la koro de nia antaŭulo, kaj ne forgesu.

Kaj iam alia disĉiplo diris "Nun nia viharo situas apud rivero. Iam ĝi ricevos akvo-damaĝon." La zenisto Eisai komentis "Ni ne bezonas timi estontan damaĝon. Eĉ ĵetavana viharo en Hindio nun restigas nur ruinon, sed la virteco konstrui la viharon ne perdiĝis. Same, la virtan meriton sinekzerci ĉi tie eĉ kelk-jarojn oni ne povas mezuri."

Mi nun pensas. Ĉar konstrui viharon estas granda entrepreno, nature oni volas tenadi bonorde kaj eterne. Spite al tia homa sento, la zenisto havis tiel racian rezonon. Ni devas koni la grandecon de la koro de la zenisto.

Vol. 3-3 (Kiam la reĝo Taj-zong de Tang-dinastio regas la landon)

La majstro montris en vespera lekcio: Kiam la reĝo Taj-zong de Tang-dinastio (Ĉinio) regas la landon, Vej Ĝeng (=unu el la korteganoj) diris al la reĝo "Plebanoj kalumnias vin." La reĝo diris "Kalmunio ne ĉagrenas min, se mi havas virton. Sed mi devas malĝoji, kiam oni laŭdis min sen-virtan."

²⁴ narako: budhisma infero

Eĉ laiko (=reĝo) estas tia, des pli budhisto devas esti tia. Vi ne bezonas malĝoji pro kalumnio de laikoj, se vi havas la (budhan) kompaton kaj la voj-koron. Sed se oni pensas vin voj-iranto, kvankam vi ne havas voj-koron, tion vi devas timi.

Plue la majstro montris. La reĝo Ven de Suj-dinastio (Ĉinio) diris “Mi volas kaŝe kulturi la virton, kaj atendi, ke la plebo laŭdos min virta.” Tio signifas, ke li volas gvidi plebon, post kiam oni rimarkis lian virtecon.

Budhisto devas honti, se lia kor-pretado malsuperas tiun de la reĝo. Se vi kaŝe sinekzercas al la virto, tio spontane eksudos de vi. Sed vi ne esperu nek atendu, ke via virto kaj ekzercado diskoniĝos. Vi nur sinekzercu sub la budha instruo kaj sekvu la metodon de la antaŭuloj, tiam iom post iom la budha virto influos la aliajn.

Sed ĉi tie naskiĝus erara imago, ke kolektita respekto kaj gajnita riĉaĵo pravas rezulton de la virteco. Tiele miskomprenus la lernantoj mem kaj ankaŭ la ĉirkaŭuloj. Sed vi devas scii, ke ĝuste tiam Mara kaj Papijaso (=diabloj) ekloĝas en via koro. Vi devas esti plej singardaj pri tio. Tion avertas ankaŭ sutroj, kio estas faro de Mara. Mi neniam aŭdis el la tri landoj (=en la tuta mondo), ke oni mezuras la virtecon per la kvanto de riĉaĵo kaj respekto de malsaĝuloj. Ver-sence la aŭtentikaj ekzercantoj en la tuta mondo devas esti malriĉaj, eltenemaj, decaj, kompatemaj kaj havantaj la voj-koron.

La signo de la virteco ne estas kvanto de propraĵo kaj (kolektita) oferaĵo. Sed la virteco aperas en 3 signoj; La unua signo estas, ke li koniĝas kiel voj-iranto, la dua estas, ke la aliaj ekŝatas la vojon, kaj la tria estas, ke oni kolektiĝas ĉirkaŭ li por kune lerni kaj sinekzerci. Tiuj 3 signoj ja estas la aperoj de la virteco.

Vol. 3-4 (La lernanto devas forigi laikan senton.)

La majstro montris en vespera lekcio: La lernanto devas forigi laikan senton. Forigi laikan senton signifas laŭiri laŭ budhismo. Multaj laikoj vivas en hinajana inklinado (=profitema nur al si), nome, ili diskutas pri bono kaj malbono, prenas ĉi tiun kaj forigas tiun. Se oni forigas la laikan senton, li tuj eniras en la budhan vojon. Por eniri en la vojon ne dividi bonon de malbono, nek decidi ion bona aŭ malbona laŭ sia juĝo. Ne elekti ion por sia profito, nek por sia kontento. Male li devas sekvi la vortojn kaj agojn de eminentaj antaŭuloj ne juĝante, ĉu tiu faro estas bona aŭ malbona.

Ne ĉio estas prava, kion vi kaj la aliaj pensas prava. Vi devas nur submeti vin sub la budha instruo ignorante alies okulojn, forlasinte vian opinion. Eĉ se vi trovis ion suferdona fizike kaj mense, vi devas fari tion farendan por budhismo, dirante al si ‘Ĉar mi oferis mian koron kaj la korpon (al Budho)’. Kaj eĉ se vi pensis, ke ‘Tio ĉi devas esti bona kaj konvena al budhismo, kaj mi volonte faru ĝin’. Sed vi ne faru tion, kion ne faris la antaŭuloj. Tia via sinteno signifas, ke vi bone komprenas la budhismon.

El via koro vi forigu la sciojn ĝisnun memoritajn, kaj ŝanĝu ilin al nun montritaj vortoj kaj agoj de la gvidanto. Tiel klopodante iom post iom via ekzercado progresos kaj vi povos akiri la ver-vekiĝon.

Eĉ sciojn lernitajn ĝis nun per sutroj vi forĵetu, se ne utilaj. De nun vi rigardu el nove akirita vidpunkto. Oni lernas budhismon, kompreneble, por atingi la vojon. Sed

kelkaj el vi dirus en vi “Ĉar mi multe kaj longe lernadis. Estas malfacile forlasi la longjaran klopodon.” Tian koron mi (=Doŭgen) nomas la koro ankoraŭ katenita. Vi esploru tian inklinon en via koro.

Vol. 3-5 (verki la vivon de la forpasinta zenisto Eisai.)

La majstro montris en vespera lekcio: Kiam oni petis la konsilanton Harukane (japano) verki la vivon de la forpasinta zenisto Eisai (japano). Komence li malakceptis dirinte “Volu ordoni al skribisto. Ĉar ili lernas kiel skribi, de la knabeco ĝis maturiĝo sindone diligente, kaj iliaj verkaĵoj ne havas eraron. Dume aliaj homoj havas sian taskon, kaj kiel hobion ili lernas skribi nur en libera tempo, kvankam lertuloj foje troviĝas, tamen, foje okazus eraroj en la skribaĵo.” En lia parolo mi (Doŭgen) trovis, ke ankaŭ lernantoj de ekster-budhismo sindone lernas.

La majstro daŭre parolis. La budhisto Koŭin diris “La voj-iranto estas tiu, kiu tenas en si, ekzemple, la teorion de ‘la tri-mil mondoj (=la tuta mondo) dun momenta penso’. Sed ne estas nomata la voj-iranto tiu, kiu sencele vagabondas portante kanĉapelon kaj kaŝajon*. Tian vagadon mi nomas Mara-a (=diabla) ekzerco.”

Vol. 3-6 (La vivtenaĵoj, kiujn vi uzas)

La majstro montris en vespera lekcio: La forpasinta zenisto Eisai (japano) ĉiam diris “La vivtenaĵoj, kiujn vi uzas, ne estas donaĵoj de mi, sed liveraĵoj de la ĉieluloj. Mi estas nur peranto de ili. Ĉar via necesa porcio por la tuta vivdaŭro jam estas rezervita (en la naturo). Vi ne bezonas ĉirkaŭkuri serĉante vivtenaĵojn.” Tiuj estas unuaklasaj belaj vortoj, mi pensas.

En la viharo de Tjangtong-ŝan en Song (Ĉinio), kiam la zenisto Hong-ĝji estas vihar-estro, oni planis, ke la kvanto de la provizaĵo (=buĝeto) estu por mil homoj. T.e. por sepcent (lernantoj) en la ekzercejo, kaj por tricent (laborantoj) ekster la ekzercejo. Sed kiam la zenisto Hong-ĝji gvidas la samgon, kolektiĝis mil ekzercantoj en la ekzecejon, krome ekstere kvin~ses cent. La oficisto pri la provizo petis la zeniston “Tro multe da homoj kolektiĝis, mankas provizaĵo. Volu malmultigi la loĝantaron, kvankam mi scias, ke vi ne volas fari tion.” La zenisto respondis “Ĉiuj havas sian porcion promesitan de la naturo. Pro tio la provizaĵo ne dependas de via prizorgo. Ne timu pri tio.”

Nun mi (=Doŭgen) pensas pri la diraĵo de la zenisto. Homoj havas sian porcion donitan de la naturo. Eĉ se li deziras, ne ĉiam venas la dezirata, kaj eĉ se li ne deziras, ne okazas ne veni la dezirata. Eĉ laikoj volas esti lojale al la mastro, kaj fidere al la gepatroj forgesinte sian vivtenadon. Des pli, la elirintoj ne zorgu pri la aliaj aferoj (krom la ekzercado). Al ni troviĝas Budha favoro, oferaĵoj de la ĉieluloj, kaj donaĵo de la naturo por teni la vivon. Tiuj ĉi estas aĵoj, kiujn vi ne bezonas prizorgi. Eĉ se vi postkurus kaj povus akiri bonhavaĵon, kiel fari, se la morto ĝuste starus antaŭ vi? Pro tio vi ne atentu la aliajn aferojn, sed rektanime strebu al la vojo.

Iu diris “Ni vivas en la degenera periodo (de budhismo) kaj loĝas for de la budhisma centro (=Hindio). Pro tio, se vi volas disvastigi budhismon, vi havu protektanton (, kiu servas aĵojn al elirinto) por vivteni, kaj ne ĉagreniĝu de kromaj aferetoj. Kaj se vi tiel vivas, oni aŭdus, ke ĉi tie ne estas necese ĉagreniĝi de vivtenaĵo,

kaj multaj lernantoj kolektiĝos. Kaj inter ili troviĝus almenaŭ unu, kiu starigos la bodi-koron. Konstruu domon en kvieta loko, kaj senĝene de vivtenaĵo vi ekzercu. Tia vivo alportos plimultan meriton por budhismo, mi pensas.”

Nun mi (Doŭgen) pensas tion, ke ne. Eĉ se kolektiĝus miloj da homoj, kiuj svarmas kun deziremo al havaĵoj kaj profitoj, estas malpli ŝatinde, ol ne troviĝas eĉ unu aŭtentika lernanto. En tia svarmo nur akumuliĝas malbona karmo, kaj ne troviĝas spirito de budhismo. Dume, troviĝus budhisto, kiu sinekzercas ĉiam sub malfacila vivo almozante, kaj manĝante semojn de herboj kaj arboj, sed se eĉ unu venos por lerni la vojon de li, li ja estas aŭtentika voj-iranto! Nur tio ĉi estas vera prospero de budhismo. Se oni komparas ĉi tiun du okazojn, nome, multe da homoj troviĝas pro bonhavaĵo sed sen budhismo, kaj ne troviĝas voj-serĉanto pro malriĉeco, mi diru; ambaŭ estas sensencaj.

Kaj la majstro montris: Nuntempaj homoj pensas, ke konstrui budhan statuon kaj stupaon signifas la prospero de budhismo. Sed tio estas malĝusta. Eĉ se oni konstruis grandan viharon kaj ornamis per multekostaj akcesoraĵoj, ne naskiĝas ver-vekiĝanto per tio. Kvankam tio fariĝas laika trankvilo (por sia estonteco) enportante sian havaĵon en budhisman mondon, kaj li sentus grandan feliĉon. Tamen tio ne signifas la prosperon de budhismo, se tion faras budhistoj mem. Al budhistoj nur zen-sidi eĉ iom da tempo en kabano aŭ sub arbo, aŭ studi iun frazon de sutro, alportas la veran prosperon.

Mi (=Doŭgen) nun kvestas kaj laboras por konstrui viharon. Sed mi ne pensas, ke tio estas budhisma prospero. Ĉar mi nun ne estas okupita de io alia, pensas, ke estas plibone, ol vane pasigi la tempon sen lernantoj, kaj konstrui viharon fariĝus motivo por tiuj, kiuj serĉas veran budhismon, kaj la viharo fariĝos zen-ekzercejo por la lernantoj. Ne gravas, eĉ se ĝi ne estos finkonstruita. Unu dom-fosto sufiĉas. Niaj posteuloj komprenos min, ke mi intencis konstrui viharon, sed ne povis plenumi. -- Tion mi ne hontas.

Oni rekomendis al mi (=Doŭgen) viziti la regionon Kantoŭ (=Kamakura, la ĉefurbo de tiama feŭdisma registaro) por disvastigi budhismon.

Mi respondis: Ne. Se oni volas lerni budhismon, li mem devas veni al ni transmontoj, riveroj eĉ la maroj. Estas sence, ke vojaĝi por viziti tiujn, kiuj ne estas certaj lerni budhismon aŭ ne. Se la vojaĝo celus por trompe akiri vivtenaĵojn kaj kolekti bonhavaĵojn, estas ne necese vojaĝi, ĉar mi nur laciĝos.

La majstro plu montris: lernantoj ne lernu ali-sektajn librojn nek la ekster-budhismajn. Se vi volas legi librojn, legu la kolektaĵojn de la vortoj kaj agoj de la majstroj, la aliajn vi forlasu.

Nuntempaj zenistoj ŝatas literaturon por verki versaĵon kaj predikon (per bela retoriko). Ne estas rekomendinde. Vi ne bezonas fari versaĵon, nur skribu, kiun vi trovis. Eĉ se via verkaĵo ne estas bel-stila, skribu tiujn, kiujn vi komprenis. Tiu, kiu ne volas legi vian verkaĵon pro la stilo, estas sen la voj-koro. Kaj eĉ se troviĝus mirinda frazo en la bel-stila verkaĵo, ĝia verkanto nur ludas kun literaturo, sed ne povas akiri la kernon de la instruo. Ĉar mi (=Doŭgen) ŝatis kaj lernis literaturon en la knabeco, ankoraŭ nun foje aperas al mi belaj vortoj de literaturoj, ekzemple, de Venŝĵuan

(=malnova ĉina antologio). Sed ĉar citi la aliajn tekstojn estas sensignife, nun mi volas ĉesi.

Vol. 3-7 (Kiam mi estis en la zen-viharo de Song)

Iun tagon la majstro montris: Kiam mi (=Doŭgen) legas dokumentojn de malnovaj zenistoj en la zen-viharo de Song (Ĉinio), la kolego, eminenta antaŭulo, el Ŝu (okcidenta Ĉinio) demandis min "Por kio vi legas?"

Mi respondis "Renirinte la hejmlokon mi volas gvidi homojn."

Li demandis denove "Por kio?"

Mi "Por doni meriton al ili."

Li "Entute por kio?"

Poste mi repensis lian demandon. Post ĉio mi trovis, ke legi vortojn kaj zen-demandojn, koni agojn de malnovaj eminentuloj kaj gvidi per la akiritaj scikonoj, tiuj ĉi estas senutilaj por mia ekzercado kaj gvidi aliajn. Unue oni devas rektanime zensidadi ĝis li komprenis la signifon de zeno, kaj klare koni la funkcion de la koro. Kiam oni finlernis la ekzercadon, eĉ se li ne sciis literojn, povas klarigi al aliaj sian rikolton neelĉerpeblan. Pro tio la antaŭulo el Ŝu demandis min 'Entute por kio?' Mi komprenis, ke lia gvido estas prava. Kaj de tiam mi ĉesis legi la librojn, strebis zensidadi ĝis mi akiris la rezulton.

Vol. 3-8 (sen vera interna virto.)

La majstro montris en vespera horo: Vi ne estu respektata sen interna virto.

Laikoj en tiu ĉi lando respektas homon nur per la ekstero, ne povante sondi la internan virton. Pro tio sen-voj-kora lernanto delogiĝas de malbono, kaj fariĝas subulo de Maraŝ (=diablo). (Al vi) estas facile intenci, ke ne ricevu respekton. Tiu, kiu ŝajnigas sin ermito kaj evitanta la socion, estas nur-surfaca ekzercanto. Dume tiu, kiu sintenas same kiel ordinaruloj kaj kaŝe ordigas sian koron, ja estas aŭtentika vojiranto.

Iam oni diris "Interne sen memo, sed ekstere estu ordinare". Tio signifas, ke la lernanto devas forpeli obsedon en la koro, kaj ekstere ŝajnigu sin kiel ordinarulon. Forgesinte sian egoon kaj la korpon, kaj enirinte en budhismon kaj praktikante budhisman kutimon li progresos en la interno kaj ekstero, nun kaj estontece.

Sed estas ankaŭ erare, se oni forlasus ion, kion li devas ne forlasi, nur ĉar li eniris en budhismon, en kiu, pretekste, ke oni devas forlasi ĉion.

En nia lando okaze troviĝas tiu, kiu nomas sin budhisto aŭ vojiranto. Li intence kondutas maldece antaŭ publiko, aŭ okaze iras en pluvo (sen ŝirmilo) por paradi sin ignoranta eĉ la vivon. Tia sinteno estas senmerita, sed oni taksas lin respektinda kaj ne ŝparanta la vivon. Dume oni miskomprenas tiun, kiu vivas laŭ-budhisme observante ŝilaron kaj precepton, kiu (verdire) atendas renomon kaj profiton. Sed (verdire) tia situacio estas oportuna al la vojo kaj (bona) okazo por li kulturi la virtecon.

Vol. 3-9 (Ne estas necese, ke vi koniĝas esti erudicia.)

La majstro montris en vespera horo: Ne estas necese, ke vi koniĝas esti erudicia.

Kiam troviĝas homo, kiu sincere serĉas la vojon, vi devas instrui la vojon, kion vi scias. Eĉ se iu venus por mortigi vin, sed se li sincere demandis pri la vojo, vi devas instrui ignorante la malamon.

Kaj estas senutile, ke vi ŝajnigas vin scipova eĉ pri instruoj de aliaj sektoj kaj la ekster-budhismaj. Kiam oni demandas pri io de alia sekto, tute ne gravas, eĉ se vi respondas “Mi ne scias”. Sed multaj homoj hontas al si kaj antaŭ alies okuloj, ke ili ne scipovas tion. Pro tio ili vaste studas en- kaj ekster-budhismajn instruojn, eĉ laikajn aferojn, kaj aludas sian vastan scikonon al la aliaj. Plej evitinda! Tute ne utila por lerni la vojon! Dume estas malfacile afekti ne scianta tiun, kiun vi fakte scias. Kaj se vi hezitas diri, ŝajnas al la aliaj, kvazaŭ troviĝus io sekreta. Ankaŭ tion vi evitu. Do, dekomence ne scii estas la unua solvo.

De kiam mi estis knabo, mi ŝatis lerni la historion de Ĉinio. Kaj ĝis mi vizitis Song (=Ĉinio), mi legis diversajn librojn, lernis eĉ la dialekton (=lingvo en la sud-orienta Ĉinio), kvankam tiuj estis necesaj por lerni la instruon kaj vivi en la ali-lingva lando, tamen, nun mi pensas, ke tiuj estis malhelpoj por la voj-lernado.

Kiam oni legas libron, li povas kompreni la signifon laŭ la teksto. Sed mi unue ekzamenas la esprimon de la frazoj, ĉu bon-stila aŭ ne, kaj poste mi serĉas la signifon. Sed estas plibone, ke mi dekomence komprenu la signifon. Eĉ kiam mi skribas pri la instruo, mi foje ne povas daŭrigi pro lingvo-arto. Tion kaŭzas mia kulpo scianta la lingvo-arton. Kia ajn estas la stilo, vi povas skribi unu post alia laŭ via pens-fluo. Eĉ se posteuloj kritikus la skribaĵon malbona, sed se la enhavo havas rezonon, estas preferinde por la vojo, ankaŭ por la aliaj lernadoj.

Mi (=Doŭĝen) aŭdis: La forpasinta budhisto Kuŭami (japano) estis eminenta pri la esotera kaj ekzotera. Post ermitiĝo li apartenis al amitabanismo. Kiam iu mantristo venis kaj demandis pri la teorio de mantrismo, li respondis “Ĉion mi forgesis, nenion mi memoras.” Tio ĉi estas bona ekzemplo de la voj-iro. Ĉu li ne memoras eĉ iomete? Li nenion diris nerilatajn al sia nuna kredo. Tiele respondi estas prave al li, kiu nun voj-iras laŭ Amitabo, mi pensas.

Nun ankaŭ ni devas imiti lin. Se vi jam havas ali-sektajn sciojn, devas forgesi. Forgesi estas necesa por unu sola vojo. Des pli, de nun vi nepre ne lernu la aliajn! Aldone mi diru, la aŭtentika voj-serĉanto ne bezonas legi eĉ la vortojn kaj agojn de eminentaj zenistoj. Jam ne necesas mencii pri aliaj aferoj.

Vol. 3-10 (Nun multaj nialandanoj timas)

La majstro montris en vespera horo: Nun multaj nialandanoj timas siajn diraĵon kaj konduton, ĉar ili estas maltrankvilaj je sia faro, ĉu fari tion estas bone aŭ malbone, kaj kiel oni opinias pri mia faro ne nur nun, sed ankaŭ estonte. Sed tia timo estas tute sensenca, ne ĉiam la socia kritiko prave taksas vin. Kiel ajn oni kritikas vin, ne rilatas al vi. Se vi trovis ĝin bona laŭ budhismo, vi faru ĝin, sed se kontraŭa, ne faru. Tiamaniere pasigu la vivon. Vi ne bezonas timi, eĉ se oni diras ion ajn pri vi.

Ermitiĝo signifas, ke oni ne timas famon de laikoj. Vi nur lernu kaj praktiku laŭ vivmanieron de la eminentuloj, kaj kompaton de bodisattoj, estu modesta antaŭ nur ĉieluloj. Kaj kiam vi praktikas la budhan vojon, nenia probremo ekestos.

Sed se vi kondukis senhonte malbone, spite al socia justo, tio estas malbona. Vi nur strebu en budhismo ne timante kritikojn de aliuloj. En la instruo de Budho, kompreneble, troviĝas la artikoloj, kiuj deadmonas la lernantojn kondukti malbone.

La majstro plu montris: Ankaŭ en laika etiketo oni riproĉas senhontan konduton, kiun eĉ se neniuj vidas. Ekzemple, ŝanĝi vestojn, sidi aŭ kuŝi eĉ en malhela ĉambro. Vi devas kondukti dece kvazaŭ antaŭ alies okuloj en hera loko. Vi devas kaŝi, kiun vi devas kaŝi, honti, kiun vi devas honti antaŭ ĉieluloj. Tiujn deadmonojn vi trovas ankaŭ en la ŝilaro.

Pro tio la voj-irantoj ne konduku maldece sen-rilate, ĉu li estas en ĉambro aŭ ekstere, ĉu hele aŭ ne, ĉu vidata aŭ ne, tenante en la koro budhismon.

Vol. 3-11 ("Mi okupis min je budhismo ~")

Iun tagon lernanto demandis "Mi okupis min je budhismo dum jaroj, sed ankoraŭ ne sentis eĉ ioman ver-vekiĝon. Mi aŭdis, ke malnovaj antaŭuloj diris, ke '(por ver-vekiĝo) neniuj bezonas saĝon nek talenton. Ne utilas erudicion nek sagacon'. Se tio pravas, mi pensas, ke mi ne bezonas humiliĝi pro mia malalta kvalito. Volu montri. Ĉu troviĝas io ŝlosila aŭ la kor-pretigo (por ver-vekiĝi)?"

La majstro montris: Jes, vi pravas. Certe oni ne utiligas saĝon kaj altan talenton (por ver-vekiĝi), ne necesas sagaco nek lerteco. Kvankam tio estas vera, tamen, estas (granda) eraro, se oni gvidas lernanton fariĝi blinda, surda aŭ malsaĝa.

Ĉar (por ver-vekiĝi) oni ne uzas profundan studon nek apartan talenton, vi ne bezonas honti vian kvalitecon. La prava ekzerco estas facila. (Ver-vekiĝo troviĝas en alia direkto.)

Sed tamen! Fakte troviĝas ver-vekiĝintoj nur unu-du en la centoj da miloj da ekzercantoj eĉ en la viharoj de tiel granda Song (Ĉinio). De tio mi pensis, ke io aparta devas troviĝi. Nun mi povas diri. Nome, tio dependas, ĉu li havas fortan deziron aŭ ne. Neniuj, kiuj strebas lerni kun forta deziro, ne povas akiri la celon. Kiel pretigi la koron, kaj kion unue lerni. Tiujn mi diru jene.

Unue vi devas havi fortan deziron. Ekzemple, kiam vi deziras ŝteli valoran trezoron, konkeri fortan malamikon aŭ akiri noblan belulinon, devas ĉiam koncentri la koron al la celo, gvati ŝancon en diversaj okazoj. Se vi forte deziras, certe vi akiros la celatan. Se vi forte deziras tiel same kiel la ekzemploj, kiam vi strebas zen-sidi, kiam vi konsideras la zen-demandon, kiam vi demandas gvidanton, kaj kiam vi elkore petas ion, vi povos nepre trafi (birdon) sur alta ĉielo, nepre hoki (fiŝon) en profunda maro. Kiu povas momente fortranĉi la metempsikozon sen tiel profunda kor-decido!? Se vi havas tiel fortan kor-decidon, nepre vi akiros la ver-vekiĝon, senrilate, ĉu vi estas malsaĝa, malbon-kvalita, malakra aŭ mal-honesta.

Se vi jam decidis la koron, vi devas nur scii la malkonstantecon de la mondo. La malkonstanteco ne estas spozata imago, nek elknedita iluzio, sed estas vero antaŭ via okulo.

Vi ne bezonas serĉi la argumenton en la sanktaj sutroj kaj en la rezonadon. Iuj naskiĝas matene, iuj mortas vespere, homo vidita hieraŭ, jam hodiaŭ ne estas. Tiajn okazojn vi vidas kaj aŭdas ĉirkaŭ vi. Kvankam tiuj estas sortoj de aliaj homoj, tamen, vi imagu tion sur vi. Eĉ se vi ĝisvivis ĝis sepdek-okdek jaraĝo, iam vi devas morti.

Kiam vi rigardas vian vivon kun ĝojo kaj malĝojo, amo kaj malamo, kiom valoras la aferoj!? Vi (de nun) vivu nur por alies feliĉo (kiel budhisto). Ĉar por ni, maljunaj aŭ mezaĝaj, la restanta vivdaŭro estas ne tiel longa, kial ni povas esti maldiligentaj!?

Sed tiel pensi estas ankoraŭ malstrikte. Konsideru, kiel vi, ĉu ordinarulo, aŭbudhisto, vivos morgaŭ. Morgaŭ? Ne morgaŭ, sed post kelkminutoj vin atakus grava malsamo, kaj vi devus suferi en deliro, aŭ devus hazarde morti pro damaĝo far inferulo, aŭ renkontus rabiston aŭ murdiston. Vere la sorto estas malcerta.

Kiam ni pensas tiel, estas sence, ke oni planas diversajn vivmanierojn vane kalkulante la sencertan viv-longecon. Krom tio intencante malbonon kontraŭ aliuloj oni konsumas la (valoran) tempon. Tio ja estas plej malsaĝa vivmaniero!

Ĉar tiu ĉi logiko estas prava, tion Budho predikis al ĉiuj vivuloj, kaj la majstroj ankaŭ same. Konsekvence ni predikas same, kaj eĉ en vid-al-vida gvido ni instruas "Ĉio rapide ŝanĝiĝas. Grava estas ĉiutaga vivo." Tion vi devas ripete pripensi, kaj ne perdu la tempon nun pasantan por la lernado, ĉar la morgaŭo ne estas promesita. Se vi decidis la koron tiel, la posta vojo estas certe facila. Tute ne timu pri via kvaliteco nek saĝeco.

Vol. 3-12 (La kaŭzo, ke oni ne forlasas sin)

La majstro montris en vespera horo: La kaŭzo, ke oni ne forlasas sin de la laika mondo, estas rigardata, ke li amas sin. Sed verdire li ne amas sin, ĉar li ne havas la vidpunkton en longa distanco, aŭ li ne havis ŝancon renkonti eminentulon (kiu montras la veron de homa vivo).

Se vi volas havi honoron, celu esti laŭdata de malnovaj virtuloj kaj saĝaj posteuloj (sed ne de laikoj). Se vi volas havi meriton, celu la eternan trankvilon kaj regalon de diuloj (, sed ne la sekularan profiton kaj bonhavaĵon).

Vol. 3-13 ("Se mi povas koni la vojon matene, povas morti vespere.")

La majstro montris en vespera horo: Malnovulo diris "Se mi povas koni la vojon matene, povas morti vespere." (konfuceanismo). Ankaŭ nuntempaj lernantoj devas havi saman koron. Dum la kalpao (=longeco de vivdaŭro de universo) vivuloj multfoje vane naskiĝis kaj vane mortis. Vi ĉifoje (feliĉe) naskiĝis kiel homo, kaj feliĉe renkontis budhismon. Sed homo estas mortema, eĉ se vi ŝparus la vivon, ne povas longigi. Sed se vi oferus unu tagon, eĉ unu horon al budhismo, tio fariĝos la kaŭzo de eterna trankvilo (=nirvano).

Domaĝe estas vane pasigi tagojn kaj noktojn timante morgaŭan vivon, kaj oni ne forlasas sahaon (=laikan mondon), kiun li devas forlasi, ne laŭiras la budhan vojon, kaj vane pasigas tagojn kaj noktojn. Li decidu la koron morti pro malsato aŭ malvarmo, se li ne povas vivteni por morgaŭ. Unue li decidu la koron morti, se li povis lerni la budhan vojon por hodiaŭ. Sur tio estas certe, ke li povas akiri la vojon.

Kvankam li pretendas, ke mi forlasis laikan mondon, kaj lernas la vojon, tamen, eĉ se li lernados en mil kalpaoj kaj cent renaskiĝoj, se li subkore timas vestojn por somero kaj vintro, prizorgas la vivon por morgaŭ kaj venonta jaro, neniam li povos ver-vekiĝi. Povus troviĝi tia homo (ver-vekiĝinta en tia vivo), sed mi ne scias, ke tia ekzerco troviĝas en la instruo de budhoj.

Vol. 3-14 (Lernantoj devas pensi, ke iam vi devas nepre morti.)

La majstro montris en vespera horo: Lernantoj devas pensi, ke iam vi devas nepre morti. Kvankam rezone tio estas natura konsekvenco, tamen, antaŭ tio vi pensu almenaŭ, ke mi ne vane pasigu la tempon. Vi ne faru sensencaĵon, sed faru aferon utilan por la vivo. Kaj el la farindaĵoj la plej valora estas sekvi la vivmanieron de la antaŭuloj. Ceteraj faroj estas sensignifaj.

Vol. 3-15 (Se ni ne forlasus malnovan veston flikinte)

La majstro demandis: Se ni ne forlasus malnovan veston flikinte, tio estas la deziremo domaĝi. Sed se ni forlasus la malnovan, kaj uzus la novan, ankaŭ tio estas la deziremo avidi. Ambaŭ estas pekoj. Kiel vi faru?

Mi (=Eĵoŭ) petis. Volu montri, kiel mi devas pensi?

La majstro respondis. Se vi povas forigi deziremojn domaĝi kaj avidi en la koro, vi ne pekas. Preferinde estas plu uzi la malnovan flikinte, kaj ne avidi la novan.

Vol. 3-16 (Ĉu ni devas rekompenci al gepatroj)

Post vespera lekcio Eĵoŭ demandis: Ĉu ni devas rekompenci al gepatroj pro la favoro donita al ni?

La majstro respondis: Danki kaj fideli al gepatroj estas plej necese. Sed la rekompenco al gepatroj estas diferenca inter laiko kaj elirinto (=budhisto).

Kiel ĉiuj scias, laikoj estas fidelaj al gepatroj dum ili vivas, kaj ankoraŭ post la morto ili servas (laŭ 'La Sutro de Fideleco' –konfuceanismo).

Dume, elirinto estas tiu, kiu forlasis la favoron de gepatroj, kaj eniris en la budhan domon. Kaj en la domo ni ne limigas la dankŝuldon nur al la gepatroj, sed ankaŭ al la ĉiuj vivuloj, pensante, ke ili donas favoron profundan kvazaŭ tiun de la gepatroj. Kaj ni transdonas nian dankon en la darma mondo al ĉiuj vivuloj. Nome, ni oferas nin ne aparte al la gepatroj de ĉifoja vivo. Tio ne kontraŭas al la vojo.

Se ni estas diligentaj en la ĉiutaga ekzercado kaj lernado, tio ja signifas veran fidelecon en budhismo. Ceremonioj ka bonfaroj en la datrevenoj de mortinto estas nur por laika bezono.

La zen-lernanto devas klare scii la profundecon de la donita favoro de la gepatroj, kaj samgrade profunde scii la favoron fare de ĉiuj vivuloj. Oni aparte faras unutagan aldonan bonfaron por mortinto, kaj aparte okazigas datrevenan riton, sed ĉu tiuj estas vere Budhaj instruoj, mi dubas. La artikolo 'La tago de la mortinta familiano' en la ŝil-sutro estas adaptebla nur al laikoj, mi pensas. En la viharoj de Song (Ĉinio) budhistoj faras datrevenan riton por la mortintaj eminentuloj-gvidantoj, sed mi ne vidis samon por gepatroj.

Vol. 3-17 ("Mi naskiĝis kun malalta kvalito")

Iun tagon la majstro montris: Se iu diras "Mi naskiĝis kun malalta kvalito". Ne estas tiel, sed nur mankas al li la forta deziro ver-vekiĝi.

Oni diras, kiam oni falas de sur ĉevalo, dum la falado al li venas diversaj pensoj. Tiel same, okaze de granda atenco vundiĝi aŭ morti ĉiuj ajn forte funkciigas sian

tutan scikonon kaj instinkton. Tiam sen-rilate saĝa aŭ malsaĝa ĉiuj klopodas koni la situacion, kaj serĉas rimedon. Kiel tiu ĉi ekzemplo, vi hipotezu, ke vi mortus morgaŭ aŭ ĉi-vespere. Kaj kvazaŭ vi renkontus malbonan aferon, kiel eble intensive klopodu. Tio nepre ne alportos rezulton ne ver-vekiĝi.

Iu, kiu naskiĝis kun la malalta kvalito, sed rektanime ekzercas, pli rapide povas ver-vekiĝi, ol tiuj, kiuj estas kvalite akraj kaj saĝaj. Ekzemple, Ĉudapantaka, kiu estas (rekta) disĉiplo de Budho, kvankam ne povis memori eĉ mallongan sentencon, tamen, pro la forta deziro, povis ver-vekiĝi dum unu somero.

Vi vivas almenaŭ nun. Se vi volas ver-vekiĝi ĝis la morto, kaj strebos por ĝi, nepre vi ĉiuj senescepte povas ver-vekiĝi.

Vol. 3-18 (En la viharo de Song oni provizis rizon kaj tritikon)

Iun vesperon la majstro montris: En la viharo de Song oni provizis rizon kaj tritikon, sed iam la samganoj elektis nur rizon por manĝi. Iu zenisto skoldis tion “Eĉ se oni diskrevigus mian kapon, mi ne permesas elekti nur rizon.” Tiel li deadmonis per versaĵo. Nome, li volis diri, ke samgano ne manĝu elektinte nur bongustaĵon. Ni manĝu la bonajn bonajn, sed ne malamu la malbonajn. Ni manĝas por forigi malsaton, alivorte, nur apogi la vivon, kaj por daŭrigi ekzercadon per ofero de kredantoj kaj la vihara provizaĵo. Oni devas ne elekti manĝaĵon per bongusteco.

Nun, ankaŭ niaj samganoj devas tion imiti.

Tiam mi (=Eĵoŭ) demandis: Oni diras “Ĉar memo estas budho, oni ne serĉu budhon ekstere.” Kaj li firme kredis ĝin, forlasis la ĝisnunan lernadon kaj ekzercon. Kaj li volis vivi la tutan vivdaŭron farante bonfaron kaj malbonon laŭ sia denaska karaktero. Kiel vi opinias pri tio?

La majstro respondis. Lia opinio estas malakorda inter la rezono kaj la vortoj.

Se dirante ‘ne serĉu budhon ekstere’ li forlasis ekzercon kaj lernadon, tio signifas, ke li pensas, ke sen ekzercado li volas havi ian rezulton. Tio ne estas ‘ne serĉu budhon ekstere’. Li devas scii, ke la ekzerco kaj la lernado mem estas budhismo.* Li ne faru laikajn aferojn nek malbonfarojn, eĉ se li volas fari ilin en la koro, male pene sinekzerco, eĉ se la ekzercoj estas malfacilaj kaj suferigaj. Kaj eĉ se li akirus ian rezulton per la ekzercado, se li dekomence ne deziras budhecon, tio ja estas la signifo ‘ne serĉi budhon ekstere’.

La anekdoto, ke la zenisto Nanjue poluris tegolon akirante spegulon, montras, ke li deadonis la zeniston Mazu fariĝi budho.²⁵ Sed li ne negis zen-sidon.

²⁵ la ekzerco kaj la lernado mem estas budhismo; La zenisto Nanjue (ĉino) demandis la zeniston Mazu (ĉino), kiu zen-sidas. “S-ro! Kion vi esperas per zen-sido?” Mazu respondis “Mi volas fariĝi budho.” Nanjue prenis tegolon kaj komencis poluri. Mazu demandis “Kion vi faras?” Nanjue respondis “Mi volas fari spegulon.” Mazu diris “Oni ne povas fari spegulon el tegolo.” Nanjue rediris “Oni ne povas fariĝi budho.”

Zen-sidi estas budhisma praktikado. Zen-sidi realigas neni-faron.²⁶ Neni-faro estas originala memo. Krom tio ne troviĝas io dezirinda en budhismo.

Religio superas filozofion. -tradukanto

Vol. 3-19 (Multaj nuntempaj budhistoj diras)

Iun tagon post la privata gvido la majstro montris: Multaj nuntempaj budhistoj diras, ke ni vivu laŭ la moderna moro samkiel laikoj. Mi pensas, ke ne. Eĉ en laika mondo eminentuloj diras, ke asimiliĝi kun laika opinio signifas malhonorigi homojn. Ĉju-Jŭan (malnova ĉina politikisto) diris “Ĉiuj ebrias, nur mi sobras.” Li ne malaprobis snoban opinion, kaj fine sinmortigis en la riveron.

Budhismo estas kontraŭa al laika moro je ĉiuj flankoj. Laikoj ornamas la hararon, dume budhistoj razas la kapon. Laikoj tage kelkfoje manĝas, dume budhistoj nur unu fojon. Post ĉio budhistoj estas pli trankvilaj ol laikoj. Budhista maniero estas malsama al laika moro.

Vol. 3-20-1 (Por bone ordigi regnon ĉiuj, de la reĝo ĝis la plebo)

Iun tagon la majstro montris: Por bone ordigi regnon ĉiuj, de la reĝo ĝis la plebo, laboras en sia kariero. Kiam okupas postenon tiu, kiu ne rajtas okupi, tion oni nomas malorda reĝimo. Kiam la reĝimo estas rekonita de la ĉielo, la regno estas serena kaj la plebo estas trankvila. Por tio la reĝo ellitiĝas ĉiutage je la unua antaŭtagmeze, kai ĝi estas la tempo de la komenco de politiko. Labori estas malfacile ie ajn, nur nomo de profesioj kaj teknikoj estas iom aliaj. La reĝo aranĝas politikojn laŭ sia bontrovo, enketas precedencojn, kaj eltrovas lojalajn oficistojn. Kiam tiel ordigita regado estas agnoskita de la ĉielo, tiu regno estas nomata (bonorde) regata lando.

Se reĝo estas maldiligenta en sia tasko, tio estas perfido al la ĉielo, tiam la regno konfuziĝas kaj la plebo suferas. Krom la reĝo, ankaŭ ĉiuj korteganoj, oficistoj, militistoj kaj plebanoj respektive havas sian okupon. Kiam ili laboras sincere en sia tasko, ni nomas ilin ‘sinjoro’. Se ili perfidus, ricevos punon de la ĉielo.

Laikoj tiel laboras, ankaŭ la lernantoj ne pensu ripozigi sin eĉ momenton, pretekste, ke mi eliris de la familio kaj de la laika socio. Ripozri portempe similas al profito, sed poste vin atendas granda damaĝo. Ankaŭ budhistoj devas plenumi sian taskon en budhismo.

Por regi regnon reĝo enketas tradicion, kaj serĉas fidelulojn. Sed ĉar certa regrimedo ne estas, li mem devas elpensi novan sistemon, kaj pro tio foje li eraras. Dume por disĉiploj de Budho la malnovaj reguloj kaj skribaĵoj klare restas, kaj ankaŭ nun troviĝas eminentaj gvidantoj, kiuj heredis la metodon. Kaj ni havas kapablon

²⁶ neni-faro; Kiam la zenisto Jaŭŝan (ĉino) zen-sidas, venis lia instruisto Ŝĵitou kaj demandis “Kion vi faras? Jaŭŝan respondis “Neni-faron.” Ŝĵitou diris “Vi simple ripozas!” Jaŭŝan rediris “Simpla ripozo apartenas al homaj faroj.” Ŝĵitou demandis “Kio estas tiu neni-faro, kiun vi diras?” Jaŭŝan respondis “Nenio. Eĉ mil eminentuloj ne povas klarigi, kio estas neni-faro.” Tie, kie ne troviĝas homa faro, aperas la darma vero.

kompreni tiujn. Se vi sinekzercos sub antaŭuloj konsultante la heredaĵojn en la 4 agoj (=moviĝi, halti, sidi, kuŝi =etiketo de ĉiutaga vivo), nepre vi akiros la vojon.

Laiko volas havi sankcion de la ĉielo, budhistoj de Budho. Kvankam ambaŭ laboroj estas same malfacilaj, la budhista rezulto estas pli granda ol tiu de laiko. 'Unufoje akirita rezulto daŭras eterne'. En la koro de budhistoj devas troviĝi, ke li subigu sin al la koro de Budho, eltenante la suferojn dum unufoja efemera vivo por sia eterna trankvilo (=nirvano).

Kvankam mi ĵus diris 'suferon', budhismo ne devigas al la ekzercantoj senrezone suferigi la korpon (=negi asketadon), nek ordonas fari senrezonan aferon. Se ili observas la ŝilaron, kaj observas la tradician etiketon, la korpo ne suferas, la konduto fariĝas modera, kaj oni rigardas ilin simpatiaj. Sed ne alprenu vian kaprican opinion, vi nur obeu al la budhisma ortodoksa maniero.

Vol. 3-20-2 (Kiam mi restis ĉe la zen-viharo de Tjantong-ŝan en Song)

La majstro daŭre montris: Kiam mi restis ĉe la zen-viharo de Tjantong-ŝan en Song (Ĉinio), kaj kiam ĝia vihar-estro estis la zenisto Ĵuĝjing (ĉino), la samganoj zen-sidadis ĝis la dekunua horo vepere, kaj vekiĝis kaj komencis zen-sidadi je la dua kaj duono ~la tria horo. La zenisto mem partoprenis en ĝi. Eĉ unufojon li ne forestis. Dum la sidado multaj samganoj ekdormis. Rondirante la zenisto pugno-batis aŭ batis per sia sandalo la dormantajn sidantojn por veki. Kiam la samganoj ankoraŭ ne povis vekiĝi, la majstro frapis sonorilon, lumigis kandelon kaj tuj komencis prediki. "Kion vi faru vane dormante en la ekzercejo!? Kial vi eniris en la viharon? Rigardu! La reĝon, oficistojn! Kiuj ripozas en la laika mondo!? La reĝo laboras en sia tasko, la subuloj laboras sindone, kaj plebanoj ekspluatas la riz-kampojn per plugilo. Kiuj vivas ripozigante la korpon!? Vi eskapis de la laika socio, kaj enirinte en viharon, vane pasigas tempon! Por kio? 'Grava estas ĉiutaga vivo, ĉio rapide ŝanĝiĝas'! Ne nur zenistoj sed ankaŭ ali-sektanoj ordonas (diligente sinekzerci), ĉar oni povus malsaniĝi aŭ iel morti ĉi vespere aŭ morgaŭ. Vi almenaŭ nun vivas, sed dormante vane pasigas la tempon sen ekzercado! Plej malsaĝa vi estas! Pro tio budhismo degeneras. Kiam budhismo estis prosperanta, ĉiuj viharoj senescepte instruis zen-sidadi. Sed ĉar lastatempe oni ne gvidas lernantojn per zen-sido, budhismo maldensiĝis."

Per tia laŭlogika prediko la zenisto instigis la samganojn zen-sidadi. Tion mi rigardis de proksime. Nun vi, miaj lernantoj, komprenu lian gvid-manieron.

Kaj iam la subuloj de la majstro proponis "La samganoj povus esti lacaj. Iuj el ili malsaniĝus, aŭ eksiĝus pro longa sidado. Ĉu vi ne pensus mallongigi la tempon?"

La zenisto malkonsentis dirante "Ne estu tiel. Tiuj, kiuj ne havas la voj-koron, kaj estas maldiligentaj nepre dormos senrilate al la sid-horo. Male, tiuj, kiuj havas la voj-koron, kaj la diligentaj certe ĝojos la longigitan sid-horon. Kiam mi estis juna kaj postenis kiel vihar-estro en kelkaj viharoj, same instigis la samganojn, kaj foje pugno-batis la dormantajn sidantojn ĝis mia pugno krevus. Sed nun mi kadukiĝis, kaj ne povas sufiĉe bati ilin pro malfortiĝo. Pro tio nun ne kreskas bona budhisto. Kaj ĉar aliaj viharistoj ne-forte stimulas sidi, budhismo pli kaj pli degeneras. Miaflanke mi volas pli severe bati ilin." Tiel la zenisto Ĵuĝjing parolis.

Vol. 3-21 (Ĉu oni akiras la vojon per koro aŭ per la koro)

La majstro plu montris: Ĉu oni akiras la vojon per la koro aŭ per la korpo?

Ĝisnunaj budhistoj diris “Per la korpo ---”, kaj plue “Sed ĉar la koro kaj korpo estas unu (=ne du)” Do, ne estas klare, ĉu per la korpo oni akiras la vojon.

Nun mi (Doŭgen) diru, ke ni akiras la vojon per la koro kaj korpo kune. Kiam oni konsideras la vojon per la koro, estas malfacile akiri dum eĉ mil kalpaoj kaj mil renaskiĝoj. Sed apenaŭ tiam, kiam oni forlasis la koron, forĵetis ĝisnunajn sci-konon kaj komprenon, li povas akiri la vojon.

La anekdotoj de persiko²⁷ kaj ŝtoneto²⁸ montras ver-vekiĝi ‘per la korpo’.

Se jes, kiam ni forlasis la funkcion de la koro, kaj strebas en zen-sidado, la vojo fariĝos pli intima. Nome, por akiri la vojon taŭgas ĝuste ‘per la korpo’. Nun ni komprenis, ke ni devas rektanime zen-sidadi.

La volumo 4-a

Vol. 4-1 (Lernantoj devas forlasi sian koron kaj korpon)

La majstro montris: Lernantoj devas forlasi sian koron kaj korpon, kaj rektanime eniri en la budhan mondon.

Malnovulo diris “Antaŭen unu paŝon de sur la pinto de stango cent ŝakuojn alta.” Certe vi pensas “Mi mortos, se mi foriros de sur la tiel alta stango”, male vi forte alkroĉos vin al la stango. Sed tiu rakonto signifas, ke estas malfacile foriri de via profesio de vivtenado. Tamen, vi devas senhezite forlasi vin. Se ne, vi tute ne povas atingi la vojon, eĉ se vi severe lernas la vojon, kvazaŭ vi tuj forbalaus la fajron de sur la kapo. Vi devas senhezite forlasi la koron kaj la korpon.

Vol. 4-2 (Nun eĉ laikaj virinoj lernas)

Iam bikuino (=budhistino) demandis: Nun eĉ laikaj virinoj lernas budhismon. Dume, ĉar ni estas elirintoj, do, eĉ se ni iom erarus en la lernado, ni estas pardonitaj, mi pensas. Kiel vi opinias?

La majstro respondis: Via logiko ne estas prava. Laikaj virinoj, malgraŭ en sia pozicio, povus akiri iom en budhismo, sed se elirintoj ne havas la koron de elirinto, ŝi ne povas akiri eĉ iomete. Ne budhismo elektas homojn, sed homoj elektas budhismon. La kor-pretadoj de laiko kaj elirinto estas malsamaj. Se laiko havas la koron de elirinto, ŝi povas eliri el laika mondo (=eniri en darma mondo), sed se elirinto havas laikan koron, tio estas duobla eraro. La kor-pretadoj estas tiel malsamaj.

²⁷ persiko; La zenisto Lingjun (ĉino) vojaĝis en montaro. Kiam li ripozis, trovis foran vilaĝon kaj plenan persik-floraĵon, hazarde li ver-vekiĝis.

²⁸ ŝtoneto; La zenisto Ŝjangjan (ĉino) balais korton. Kiam ŝtoneto flugis kaj flapis banbuon, per ĝia sono li hazarde ver-vekiĝis.

Fari ne estas malfacile, sed malfacile estas bone fari. La ver-vekĝon oni aparte pendigus en la koro, sed bone realigi estas malfacile. 'Grava estas ĉiutaga vivo. Ĉio rapide ŝanĝiĝas.' Vi ne estu maldiligenta. Se vi diras, ke mi forlasis min de la laika socio, efektive vi devas vin forlasi. Nenion signifas la nominala forlaso.

Vol. 4-3 (Rigardante la laikan mondon)

La majstro montris en iu vespero: Rigardante la laikan mondon mi trovis, ke ĉiu, kiu estas feliĉa kaj ekhavas honoran nomon, estas honesta kaj bonkora al la aliaj. Pro tio li faras la familion trankvila, kaj liaj idoj ne degeneras. Dume tiu, kiu havas torditan koron, estas malhonesto al la aliaj. Eĉ se li estus feliĉa portempe, kaj tenus la nomon, devas suferi. Kaj eĉ se lia feliĉo daŭrus dum la vivo, al liaj idoj ne ĉiam daŭras la feliĉo.

Okaze oni faras bonfaron por la aliaj intencante, ke ili ĝoju. Kvankam tio estas pli bona ol fari malbonon, tamen, la faro, verdire, ne estas bonfaro, sed por sia profito. Fari bonfaron senscie de celata homo, kaj antaŭ-zorge por estonteco, aŭ anticipe fari por iu alia ja estas ver-sence bonfaro por la aliaj.

Des pli, la zen-lernanto devas havi la koron supera al tiuj kaŝitaj bonfaroj. Kiam li pensas pri vivuloj, ne dividi ilin intimaj aŭ ne, havu la koron egale savi en la sekulara kaj darma mondoj. Neniam atendu vian profiton. Faru bonfaron senscie de aliaj, ne celu ĝojigi superulon, kaj ne necesas esti konata de aliaj, ke vi havas tian korpretadon.

Se vi volas fariĝi tia homo, unue vi forlasu la laikan rilaton kaj vin mem. Se vi povas forlasi vin, vi ne plu havos la koron esti laŭdata de aliaj. Kaj male, eĉ se vi malzorgas la renomon, sed se vi kondutis malbone kaj vivus diboĉe, tio kontraŭas al la budha koro. Faru bonfaron kaj aranĝu vin por alies merito, sed ne deziru vian renomon. Elkore sen-profite faru nur tion, kion vi povas fari en la kuranta vivo. Tio ĉi ja estas la unua paŝo por forigi vin de la laika sento.

Se vi volas fariĝi tia homo, unue sciu la malkonstantecon de la mondo. La vivdaŭro similas al sonĝo, la tagoj pasas sage. Ĉar la vivo kvazaŭ rosa ne povas atendi morgaŭon, Almenaŭ dum vi vivas, klopodu por la aliaj eĉ per malgrandaj bonfaroj. Tio signifas, ke vi sekvas la budhan koron.

Vol. 4-4 (La voj-lernantoj nepre devas esti malriĉaj.)

Iun vesperon la majstro montris: La voj-lernantoj nepre devas esti malriĉaj. En la laika mondo certe venas al riĉuloj du malfaciloj t.e. la kolero kaj honto. Kiam oni havas riĉaĵon, alia volas ĝin rabi, kaj la havanto kontraŭas, tiam tuj naskiĝas koleroj (inter ambaŭ). Okazos disputo, poste proceso, kaj fine kverelo kaj batalo. Nepre tiel venos kolero kaj honto. Kiam oni estas malriĉa kaj ne dezirema, ne venas al li la du malfaciloj. Li estas trankvila kaj libera. Pri tio vi povas vidi fakton antaŭ la okuloj (Doŭĝen mem estas bona ekzemplo), do, ne bezonas serci instruon en libroj. Kaj teni riĉaĵon klaĉas ne nur malnovaj eminentuloj, sed ankaŭ postaj saĝuloj, rikanas budhoj kaj majstroj. Havante riĉaĵon esti malsaĝa kaj kolera estas la plej hontinda en hontoj. Tiu, kiu estas sen riĉaĵo sed serĉas la vojon, estas respektata de malnovaj saĝuloj kaj postaj sanktuloj, kaj aprobita de budhoj kaj ver-vkiĝintoj.

Kiel vi vidas, budhismo degeneras iom post iom. (Ekzemple,) Kiam mi unue eniris en la viharon Ken'nin-ĵi, kaj de post sep-ok jaroj la sintenoj de la lernantoj ŝanĝiĝis. Nun ili havas ŝrankon en sia ĉambro, kolektas ilaron, ŝatas belajn vestojn, portas havaĵon, parolas maldece, kaj ignoras la regulajn salutojn. Per tiuj mi povas supozi, ke la degenero same okazas ankaŭ en aliaj viharoj. Budhistoj devas ne havi ilaron krom la tri vestoj kaj bovlo. Por kio ili havas ŝrankon!? Ili ne havu aĵojn, kiujn ili devas kaŝi de alies okuloj. Male, ne havi estas komforte.

Kiam oni pensas 'Eĉ se mi murdus iun, mi ne volas esti murdita', tiam li devas ĉagreniĝi kaj esti singarda. Sed se li decidis la koron 'Eĉ se oni murdus min, mi ne venĝos', tiam li ne bezonas esti singarda, nek timi rabiston. Por ĉiam li ne estas maltrankvila.

Vol. 4-5 (Kiam la ĉina zenisto Hajmen estis ĉef-viharisto)

Iun tagon la majstro montris: Kiam la ĉina zenisto Hajmen estis ĉef-viharisto sur la Monto Tjenton-ŝan, troviĝis en la samgo la budhisto Jŭan. La budhisto Jŭan jam vervekiĝis, kaj la saĝeco superus eĉ la ĉef-vihariston.

Iun vesperon la budhisto Jŭan venis al la ĉambro de la ĉef-viharisto, kaj post formala saluto li petis "Volu postenigi min al la ĉefo de la interna halo, mi petas."

La ĉef-viharisto respondis kun larmoj "Mi neniam aŭdis, de kiam mi estis knaba novulo, ke oni postulis la postenon estante kiel zenisto. Vi jam superis eĉ min kiel vervekiĝinto. Malgraŭ tio, vi postulas la postenon. Ĉu vi volas promociiĝi? Mi povas postenigi vin al la ĉefo de la fronta halo, eĉ al la ĉef-viharisto. Ĉar eĉ vi deziras postenon, jam ne necesas sondi la koron de aliaj ordinaraj lernantoj. --- Per tio ĉi sciigās la degenero de budhismo." La ĉef-viharisto tiel lamentis. Tiam la budhisto Jŭan hontis kaj retiris la peton, sed la ĉef-viharisto postenigis lin kiel la ĉefon de la interna halo. La budhisto Jŭan notis sur papero por ne forgesi sian hontaĵon kaj memori la valoran vorton de la ĉef-viharisto Hajmen.

Nun mi pensas, ke malnovuloj hontis voli promocion, fariĝi ĉefo (kvazaŭ laikoj). Vi deziru nur vervekiĝon, ne zorgu pri aliaj aferoj.

Vol. 4-6 (Post la surtroniĝo la reĝo Taj-zong de Tang)

Iun vesperon la majstro montris: Post la surtroniĝo la reĝo Taj-zong de Tang (Ĉinio) loĝis en malnova palaco. Pro la difektetoj ĝi estis humida, kaj vento kaj nebulo malbone efikus al la reĝa korpo. Sed kiam vasaloj proponis al li fari novan palacon, la reĝo respondis "Nun estas terkultur-sezono, plebo devas esti okupata, ni atendu aŭtunon. Se mi malsaniĝus de humideco, tio signifas, ke min ne akceptas la tera dio, kaj se mi malsaniĝus de vento kaj pluvo, tio signifas, ke min ne aprobas la ĉiela dio. Se ambaŭ dioj ne permesas min, mi certe pereos. Ne ĉagreni plebon povas esti akceptata de la tera dio, mi pensas. Kaj se la ĉiela dio akceptis min, la vento kaj pluvo ne atakos min." Li plu loĝadis en la malnova palaco.

Same kiel la reĝa sinteno, budhistoj devas prizorgi ĉiujn vivulojn kvazaŭ sian sol-filon laŭ budhisma tradicio. Vi devas ne skoldi nek turmenti viajn subulojn, nur ĉar ili apartenas al vi. Des pli, vi devas respekti kaj servi al la kolegoj, antaŭuloj kaj pliaĝuloj kiel budhoj. Estas tiel klare skribite en la ŝil-sutro. Pro tio vi devas aranĝi

ĉion por la bono de aliuloj, eĉ se oni ne rimarkas tion de ekstere, ne dividante en la koro, ĉu li estas superulo, subulo, intima aŭ ne. Kaj vi devas ne ĉagreni nek vundi alies koron ial ajn.

Kiam Budho vivis, troviĝis homoj, kiuj kalumnias aŭ malamas Lin. Lia disĉiplo demandis “Bagavato nia! Ĉar Vi estas karaktere tiel milda, kaj havas kompaton en la koro. Do, ĉiuj vivuloj devas respekti Vin. Volu montri, kial troviĝas tiuj, kiuj ne obeas al Vi?” Budho respondis “En la antaŭa vivo, kiam mi gvidis disĉiplojn, mi ilin skoldis kaj severe edukis. Pro tio nun ili estas spitemaj.” Tiu ĉi epizodo troviĝas en la Vinaja Pitako.

La epizodo montras, ke vi ne skoldu per sovaĝaj vortoj okaze de edukado al disĉiploj, kiam vi gvidos ilin kiel vihar-estro aŭ superulo. Kiam vi edukos ilin per ĝentilaj vortoj, iuj komprenos vin, kiuj povas kompreni. Dekomence la budhaj filoj (=budhistoj) devas ĉesi malami kaj persekuti per sovaĝaj vortoj la fratulojn kaj konatojn intimajn kaj ne-intimajn.

Vol. 4-7 (La lernantoj devas observi la kor-pretadon de Budho.)

Kaj la majstro montris: La lernantoj devas observi la kor-pretadon de Budho.

La unue lernenda estas ne deziri bonhavaĵon. Kiam mi sondis la profundan kompaton de Budho, mi trovis, ke ĉiuj faroj kaj agoj de Budho estis nur por la disĉiploj. Li faris nenion malutilan por ili. Origine Li estis destinita kiel la sankta reĝo de la mondo. Pro tio Li povus disponi ĉion ajn en la mondo laŭ sia volo. Se Li volus, Li povus subteni la disĉiplojn per la havaĵo kaj protekti en sia propra regno. Kial Li ne tiel faris, sed almozadis? Ĉar por restigi meriton al la disĉiploj nuntempaj kaj tiuj en la degenera periodo. Li ne akumulis havaĵon por Si, sed vivis per almozado²⁹. De tiam la majstroj kaj konataj budhistoj en Hindio kaj Ĉinio estis malriĉaj kaj almozadis samekiel Lia vivtenado.

Pro tio niaj antaŭuloj rekomendis al ni ne akumuli havaĵon. Kiam oni laŭdas nin, zenistojn, unue laŭdas la sen-havan vivmanieron, kaj ankaŭ historiistoj laŭdas samon skribinte en historiaj dokumentoj. Mi ankoraŭ ne aŭdis, ke oni sinekzercis kun bonhavaĵo. Tiuj, kiuj estis konataj kiel respektindaj budhistoj, vivis kun ĉifona vesto, kaj ĉiam almozadis. Oni ekdiris, ke troviĝas bonaj budhistoj en zen- ekzercantoj. Kaj kiam zen-lernantoj loĝas en alisektaj viharoj, oni laŭdis ilin, ke ili forlasis sin kaj esais malriĉaj.

Tion ni devas scii kiel nian tradicion. Vi ne bezonas konsulti sutrojn por konstati, ĉar iam mi (=Doŭgen) mem posedis riz-kampojn ankaŭ bonhavaĵojn. Sed komparante tiam kaj nun, en kiu mi vivas kun nur la tri vestoj kaj bovlo, mi povas diri, ke nun mi estas pli sana je la koro kaj korpo. Tio estas reala atesto antaŭ vi.

La majstro daŭre montris: Malnovulo diris “Ne komentu homon nesciante lian personecon.” Tio signifas, ke oni ne kritiku homon nesciante nek enketinte lian virtecon. Ne diru “kvankam li estas respektinda, sed li faris tian malbonfaron.” kaj “Eĉ tia bona homo faras malbonon.” Vi nur alprenu lian bonan flankon, sed ne la

²⁹ almozado; Budho volus diri, ke malriĉeco taŭgas por ekzerci sin per budhismo, male riĉaĵo kondukas la lernantojn al maldiligentemo. -tradukanto

malbonan. Oni diras proverbe “Nobla homo vidas nur la virtecon, sed ne la eraron”. Ankaŭ ni estu tiaj.

Vol. 4-8 (Homoj praktiku nepre kaŝitan bonfaron.)

Iun tagon la majstro montris: Homoj praktiku nepre kaŝitan bonfaron. Por la bonfaro li nepre ricevos kaŝitan protekton (de ĉielo) kaj videblan meriton.

Vi devas riverenci budhan statuon, eĉ se tiu estas malbon-kvalita el koto aŭligno. Vi devas respekti kaj danki la sutrojn, eĉ se ĝiaj paperoj estas maldelikataj.

Kaj vi devas respekti budhiston eĉ se damnindan. Se vi komplezas lin aŭ sutron kun kredo en la koro, vi nepre ricevos videblan meriton. Male se vi ne kredas kaj traktas malkompreze lin aŭ sutron, nepre ricevos punon. Ili estas budhaj figuroj, kiujn la Budho restigis al vivuloj por la feliĉo. Pro tio se vi respektas ilin, vi ricevos meriton, sed se ne, vi ricevos punon. Eĉ se ili estas tre mizeraj, vi devas respekti la figurojn de la tri juveloj.

Inter zenistoj foje troviĝas tiuj, kiuj ŝatas malbonfaron dirante, ke zenisto ne bezonas fari bonfaron nek virton. Sed tio estas plej damninda. Mi neniam aŭdis de antaŭe, ke oni ŝatas malbonfaron.

La zenisto Danŝa Tjanĵan bruligis lignan statuon de budho.³⁰ Tio ja ŝajnas klara malbono, sed estas unu el eduk-metodoj (al disĉiploj).

Laŭ lia biografio, lia sinteno estis modesta: Por sidi kaj stari li ĉiam observis etiketon, kvazaŭ li akceptus noblan gaston. Kiam li sidas, ĉiam sidis kvazaŭzen-sido eĉ en mallonga tempo. Kiam li staras, ĉiam kunmetis la manojn laŭ zen-metodo. Kiam li gardas provizon de viharo, kvazaŭ siajn okulojn. Kiam kolegoj sinekzercas, ĉiam li partoprenis. Eĉ malgrandan bonfaron li alte taksis. Eĉ en sia ĉambro li dece kondutis. Pro tio oni notis liajn kondutojn, kaj faris de ĝi la modelon de la zen-vivado.

Ne nur li sed ankaŭ ĉiuj voj-akirintoj, ĉiuj ver-vekiĝintoj observis la ŝilaron, alprenis la (tradician) etiketon. Eĉ malgrandan bonfaron ili alte taksis. Mi neniam aŭdis, ke iamaj zenistoj ignoris bonfarojn.

Pro tio se vi volas sekvi la zenistojn, neniam ignoru bonfarojn, kaj kredis ilian instruon. Ĉe la voj-iro de la altaj zenistoj nepre kolektiĝas diversaj meritoj. Kiam vi komprenis, ke ĉio en la mondo apartenas al Budho (=darmo), vi povas distingi, ke malbono estas ial ajn malbono for de la budha volo, dume bono estas ial ajn bono, kaj ŝanco renkonti la budhan vojon. Vi sciu. Ĉar ĉio estas tiel aranĝita, vi ne povas respekti la figurojn apartenantajn al la tri juveloj.

Daŭre la majstro montris: Se vi volas sekvi la vojon de la majstroj, ne atendu, ne deziru, ne profitu. Kaj sen ia gajno faru tiujn, kiujn faris antaŭaj budhistoj, kaj vivu tiel, kiel vivis la zenistoj. Fortranĉu la deziroman koron, kaj ne esperu fariĝi budho.

³⁰ bruligis lignan statuon de budho; Iam tre malvarman matenon la zenisto Danŝa bruligis lignan statuon de budho por sin varmigi. Oni riproĉis lin. Li respondis “Mi volas preni ŝariron (= sanktan osteton)”. Por la rebato “Oni ne povas preni ŝariron el ligna statuo!” li respondis “Se vi pravas, nenia malbono okazos.”

Sed se vi ĉesus la ekzercadon, kaj restas en laika sento, tiam vi ree enfalos en deziremon, kaj stagnos en kava fundo.

Do, neniom atendu propran meriton, sed esperu fariĝi servanto de homoj kaj ĉieluloj. Ĝustigu vian vivmanieron estante budhismo. Cerbumu kiel servi homojn. Ŝatu kaj praktiku bonfarojn, kaj forlasu malbonojn (el la koro). Kaj ne haltu ĉe nuna bonfaro. (oni ne haltu ie ajn sur la vojo sed ĉiam marŝu antaŭen. -tradukanto) Tiel pensu kaj praktiku dum la vivdaŭro. Tion malnovuloj diris 'frakasi fundon de lakita sitelo' (=difekti tenebron). La vivmaniĉelo de la malnovaj eminentaj zenistoj estis tiaj.

Vol. 4-9-1 (La lernanto, antaŭ ĉio, devas esti malriĉa.)

Iun tagon budhismo venis kaj demandis pri la kor-pretado por lerni budhismon.

La majstro montris: La lernanto, antaŭ ĉio, devas esti malriĉa. Se li estas riĉa, nepre perdos la volon lerni. Okaze de laika voj-lernanto, ĉar li estas obsedita de bonhavaĵo, persistas teni la loĝejon, kaj interrilatas kun la parencoj, eĉ se li havas fortan deziron (lerni budhismon), multe venas obstakloj kontraŭ la voj-irado. Kvankam de antaŭe multaj laikoj eklernas budhismon, kaj el ili troviĝas bonaj lernantoj, sed ili ne estas kompareblaj al la (profesiaj) budhistoj. Budhistoj, kiuj ne portas havaĵon krom la tri vestoj kaj bovlo, estas indifarentaj pri la loĝejo, kaj ne estas postulemaj je la manĝaĵoj kaj vestoj, sed rektanime lernadas. Pro tio budhistoj povas havi meriton respektive, ĉar ili estas intimaj kun la vojo per la malriĉeco.

Sinjoro Pang (ĉino) estis laiko, sed kalkulita kiel zenisto. Anekdoto pri li restas. Kiam li decidis eklerni budhismon, li estis preta forĵeti sian tutan havaĵon en la maron. Oni detenis lin dirante "Vi povas donaci la havaĵon al iu ajn, aŭ utiligi ĝin por la lernado." Li respondis "Mi decidis forĵeti ĝin trovinte, ke ĝi estas malutila (por budhismo). Kial mi povas doni la malutilan al alia homo!? Havaĵo estas malbono, kiu ĉagrenas la koron kaj korpon." Kaj fine li forĵetis la havaĵon. Post tio li vivis farante kaj vendante korbojn. Kvankam li estis laiko, tamen estis nomata kiel zenisto, ĉar li forĵetis la havaĵon antaŭ la eklerno. Des pli, vi, budhismo nepre devas forlasi la havaĵon.

Plu demandis la budhismo: En Ĉinio troviĝas viharo (en kiu oni povas loĝi), komuna havaĵo (por la lernantoj) kaj provizaĵo (de la viharo). Nome, tiuj ĉi estas subtenaĵoj de la lernado. Pro tio la lernantoj ne bezonas timi pri la vivado. Dume, en nia lando tia kutimo ne troviĝas. Pro tio, se oni ne prizorgas la lernantojn, io malorda okazus sur la voj-irado. Estus pli bone, se ni havas donantojn de viv-tenaĵoj. Kiel vi opinias?

La majstro respondis: Ne estu tiel. Kompare kun ĉinoj nialandanoj emas oferi eĉ sen-kialo, foje donacas pli ol sia kapablo. Mi ne scias, kiel opinias aliuloj, sed miaflanke mi sciis tion de mia sperto. Jam pasis pli ol dek jaroj, de kiam mi komencis sinekzerca sen ia preparaĵo. Grave estas decidi la koron sen-havi propriaĵon. La naturo nepre donas almenaŭ minimuman necesaĵon por plu vivi. Homoj denaske havas sian porcion por la vivdaŭro, kiun donas la ĉielo kaj la tero. Pro tio oni ne bezonas kuri tien kaj reen serĉante la vivtenaĵon. Des pli, la budhaj lernantoj povas ricevi de Budho la heredaĵon, kiun ili povas ricevi, eĉ se ili ne postulas. Se vi sinekzercas

rektanime en la budha vojo, tio estas natura vivo. Tio ĉi estas la fakto antaŭ viaj okuloj. (Mi estas tiu ekzemplo.)

Vol. 4-9-2 (La voj-lernantoj probable dirus "Se mi --)

Kaj la majstro montris: La voj-lernantoj probable dirus "Se mi farus tion, certe laikoj kritikos." Tio ĉi estas granda eraro. Eĉ se laikoj kritikus iel ajn, vi devas fari tion, se tio estas prava laŭ la agoj de zenistoj aŭ laŭ la instruoj. Male, eĉ se ĉiuj laikoj laŭdus tion, vi devas ne fari ĝin, se ĝi kontraŭas al la agoj de zenistoj, aŭ al la rezono de la instruoj.

Kial mi povas diri tiel? Ĉar neniuj savos vin, kiam vi mortas kaj enfalos en narakon, eĉ se vi flate sekvis ilian opinion. Kiom ajn laikoj kalumnius vin, se vi sinekzercas laŭ la antaŭuloj, la ĉieluloj certe savos vin. Pro tio vi devas voj-iri spite al la kalumnio de laikoj.

Ne ĉiuj kritikantoj scipovas budhismon, kaj ne ĉiuj el ili ver-vekiĝas. Kial ili povas juĝi la budhan vojon bona aŭ malbona!? Vi ne sekvu la laikan senton. Se vi trovis rezonon fari, vi rektanime faru (laŭ budhismo).

Vol. 4-10 (Mi nun havas maljunan patrinon.)

Kaj iu budhisto demandis: Mi nun havas maljunan patrinon. Mi estas ŝia solfilo, kaj ŝi vivas per mia enspezo. Ŝi profunde amas min, kaj mi volas esti fidela al ŝi. Pro tio mi ankoraŭ havas laikajn konatojn, kaj dank' al ili mi povas servi al ŝi vivtenaĵon. Se mi ermitiĝos, ŝi ne povos plu vivi. Pro tio mi ankoraŭ vivas inter laikoj, kaj estas tre malfacile eniri en la pordon de budhismo. Volu montri, se troviĝas rezono eniri en budhismon spite al tia kondiĉo?

La majstro montris: Estas malfacile respondi. Neniu povas solvi la demandon krom li. Li mem devas zorgi la aferon. Se li elkore volas sinekzerci, li preparu iel ajn por la patrino. Kaj post tio li povas trankvile sinekzerci. Se li aranĝas tiel, estas feliĉe por ambaŭ. Fortan malamikon, noblan belulinon aŭ mirindan trezoron li povas akiri, se li elkore deziras, nepre troviĝas ia rimedo. Kaj lia deziro nepre plenumiĝos per la kaŝita helpo de la ĉielaj kaj teraj dioj.

La sesa sukcedanto Daĝĵan (ĉino) estis hakisto. Tiam li nutris la patrinon vendante brul-lignon. Iun tagon li aŭdis en bazaro, ke oni recitas la sutron Vaĝra Praĵña Paramito, kaj li decidis eniri en la budhan domon. Kaj foririnte de la patrino li vizitis la zeniston Daman. Oni diris, ke tiam li preparis 30 rjou-ojn (=mon- unuo) por la patrino. Pro lia forta deziro lerni budhismon la ĉielo donacis la monsumon, mi supozas. Vi serĉu la rimedon en diversaj direktoj. Tio ĉi estas unu el la solvoj.

Se li eniros en la budhan domon, post kiam la patrino mortis, tio estas bonorda. Sed estas ne certe, ke maljuna homo plifruue mortos ol la juna. Okazus, ke lia patrino longe vivus, male li forpasus plifruue. Tiam li pentos ne ermitiĝi, kaj la patrino grave pekas ne permesi tion. Tie ne troviĝas merito por ambaŭ, male ricevos punon. Kiom li pentus en tia okazo!?

Se li elirus forlasinte laikan vivon, enirus en la budhan domon, kaj tion permesus la patrino, tiam eĉ se ŝi malsate mortus, ŝia granda ofero fariĝos la plejbona motivo por la ver-vekiĝo, mi pensas. Post multfojaj renaskiĝoj ni ĉifoje vivas kiel homo, kaj

(nun feliĉe) renkontis budhismon. Se ni povas forlasi la malfacile forlaseblan fidelecon kaj amon (de gepatroj) por budhismo, ni povas fariĝi aŭtentikaj rekompencantoj. Kial tio ne akordas al budha volo!? Oni diras, kiam filo fariĝas budhisto, 7 liaj antaŭaj generacioj povas eniri en nirvanon. Kaj de aliflanke, oni diras, kial oni senfare pasigas la vivon ignorante la semon de la eterna trankvilo. Por la problemo, kiel fari kun la patrino, li mem devas trovi la solvon.

la volumo 5-a

Vol. 5-1 (La lernantoj ne algluiĝu al sia kompreno.)

Iun tagon post la leciono la majstro montris: La lernantoj ne algluiĝu al sia kompreno. Eĉ se vi pensas, ke mi sufiĉe komprenis tion, sed troviĝus io ne sufiĉa parto, aŭ troviĝus plibona klarigo. Pensante tiel vi demandu eminentulojn aŭ konsultu malnovajn dokumentojn. Dume, eĉ se la klarigo estas tiu de antaŭulo, vi ankaŭ ne algluiĝu al ĝi, ĉar ankaŭ ĝi estus erara. Eĉ se vi pensas, ke vi jam akiris bonan konkludon de kredebla antaŭulo aŭ de sutro, sed se vi trovis pli bonan difinon, vi alprenu la plibonan.

Iam, kiam iu altranga budhisto vizitis la zeniston Nanjang (ĉino), la zenisto demandis la budhiston "Kia estis la koloro de herboj en la suda regiono?" Li respondis "Ĝi estis flava." La zenisto demandis samon al apuda paĝio (, kiu kune vizitis la sudan regionon). La paĝio respondis same "Ĝi estis flava." La zenisto diris al la unua "Via kompreno ne superas tiun de la paĝio. Vi respondis 'Flava.', ankaŭ la paĝio respondis 'Flava.' Nome, ambaŭ havas saman komprenon. Do, kiel konsultanto ankaŭ la paĝio havas la rajton rekte respondi al la reĝo. (Tiutempe nur altranguloj havas rajton rekte respondi al la reĝo. -tradukanto). Via kompreno ne superas ordinarecon."

Poste oni diris "Lia kompreno ne superas ordinarecon. Pri kio li kulpis? Li respondis veran koloron same kiel la paĝio. Li ja estas aŭtentika saĝulo.", tiel dirinte li ne alprenis la kritikon de la zenisto.

Per tiu ĉi rakonto ni povas scii, ke ni elektu ĝustan logikon ol rutine citi diraĵon de malnovuloj. Dubi diraĵon de antaŭuloj ne estas rekomendinde, sed algluiĝi al ne-kredebla afero, kaj ne demandi pri la demandinda estas malbone.

Vol. 5-2 (La unue lernenda temo por la lernantoj)

Kaj la majstro montris: La unue lernenda temo por la lernantoj estas forlasi la opinion, ke ekzistas memo. Forlasi la opinion estas ne obsedi al si mem. Eĉ se oni ellernis la predikon de ĉiuj malnovuloj, kaj senĉese zen-sidas kun firma volo, sed se li ne povas forigi la obsedon, li ne povas atingi la vojon, eĉ se kiomfoje li renaskiĝos.

Eĉ se li mastrus la sutrojn la duagradajn kaj unuagradajn aŭ esoteran kaj ekzoteran, se li ne forigis la memon, tio similas al tio, ke li kvazaŭ kalkulus alies trezoron, sed al li neniom.

Espereble, ke vi trankvile sidiĝu ,kaj konsideru vian korpon laŭrezone. Nome, la komenco de via korpo estis nur du gutoj el la gepatroj. Kiam la spiro haltis, la korpo disiĝas sur kampon, kaj fine fariĝas koto. Por kio vi devas obsedi al sia korpo!?

De flanke de la darmo, la korpo estas neperfekta kolekto de 18 elementoj (=6 objektoj, 6 organoj kaj 6 perceptoj). Kiu el ili estas via memo? Kvankam la klarigo de la sektoj estas malsamaj, tamen estas tute same, ke ili diras, ke neniu povas scii sian viv-komencon kaj la morton, kaj sub ambaŭ konceptoj lernantoj sinekzercu. Se vi povas kompreni la sen-memon, budhismo fariĝas vere klare videbla al vi.

Vol. 5-3 (Kiam oni iras en nebulo)

Iun tagon la majstro montris: Malnovulo diris “Kiam oni iras en nebulo, senscie la vesto malsekiĝas.” Tiel same, se vi estas intima al bonulo, senscie vi fariĝas bona.”

Iam antaŭe estis paĝio ĉe la zenisto Jupjan (ĉino). Kvankam la paĝio ne lernis nek sinekzercis en budhismo, tamen ĉar longe vivis apud la zenisto, li senscie ver-vekiĝis. Se ankaŭ vi longe sinekzercos, iam hazarde ver-vekiĝos, kaj trovos, ke la zen-sido estas ĝusta metodo de budhismo.

Vol. 5-4 (En la lasta vespero de la decembro de Katei la dua)

En la lasta vespero de la decembro de Katei la dua (=pk 1236) la majstro Doŭgen nomis Eĵoŭ-on kiel la ĉef-lernanton (samtempe kiel ĉef-asistanton) en la viharo Koŭŝoŭ-ĵi. Post la liber-vola lekcio la majstro petis Eĵoŭ-on lekci anstataŭ la majstro. Nome, tio estas la unua posteni iun kiel la ĉef-lernanton en la viharo.

Tiama lekcio de la majstrio estis la historio de la zen-skolo. Nome, la unua zenisto (en Ĉinio) Bodidarma venis de Hindio (pk 527), kaj zen-sidadis antaŭ la muro en la viharo Ŝjaŭlin por atendi la ŝancon disvastigi zenismon. En la decembro de tiu jaro venis Ŝengŭang (ĉino). Trovinte en li mirindan talenton la zenisto intime gvidis lin. De tiam la instruo (=zeno) kaj kaŝajo (=zenista kostumo kiel la atesto de la heredo) estis hereditaj. Pro tio la zen-budhismo vaste koniĝis (en Ĉinio), kaj daŭras ĝis nun.

Mi (=Doŭgen) unuan fojon nomis la ĉef-lernanton kaj ordonas la unuan lekcion fari anstataŭ mi. Vi (=Eĵoŭ) ne hontu, ke la aŭskultantoj estas malmultaj, kaj ne timu vin kiel komencanton. Okaze de la zenisto Fenjang (ĉino) ĉeestis nur ses-sep lernantoj, la zenisto Jaŭŝan (ĉino) vidis malpli ol dek lernantojn. Sed oni diris “(Malgraŭ la malmulteco de ĉeestantoj), ke ili praktikas la budhan vojon, kaj budhismo prosperas.”.

Ĉu vi memoras la anekdotojn³¹?

Oni ver-vekiĝis per la sono de banbuo, kaj la alia klare vidis la koron per floraĵo de persiko. Ĉu banbuo estas sagaca, aŭ ver-vekiga? Ĉu floro estas profunde pensiga, aŭ saĝa? Floro floras ĉiujare, sed ne ĉiuj vidantoj povas ver-vekiĝi. Banbuo foje sonas, sed ne ĉiuj aŭdantoj povas koni la vojon. Nur tiuj, kiuj longtempe tutkorpe ekzercis kaj tutkore serĉis la vojon, povas havi la ŝancon de ver-vekiĝo.

³¹ la piednotoj de la Vol. 3-21 –tradukanto

Banbua sono ne havas specialan funkcion, kaj flora koloro ne donas apartan forton. Banbua sono estas delikata, sed sonas sub ia motivo, floro floras ne arbitre, atendante printempon ĝi vidas sun-lumon.

Tia motivo funkcias ankaŭ sur la lernado. La ver-vekiĝo de zen-lernantoj venas de kolektiva lernado. Ĉiuj lernantoj havas kapablon ver-vekiĝi, Sed ĉar la ekzecon oni devas fari per la kolektiva forto, vi ĉiuj devas unuanime lerni kaj sinekzerci.

Gemo dekomence ne estas juvelo. Homo fariĝas sinjoro post trejniĝo. Kiu gemo dekomence havas brilon!? Kiu estas dekomence veterano!? Poluru gemon, ekzercu vin! Vi ne estu maldiligentaj pretekste, ke la kvalito estas malalta.

Malnovulo diris “Ne vane pasigu tempon.” Nun mi demandu. Ĉu la tempo haltas se vi domaĝas, aŭ ne haltas, eĉ se vi deziras? Kaj mi plu demandu. Ĉu la tempo vane pasas, aŭ homo vane pasigas la tempon? La malnovulo volas diri, ke oni sinekzercu ne vane pasigante la tempon.

Vi kune sinekzercu. Estas iom malfacile gvidi vin ĉiujn mi sola. Postenigi iun kiel ĉef-lernanton estas tradicio de budhismo. Multaj disĉiploj ver-vekiĝis sub la gvido de Budho, sed ankaŭ troviĝas ver-vekiĝintoj sub Ananda. La nova ĉef-lernanto! Vi ne hezitu sub via decemo. Lekciu al la fratuloj la anekdoton³² de la tri kinnoj da kanaba ŝtofo³³ skribita de la zenisto Dongŝan (ĉino).

Tiel ordoninte la majstro cedis la seĝon. Kaj denove komenciĝis la libera lekcio. Kaj la nova ĉef-lernanto komencis lekci. Tio ĉi estas komenco de lekcio en la viharo far de la ĉef-lernanto anstataŭ la majstro. Tiam la zenisto Eĵoŭ estis 39 jaraĝa.

Vol. 5-5 (Laiko diris “Kiu ne volas bele vesti sin!?)

Iun tagon la majstro montris: Laiko diris “Kiu ne volas bele vesti sin!? Kiu ne volas manĝi frandaĵon!? Dume voj-serĉantoj loĝas en montaro apud rivero, kaj ili eltenas malvarmon kaj malsaton. Ankaŭ ili sentas la suferojn, sed eltenante tiujn ili rektanime sinekzercas. Sciinte tion la posteuloj taksas ilin lernanta la vojon, kaj respektas ilian virtecon.”

Eĉ laikaj saĝuloj alte taksas (la obstine sinekzercantajn). Des pli, ni devas! Kion faru, se ni, la voj-irantaj, ne sekvas ilin!? Kvankam ne ĉiuj malnovaj zenistoj estis fizike sanaj. Kiam Budho vivas, ne ĉiuj disĉiploj estis bon-kvalite naskitaj. Leginte <la Vinajan Pitakon> mi trovis, ke foje troviĝis tiuj, kiuj ekpensis nekredeblajn devojiĝojn en la Budha samgo. Sed poste ankaŭ ili sinekzercis kaj atingis la vojon, fariĝis arahantoj. Se tiel okazis, ankaŭ ni povas starigi la voj-koron, ĉar ni scias, ke ni povas atingi la vojon per ekzerco, kvankam ni naskiĝis kun malbona kvalito. Eĉ la malnovuloj sinekzercis kun sufero kaj malvarmo. Ankaŭ ni devas obstine sinekzerci, eĉ se la ekzerco estas suferdona kaj severa.

³² la anekdoton; Budhisto demandis zeniston Dongŝan “Kia estas budho?” Dongŝan respondis “3 kinnoj da kanaba ŝtofo.” La budhisto respektive riverencis al Dongŝan pro io sugesta.

³³ la 3 kinnoj da kanaba ŝtofo; adekvata kvanto da ŝtofo nur por unu homa vesto. – tradukanto

Vol. 5-6 (, ke ili ne povas ver-vekiĝi)

Se la voj-lernanto diras, ke mi ne povas ver-vekiĝi, la kialo troviĝas en tio, ke li tenadas laikajn difinojn. Estas ne konate, de kiu venis la difino. Sed kiam mi diras la vorton 'koro', ordinaruloj akceptas ĝin, kiu funkcias por pensi kaj scii. Kiam mi diras, ke la koro estas herbo, ili ne kredas. Aŭdinte la vorto 'budho', ili imagas la karakterizatan figuron (de tatagato) kaj ellradiantan lumon de la statuo. Kiam mi diras, ke 'budho estas tegol-peco'³⁴, tiu frazo surprizas ilin. Tiun ĉi laikan difinon ne donas patro, nek edukas patrino, sed nur oni diras. La difinon laikoj senpripense sekvas de antaŭe.

Ĉar tiuj ĉi diraĵoj estas budhismaj teorioj, se via gvidanto diras "La koro estas herbo.", vi sciu tion vera. Kaj kiam li diras "Budho estas tegol-peco.", vi forlasu ĝisnunan laikan senton. Se tiamaniere vi (iom post iom) povas ŝanĝi la koron (=koncepton), ver-sence vi akiros la vojon.

Malnovuloj diris "Kvankam la suno kaj luno here lumas, tamen, nubo kaŝas. Kaj kvankam orkido odoras, tamen, aŭtuna vento forblovas.", En iu libro oni citis tion alegorie kiel rakonton de saĝa reĝo kaj perversa vasalo. Sed nun mi diru: Nubo kaŝus, sed ne longe, aŭtuna vento blovus, sed floros baldaŭ kun aromo.

Eĉ se la vasalo estas perversa, sed la reĝo estas daŭre saĝa, nenio malbona okazos. Ankaŭ la voj-irado estas sama. Eĉ se dumtempe malbono barus la vojon, se vi firme tenas la koron al la vojo, nubo forestingiĝos, vento ĉesiĝos.

Vol. 5-7-1 (La lernantoj-komencantoj devas legi kaj lerni)

Iun tagon la majstro montris: La lernantoj-komencantoj devas legi kaj lerni sutrojn kaj aliajn budhismajn librojn, eĉ se li havas la voj-koron aŭ ne.

Mi (Doŭgen) iam sentis malkonstantecon de la mondo pro iaj aferoj (=probable mortoj de gepatroj -tradukanto), kaj ekhavis la voj-koron. De tiam mi vagadis tien kaj ĉi tien (serĉante konvinkan instruon). Kaj fine mi foriris de la Monto Hiei. Dum la serĉado mi trovis kaj eniris en la viharon Ken'nin-ĵi. Ĉar ĝis tiam mi ne povis trovi konfidindan gvidanton, nek bonan kolegon, mi havis dubon pri budhismo.

La gvidantoj, kiuj edukis min ĝis tiam, estis altnivelaj je la scikono samkiel malnovaj eminentuloj. Kaj ili admonis min fariĝi budhisto konata kaj honora en tiu ĉi lando.

Pro tio mi esperis al mi fariĝi egale saĝa, kiel malnovaj saĝuloj kaj kiel la majstroj titolitaj al ŝastroj (=honora titolo far kortego). Sed kiam mi legis vivon de eminentaj budhistoj en grandaj landoj per 'Agoj de Eminentaj Budhistoj 1 kaj 2', kaj aliajn, mi trovis, ke ili estas malsamaj de miaj ĝisnunaj gvidintoj. Nome, mia ĝisnuna vojo estas malŝatinda kaj malamata en la sutroj kaj biografioj. Mi apenaŭ rimarkis, ke se temas pri la respekto, pli valore estas ricevi respekton de malnovaj saĝuloj kaj post-generaciaj eminentuloj, ol de nuntempaj snoboj. Se temas pri saĝeco, mi volas fariĝi

³⁴ 'budho estas tegol-peco'; Ĉi tie zenistoj estas ruzaj. Ili esprimas vidatan objekton kaj fenomenon per la vorto 'budho'. Sed laiko ne scias la formulon; budho=darmo=vidata afero. Nome, ne troviĝas darmo for de la antaŭ-okula afero. Do, ankaŭ tervermo kaj bufo estas same 'budho'. -tradukanto

kompareble alta kiel ĉinaj kaj hindaj saĝuloj, sed malkiel tiu ĉi landanoj. Mi devas honti antaŭ la ĉieluloj, budhoj kaj bodisattoj, kaj volas celi la altecon de ilia virto. Post la rimarkiĝo, al mi ŝajnas, ke nialandaj respektitaj budhistoj estus tegol-pecaj. Kaj ĝisnun akiritajn scikonojn mi forĵetis.

Mi rerigardis la vivon de Budho. Li ĉesis surtroni, kaj eniris en montaron por sinekzeri. Kaj post la ver-vekiĝo Li vivadis kiel almozulo dum la restanta vivo. En 'la Vinaja Pitako' estas skribite, ke "Mi trovis, ke la hejmo ne estas hejmo (=loko por eterna trankvilo -tradukanto). Kaj mi eliris el ĝi."

Malnovulo diris "Ne fieru sin kiel saĝulo. Ne humiliĝu kiel plebano." Ambaŭ estas orgoilaj. Ne forgesu humilecon estante en alta rango. Ne forgesu danĝeron loĝante en komforto. Ne atendu morgaŭon vivante hodiaŭ. Danĝeroj al morto troviĝas tuj apud vi.

Vol. 5-7-2 (Malsaĝulo pensas kaj diras)

Kaj la majstro montris: Malsaĝulo pensas kaj diras vanan aferon. Ekzemple, la maljuna bikuino, kiu nun laboras ĉi tie, eble hontante sian nunan taskon foje diras, ke ŝi iam laboris en la kortego. Eĉ se la aŭdantoj komprenis tion, nenio utilas. Estas tute vane.

Multaj homoj havus tian tendencon, mi pensas. De tio sciiĝas, ke ili ne havas la voj-koron. Se ili povas ŝanĝi la koron, ili povas fariĝi 'homo'.

Cetere mi havas intiman amikon, kiu razis la kapon, vestas sin per budhista vesto, sed loĝas kun familio, kaj tute ne havas voj-koron. Al li mi volas diri, ke li preĝu al budho kaj ĉielo por akiri la voj-koron. Certe li koleros, kaj ni malpaciĝos. Sed se li ne ekhavas la voj-koron, mi ne havas signifon esti amiko.

Vol. 5-8-1 ('Diru post tri re-pensoj')

La majstro montris: Proverbo 'Diru post 3 re-pensoj' signifas, ke oni ripete pensu 3 fojojn antaŭ ol diri aŭ fari. Konfuceanoj komprenis la proverbon tiel, ke oni faru aŭ diru ion, post kiam li re-pensis tion 3 fojojn kaj ĉiufoje trovis ĝin bona. Laŭ ĉinaj saĝuloj 'la 3 fojoj' indikas plurfojojn. Ili diras "Pensu antaŭ ol diri, pensu antaŭ ol fari, kaj se ĉiufoje vi trovis tion bona, apenaŭ tiam vi povas diri aŭ fari ĝin". Ankaŭ ni, budhistoj, devas imiti tion. Foje okazus, ke ni senceie diras aŭ faras eraron kaj malbonon. Ni unue pripensu dirotan aŭ farotan aferon, ĉu ĝi taŭgas al budhismo. Due, ĉu ĝi havas meriton por ni kaj la aliaj. Kaj post la pripensoj, se ĝi estas bona, ni diru aŭ faru. Se la lernanto tenados tiun kor-pretadon, li ne kontraŭos al la budha koro dum la vivo.

Iam, kiam mi komencis ekzercon en la viharo Ken'nin-ĵi, ĉiuj lernantoj decidis la koron esti singardaj kontraŭ la 3 karmoj (=fari, diri, pensi), kaj ne diri aŭ fari ion ajn kontraŭ la budha koro kaj la merito. Kaj dum restis la influo de la majstro Eisai, ĉiuj plu tenadis la koron, tamen, nun la koro jam ne troviĝas.

Nun vi devas scii. Se vi pensas, ke tiu afero estas sendube utila por la budha vojo kaj por merito al la aliaj, vi devas diri kaj fari forlasinte vin mem. Se malutila, nepre ne diru nek faru.

Kiam via antaŭulo aŭ maljuna lernanto faras aŭ diras, vi devas ne interveni. Tio estas budhisma kutimo. Nepre ne peku.

Eĉ laikoj neglektas sin, kiam ili devas plenumi nepran mision.

(Ekzemple,) iam troviĝis viro nomata Ŝangĵu (ĉino). Kvankam li devenis de plebo, sed li estis saĝa. Eltrovite de la reĝo de Ĝaŭ (Ĉinio) li fariĝis kortegano.

Kiam la reĝo de la najbara granda regno Ĉin (Ĉinio) proponis interŝanĝi al la reĝo de Ĝaŭ 15 urbojn por la regna trezoro, jad-gemo. Ŝangĵu estis ordonita kiel sendito kun la gemo. La aliaj altranguloj intrigis kaj diris "Oni decidis sendi Ŝangĵu-on kun la tiel multekosta gemo. Li estas prebano, (se ni permesis sendi lin kiel senditon,) ŝajnas ne troviĝi nobeloj en nia regno. Tio estas nia honto, certe postaj generacioj kritikos. Survoje ni rabu la gemon kaj mortigu lin." Tion oni sekrete sciigis al Ŝangĵu "Vi fordanku la mision kaj savu la vivon." Ŝangĵu respondis "Mi devas ne fordanki. Mi iru kiel la sendito de la reĝo. Se survoje mi estus mortigita de kontraŭuloj, tio estas honoro por mi, ĉar eĉ se mia korpo pereus, mia nomo restos kiel saĝulo (elektita de la reĝo). Kaj li ekiris. Aŭdinte la vortojn la kontraŭantoj diris "Ni ne povas ataki lin.", kaj ĉesis.

Ŝangĵu renkontis la reĝon de Ĉin, kaj donis la gemon. Sed ŝajnis al li, ke la reĝo ne volas liveri la urbojn. Pro tio Ŝangĵu trompe reprenis la gemon dirinte "Verdire la gemo havas difeteton. Mi montros ĝin al vi." Kaj repreninte la gemon Ŝangĵu diris "Ŝajnas al mi, ke vi domaĝas liveri la urbojn. Se vi ne volas interŝanĝi, mi rompos la gemon per la kupra pilastro kun mia kapo!" Kun indigna rigardo Ŝangĵu alproksimiĝis al la pilastro, eĉ la reĝo ne povis deteni lin.

La reĝo diris "Vi ne rompu la gemon. Mi donos al vi la urbojn. Dum ni aranĝas, viaflanke tenu la gemon." Ŝangĵu sekrete resendis la gemon al sia regno.

Iam okazis la renkontiĝo ĉe Mianĉi. Ĉar la reĝo de Ĝaŭ estas lerta je 'se' (=kord-instrumento), la reĝo de (granda regno) Ĉin fiere ordonis ĝin ludi. Kiam la reĝo de Ĝaŭ ekludis, Ŝangĵu venis kaj diris al la reĝo de Ĉin "Mi aŭdis, ke vi estas lerta je 'ŝiao' (=blov-instrumento). Nia reĝo volas aŭdi. Volu ludi." "Se vi ne ludos, mi vin mortigos." Li alproksimiĝis al la reĝo. Kaj samtempe generalo de Ĉin kun glavo alproksimiĝis. Sed kiam li trovis la indignajn okulojn de Ŝangĵu, li retiris sin ne povante eligi glavon. Tion vidinte la reĝo de Ĉin anoncis ludi la blov-instrumenton.

Poste, kiam Ŝangĵu regas la politikon kiel ministro, rivala ministro ĵaluzis kaj volis lin mortigi. Tiam Ŝangĵu foje eskapis, foje kaŝis sin de antaŭ la rivalo, kvazaŭ li timus. Lia subulo demandis "Estas facile mortigi la rivalon. Kial vi timas kaj eskapis de li?" Ŝangĵu diris "Mi ne timas lin. Kiel vi scias, mi timigis eĉ la reĝon kaj la generalon de Ĉin per la okuloj. Ne estas malfacile mortigi rivalon. Sed kolekti soldatojn kaj batali estas nur por kontraŭi malamikan regnon. Nun mi kaj li gardas la regnon kiel dukapa sistemo. Se ni konfliktus reciproke, kaj unu el ni falus, la malamika regno kun ĝojo atakos nian regnon. Mi volas gardi nian regnon kunlabore kun li. Pro tio mi ne volas konflikti enlande." Tion aŭdinte la rivala ministro hontis pri si, kaj veninte al Ŝangĵu li pardonpetis. Kaj ambaŭ ministroj kune ordigis la regnon.

Ŝangĵu tiel vivis laŭ justeco, forlasinte sin mem. La lernantoj devas lerni ankaŭ la koron de Ŝangĵu. Vi povas morti en la vojo, sed ne vivu sen la vojo.

Vol. 5-8-2 (Estas malfacile taksi ion bona aŭ malbona.)

Kaj la majstro montris: Estas malfacile taksi ion bona aŭ malbona. Laikoj alte taksas luksan veston, sed malalte la ĉifonan. Sed budhismo male taksas. Nome, ĉifona vesto estas bona kaj pura, dume la luksa vesto estas malbona kaj malpura. Tiele budhismo taksas ĉiam inverse.

Mi okaze faras versaĵojn kun ritmo, kaj verkas prozaĵojn. Tion iuj laŭdas, sed la aliaj riproĉas dirante, ke Doŭgen ŝatas tion malgraŭ elirinto. Kiu el ambaŭ opinioj estas prava?

En iu libro oni skribis “Bonfaroj estas tiuj, kiuj laŭdate enskribitaj en ‘la blanka volumo’, kaj malbonoj estas tiuj, kiuj kalumniite enskribitaj en ‘la nigra volumo’.” Kaj “Ricevi suferon (kiel rebaton) estas malbone, kaj altiri komforton (kiel rekompencon) estas bone.”

Tiel detale distingante la aferon vi devas fari nur bonfaron, kaj forlasi malbonon. Ĉar budhisto estas tiu, kiu venis el pura mondo, vi devas elekti tion, kio ne vokas homan deziremon.

Vol. 5-8-3 (Oni dirus)

Plue la majstro montris: Oni dirus “Kvankam mi havas volon lerni budhismon, tamen, nun estas la degenera periodo de budhismo, kaj homaj natur-kvalitoj estas malaltaj, ankaŭ al mi mankas kapablo, Mi ne povos elteni la tradician ekzercadon. Pro tio mi volu nur kunligi kun budhismo en la kuranta vivo, kaj esperu la vervekiĝon por la venonta vivo.”

Mi (=Doŭgen) diru. Lia diraĵo estas tute erara. Dividi budhismon en la 3 periodojn estas nur provizore. Sed la aŭtentika instruo estas alia. Se tiuj, kiuj sinekzercas, ĉiuj povas akiri la vervekiĝon (en iu ajn periodoj). Eĉ en la Budha periodo ne ĉiuj disĉiploj estis saĝaj. Inter ili troviĝis tiuj, kiuj havas nekredeblan kor-inklinon, kaj kiuj estas malbon-kvalitaj. Budho ordonis diversajn ŝilojn al disĉiploj precipe por la malbonaj aŭ malbon-kvalitaj. Ĉiuj homoj respektive havas la ŝancon vervekiĝi. Vi ne humiliĝu, pro ke mi havas malaltan kapablon. Vi povos nepre akiri la vervekiĝon, se vi sinekzercos.

Ĉar vi havas koron, vi povas distingi bonon de malbono, kaj ĉar vi havas manojn kaj piedojn, vi povas kunpolmigi kaj piediri (, por lerni budhismon tiuj estas sufiĉaj kondiĉoj,) . Vi ne bezonas heziti pri via kvariteco. Vivuloj, kiuj naskiĝis kiel homoj el la 6 fatalaj viv-medioj (=la ĉiela, homa, batala, bestia, avida, naraka), povas lerni budhismon, sed sciu, ke la ali-mediaj vivuloj (bestoj kaj birdoj --) nepre ne povas.

Vi ne atendu morgaŭon. Nur nun, por hodiaŭ vi laŭiru laŭ la budha vojo.

Vol. 5-9 (Oni diras “ la kastelo ruiniĝas”)

La majstro montris: Oni diras “Kiam flustraĵoj ekestas en tendaro, la kastelo ruiniĝas.” Kaj “Kiam malpaco regas familianojn, ili ne povas aĉeti eĉ kudrilon, sed kiam paco regas, ili povas aĉeti eĉ oron.”

Laikoj scias, ke iam pereos familio kaj kastelo, se malpaco regas ĝiajn anojn. Des pli, la lernantoj devas kolektiĝi, kvazaŭ akvo kaj lakto facile kunfandiĝas, sub unu gvidanto. Tion la antaŭuloj esprimis en la 6 akordaj principoj³⁵.

La lernantoj ne sola loĝu en aparta ĉambro por ne disigi la korpon kaj koron dis de la kolegoj, nek respektive starigi sian lerno-planon: Ili devas kune lerni, kvazaŭ ili vojaĝus en sama ŝipo. Kun sama koro kaj kun sama vivado, reciproke deadmonante de io malbona kaj alprenante la plibonan, tiel ili devas kune lerni. Tiu lerno-metodo komenciĝis ek de la tempo, en kiu Budho vivas.

Vol. 5-10 (Kiam la majstro Fanghŭej loĝas en Jangĉji-ŝan)

La majstro montris: Kiam la majstro Fanghŭej (ĉino) loĝas en Jangĉji-ŝan (Ĉinio), la tegmento de la viharo difektiĝis. Lia helpanto proponis “Ni riparu.”

La majstro respondis “Eĉ se la tegmento difektiĝis, estas plibone ol sidi sur la tero aŭ sub arbo. Vi povas trovi sekan parton por zen-sidi kaj eviti likadon de pluvo. Se la lernantoj povus ver-vekiĝi per la domo, ni devus konstrui viharon lukse. Ver-vekiĝo ne rilatas al domo, sed dependas de la zen-sidado.”

Sekvantan tagon li lekciis “Kiam mi venis ĉi tien, mi trovis, ke la tegmento kaj la muroj estis plenaj de fendetoj, kaj sur la tuta planko ŝutiĝis neĝeroj. Mi kuntiriĝis pro la malvarmo, kaj senvorte suspiris. De tio mi imagis, ke malnovulojsin- ekzercis sub arbo.”

Tia estas ne nur nia afero, sed ankaŭ en politiko. La reĝo Taj-zong de Tang (Ĉinio) ne konstruis novan palacon. (Vidu vol. 4-6 -tradukanto)

La majstro Longja (ĉino) diris “La lernanto devas unue lerni malriĉon. Lerninte malriĉon kaj estante malriĉa li povas esti intima al la vojo.”

Mi neniam vidis nek aŭdis, ke de la tempo de Budho ĝis nun la veraj budhistoj estis riĉaj je havaĵo.

Vol. 5-11 (budhisto venis kaj demandis: “La elirintoj nuntempaj ~)

Iun tagon budhisto venis kaj demandis: “La elirintoj nuntempaj preparas anticipe provizaĵon de la viv-tenado, por ke li ne suferu ermite. Kvankam la provizaĵo ne estas ĉefa celo, tamen, ĝi estas subtenaĵo de la lernado. Se io mankas, malordo ekestos. Nun mi vidas, ke vi nenion preparas, kaj diras, ke mi vivas sub la favoro de naturo. Se jes, iam malordo okazus. Kiel vi opinias?”

La majstro respondis: Tiu ĉi metodo havas precedencojn. Mi ne alprenis mian arbitran intencon, ĉar ĉiuj majstroj en la mondo same faris. Se ni laborus por vivteni, ne troviĝas limo pri havaĵo, nek la kriterio de la viv-nivelo. Mia viv-metodo estas nia tradicio kiel budhistoj, ne estas mia bontrovo. Se io malorda okazus, nur tiam mi retirus de la metodo aŭ devus elpensi ian solvon. Sed tio ne estas afero anticipe prepari.

³⁵ la 6 akordaj principoj; La lernantoj akordu kun kolegoj, nome, kune vivi (korpe, parole, kaj kore), kune lerni (ŝile, opinie) kaj kune agi (ekzerce).

Vol. 5-12 (Kvankam, ĉu tiu ĉi rakonto estas vera aŭ ne, mi ne scias.)

La majstro montris: Kvankam, ĉu tiu ĉi rakonto estas vera aŭ ne, mi ne scias. Temas pri la forpasinta kortegano Motoie (japano). Iam oni ŝtelis de li ŝatatan glavon. Sed lia subulo denunciis kolegon pri la ŝtelo. Tamen, Motoie negis "Tiu ĉi glavo ne estas mia. Vi eraras." kaj li redonis. Malgraŭ, ke ĝuste la gravo estis la ŝtelita, li redonis ĝin pripensinte la honton de la ŝtelinto-vasalo. La ĉirkaŭantoj sciis tiun fakton, sed neniu kontraŭis al lia juĝo. Pro tio liaj idoj prosperis. Eĉ laikoj, kiuj havas kompaton, tiel traktas malfacilan problemon. Des pli, budhistoj devas havi kompatan koron.

Ĉar, ni, la elirintoj, ne havas proprietaĵon, sed nia trezoro estas la saĝo kaj virto. Pro tio ni devas ne kondamni kun kolera mieno aliulon pro sen-voj-kora konduto. Ne kolerigu lin, sed deadmonu per lerta parolturno. Oni diras "Kontraŭ-morala ago daŭras ne longe." Eĉ se oni persekutas lin laŭleĝe, se li skoldas per sovaĝaj vortoj, ankaŭ tiu metodo tuj ne validas. Sovagaĵ vortoj naskas koleron en tiel nomataj et-animuloj pro honto. Dume grand-animuloj faras malsame, li ne pensas repagi, eĉ se oni lin batis. Kaj en nia lando troviĝas multaj et-animuloj. Ni devas esti singardaj.

la volumo 6-a

Vol. 6-1 (Por budhismo vi ne domaĝu vian vivon.)

Iun tagon la majstro montris: Por budhismo vi ne domaĝu vian vivon. Eĉ laikoj forĵetas sian vivon kaj forlasas parencon por praktiki lojalecon. Ilin oni nomas lojalulo aŭ saĝulo.

Iam antaŭe la unua reĝo de Han (Ĉinio) komencis militon kontraŭ la najbara regno. Tiam (malopotune) la patrino de unu el la militistoj loĝis en la najbara regno. Han-a armeo dubis lian lojalecon, ankaŭ la reĝo timis, ĉu li forkurus al la patrino, se jes, mia armeo malvenkos. (En konfuceanismo la fideleco al gepatroj superas lojalecon al reĝo.-tradukanto)

Sub tiu cirkonstanco la patrino de la militisto pensis 'Mia filo povus veni al mi. Li ne malfortigu la lojalecon pro mi. Se mi daŭre vivos, li ŝanceliĝus en la koro.' Ŝi surĵetis sin sur glavon. La militisto, dekomence lojala al la reĝo, sen ia baro en la koro povis plenumi lojalecon en sia tasko.

Kiam la lernantoj ne havas kor-ŝanceliĝon, li ja estas konvena al budhismo. Troviĝas tiuj, kiuj dekomence havas kompaton kaj saĝon, kiuj taŭgas al budhismo. Sed ankaŭ troviĝas tiuj, kiuj ne havas la kompaton kaj saĝon tamen, ili povas akiri ambaŭ, se ili lernos budhismon. Por lerni budhismon vi nur oferu vian korpon kaj koron al la maro de la tri juveloj. Sekvu nur la instruon, sed ne alprenu vian arbitran teorion.

Iam antaŭe, en la tempo de la unua reĝo de Han (Ĉinio), saĝa subulo diris "Por reordigi la politikadon oni faru, kvazaŭ malnodi ŝnuron. Ne hastu. Unue detale observu la nodon antaŭ malnodi." Budhismo estas sama. Vi unue komprenu la rezonon, kaj praktiku. Tiu, kiu bone komprenas la instruon, nepre havas la voj-koron, kaj li des pli bone komprenas la instruon. Se oni ne havas la voj-koron, kiom

ajn li estas saĝa, li ne povas fariĝi la voj-iranto, ne komprenas la veran instruon, nek povas forlasi sin, ankaŭ sian honoron kaj la profiton.

Vol. 6-2 (La voj-lernanto ne lernu budhismon por si)

La majstro montris: La voj-lernanto ne lernu budhismon por si, sed devas lerni budhismon por budhismo. Por tio li devas forlasi sian korpon kaj la koron, kaj ĉion forĵeti en la grandan maron nomatan budhismo. Post tio li devas ne juĝi ion ajn laŭ sia kriterio, nek pretendi sian opinion. Nome, li devas fari eĉ malfacile farendajn aferojn, kiujn se postulas budhismo. Kaj li devas ne fari tion, kion ne permesas budhismo, eĉ se li volantas fari tiun. Li nepre ne atendu profiton kiel rekompenco de sia ekzerco. Se li jam decidis oferi sin al budhismo, nepre ne zorgu pri si, sinekzercu laŭ la tradicio de budhismo, kaj ne aldonu sian opinion, same kiel faris ĉiuj ĝisnunaj eminentuloj. Se li ne persistas en sia deziro, li povos ĝui grandan trankvilon.

Homo, kiu kreskis nur en sia hejmo, sed ne interrilatis kun aliuloj, kaj agas laŭ sia plaĉo ignorante alies sentojn, li ne estas akceptata de socio. Ankaŭ la kor-pretado de la lernado estas sama. Se li agas kun kolegoj, submetas sin al gvidanto, ne pretendas sian opinion, kaj ŝanĝos la koron laŭ la instruo, li povas facile fariĝi la voj-iranto.

Por lerni budhismon, oni unue devas lerni malriĉon. Plie li devas ne atendi profiton, nek flati iun ajn, sed forlasi sin. Per tio li povas fariĝi bona budhisto. Ankaŭ en Song (Ĉinio) troviĝis budhistoj konataj kiel bonaj, ĉiuj estas nepre malriĉaj. Iliaj vestoj estas malbonaj, kaj la viv-tenaĵoj estas malkaraj.

Iama sekretario Daoru (ĉino) sur la Monto Tjantong-ŝan estis filo de kortegano. Sed ĉar li ne amikiĝis kun parencoj, nek deziris profiton, liaj vestoj estis tiel malnovaj kaj difektitaj. Sed ĉar lia virteco vaste koniĝas, oni postenigis lin sekretario de la granda viharo. Iam mi demandis lin "Vi estas filo de kortegano, ano de riĉa familio. Kial vi estas malriĉa kun malkaraj vivtenaĵoj?" Li respondis "Ĉar mi fariĝis budhisto."

Vol. 6-3 (Laiko diris "Riĉaĵo pereigas homon.")

Iun tagon la majstro montris: Laiko diris "Riĉaĵo damaĝas homon. Tiel okazis iam antaŭe, kaj ankoraŭ nun."

Jena rakonto troviĝas. Iu havis belan edzinon. Kaj potenculo volis al si proprigi ŝin. Sed la edzo rifuzis. La potenculo sieĝis lian domon por perforte ravi ŝin. Kiam en la fina batalo la edzo diris al ŝi "Pro vi mi pereos." Ankaŭ ŝi diris "Pro vi mi pereos." Kaj ŝi forĵetis sin de alta turo. Tiel rakontis la edzo, post kiam li apenaŭ eskapis de la batalo.

(La dua rakonto.) Kiam honestulo estas ĉefo de provinco, lia filo vojaĝe vizitis lin. Kaj kiam la filo volis reniri, la honestulo donis al li silkan rulaĵon. La filo demandis "Vi estas konata kiel honesta homo. De kie vi prenis la rulaĵon?" La patro respondis "Mi aĉetis ĝin per margeno de mia salajro." La filo donacis la rulaĵon kaj raportis tiun aferon al la reĝo. Kaj la reĝo ree konis la honestecon de la patro.

La filo diris "La patro kaŝis sian nomon, dume mi malkaŝis mian nomon. La virteco de la patro estas pli alta ol la mia." Tio, ke la patro aĉetis la donacon per sia salajro, montras, ke honesta homo ne alproprigas al si oficialan havaĵon eĉ iomete.

Eĉ laikoj estas tiaj, des pli la lernantoj ne havu fieran koron. Kaj se vi vere ŝatas la vojon, vi devas kaŝi, ke vi estas voj-iranto.

La majstro plu montris: Iam estis diulo. Oni demandis lin “Kiel vi akiris la dian kapablon?” La diulo respondis “Se vi volas fariĝi diulo, vi devas nepre ŝati la vojon al dio.” Se vi volas fariĝi majstro, vi devas ŝati la vojon al la majstro.

Vol. 6-4 (Iam estis reĝo.)

La majstro montris: Iam estis reĝo. Li diris “Mi lerte regas la regnon, mi estas saĝa.” Multaj vasaloj respondis “Jes, nia reĝo bone regas.” Sed unu el ili diris “Nia reĝo ne estas saĝa.”

La reĝo demandis “Pro kio vi diras tion?” La vasalo respondis “Kiam vi konkeris alian landon, vi donis ĝin al la filo, sed ne al la frato.” Tiu respondo ne plaĉas al la reĝo, kaj la vasalo estis eksigita.

Post tio la reĝo demandis “Ĉu mi estas virta?” vasalo respondis “Jes, nia reĝo estas tre virta.” “Pro kio vi diras tion?” La vasalo respondis “Virta reĝo havas lojalan vasalon. Kaj la lojala vasalo malkaŝe deadmonas nian reĝon. La eksigita vasalo rekte deadmonis vin. Li estis vere lojala vasalo. Se nia reĝo ne estas virta, ne povas dungi lin.” Aŭdinte tion la reĝo revokis la readmonintan vasalon.

La majstro plu montris: En la Ĉin-dinastio (Ĉinio) la princo volis vastigi la florigardenon de palaco. Vasalo diris “Tio estas bona projekto. En la vasta ĝardeno kolektiĝos multaj birdoj, kaj ili povos defendi vin de najbaraj armeoj.” Pro la deadmono la projekto ĉesiĝis.

Kiam la princo intencis farbi ŝtuparon de la palaco. Vasalo diris “Nepre farbu ĝin, kaj certe malamikoj ĉesos invadi antaŭla la ŝtuparo.” Pro tio ankaŭ ĉesiĝis farbi.

Konfuceanoj tiel traktis aferojn, nome, per lertaj vortoj ili ĉesigis malbon-farojn, kaj rekomendis bonfarojn. Ankaŭ ni, budhistoj, imitu tiujn kiel lertaj metodoj.

Vol. 6-5 (budhisto demandis: saĝulo sen la voj-koro)

Iun tagon budhisto demandis: “Kiu estas plibona el ambaŭ, ĉu saĝulo sen la voj-koro, aŭ malsaĝulo kun la voj-koro?”

La majstro montris: La voj-koro de sen-saĝaj voj-irantoj ofte regresas, sed saĝuloj sen la voj-koro fine ekhavas la voj-koron. Nuntempe tiaj ekzemploj multe troviĝas. Pro tio unue oni devas diligente lerni budhismon, sen-rilate al la voj-koro.

La majstro plu montris: En la ĉina historio troviĝis homoj malriĉaj; kiuj ne havas loĝ-domon, kiuj loĝas sur boato, kiuj kaŝe loĝas en montaro, kaj kiuj havas kabanon ĉe tombejo. Dume, troviĝis riĉuloj, kiuj fieras per bonhavaĵoj aŭ konstruas luksan loĝejon. Kvankam tiel diversaj nomoj troviĝas en historiaj libroj, tamen, mi laŭde rekomendas al posteuloj vivi malriĉe sen bonhavaĵo por ne naski malbonan karmon. Mi admonas ilin resti for de riĉaĵo.

Vol. 6-6 (La lernantoj ne ĝoju ricevinte oferaĵon)

La majstro montris: La lernantoj ne ĝoju ricevinte oferaĵon, kaj ne malakceptu ĝin. La zenisto Eisai (japano) klarigis tion “Estas kontraŭe al budha maniero, se budhisto

ĝojas ricevinte oferaĵon. Kaj ankaŭ estas kontraŭe al la koro de oferanto, se budhisto ne akceptas oferaĵon.”

La kialo estas, ke la oferaĵo estas oferita ne al budhisto, sed al la tri juveroj. Pro tio li devas respondi dirante “Tiun oferaĵon certe akceptos la tri juveroj. Mi certe transdonos ĝin la la tri juveroj.”

Vol. 6-7 (Malnovuloj diris “La forto de honora sinjoro superas)

La majstro montris: Malnovuloj diris “La forto de honora sinjoro superas tiun de bovo. Sed li ne konkuras kun bovo.”

La lernanto ne ŝatu disputon, eĉ se vi estas pli saĝa ol la alia, ne insultu lin, ne vidu lin per indignaj okuloj. Nuntempaj homoj nepre kontraŭas, se vi insultis ilin, eĉ se vi iam donacis al li bonhavaĵon kaj favoron.

Vol. 6-8 (la zenisto Zenĵing rakontis)

La majstro montris: Iam antaŭe la zenisto Zenĵing (ĉino) rakontis en sia samgo “Iam mi kune lernis kun la zenisto Ŝuefeng kiel intima amiko. Iutage li komencis diskuti kun kolego pri la instruo. Iliaj voĉoj laŭtiĝis pli kaj pli, kaj fine reciproke insultis. Poste li diris al mi ‘Vi kaj mi estas intimaj amikoj kun promeso. Kial vi ne helpis min, kiam mi diskutis kun la kolego?’. Mi povis respondi nenion kap-klininte antaŭ li.

Kiel vi scias, poste li fariĝis eminenta budhisto, ankaŭ mi nun estas ĉef-viharisto antaŭ vi. Do, nun mi diru. Tiam mi pensis, ke antaŭ ĉio estas sence eĉ diskuti pri la budha instruo. Des pli disputi estas nepre evitinde. Kaj mi plu pensis, kio rezultos per diskuto. Pro tio tiam mi restis silenta.”.

Nuntempaj lernantoj kaj ankaŭ kredantoj rekonu lian sintenon. Se vi volas sindone lerni, diligente lernu ŝparante la tempon. En kiu tempo vi povas disputi (dum sindona lernado)? Disputo estas, post ĉio, sen-merita por vi kaj la aliaj. Des pli, ne necesas disputi pri laikaj aferoj.

Kiel oni diras “La forto de honora sinjoro superas tiun de bovo. Sed li ne konkuras kun bovo.”. Eĉ se via scikono superas tiun de kontraŭanto, vi devas ne venki lin en diskuto.

Sed se troviĝas aŭtentika lernanto, kaj kiam li demandas vin pri la instruo, vi ne ŝparu instrui. Al li vi povas montri la vojon, sed apenaŭ unu fojon por tri fojoj petoj. Sed tiam ne necesas multe paroli (nek menciu sen-utilan babilon). Rimarkinte tion mi (=Doŭgen) ne plu diskutas kun la aliaj pri la instruo.

Vol. 6-9 (Multaj malnovuloj diris “Ne pasigu la tempon senfare”).)

La majstro montris: Multaj malnovuloj diris “Ne pasigu la tempon senfare.” aŭ “Ne vane preterlasu la tempon.”

La voj-lernantoj nepre ŝparu eĉ momenton. Homa vivo similas al roso, tiel la tempo rapide estingiĝas. Dum la mallonga rosa vivo vi ne rilatu al banalaj aferoj, sed nur strebu en la vojo.

Nuntempuloj pretekstas, ke li ne povas eliri el la familia rondo por esti fidela al gepatroj, por esti lojala al mastro, pro amo al familio, pro devo nutri familion kaj la

subulojn, por eviti ofendiĝon de konatoj, ne povanta aranĝi devotaĵojn pro malriĉeco aŭ pro ne-kapabla lerni budhismon. Ili kaŝas sin malantaŭ tiuj kialoj, kaj ne foriras de la mastro nek de la familio, kaj deziras bonhavaĵon kaj virinon kiel kutimon de laika socio. Tiel vane pasiginte la vivdaŭron ili pentos ĉe la sojlo de la viv-fino.

Unue oni devas sidi trankvile kaj konsideri la lastan vojaĝon, kiun li devas ekiri (=morti). Ne mastro nek gepatroj donas al li ver-vekiĝon, amo de familio ne savas vin de la sufero, kaj bonhavaĵo ne donas al li rifuĝejon de morto. Neniu kaj nenio lin savas. En kiu renaskiĝo li povos atingi la vojon, se li ne eklernas en la kuranta vivo pretekste, ke mi estas malalte kvalita? Nun vi devas forlasi ĉion, rektanime lernu la vojon, kaj ne atendu estontecon.

Vol. 6-10 (Por lerni la vojon oni nepre devas forlasi la memon.)

Iun tagon la majstro montris: Por lerni la vojon oni nepre devas forlasi la memon. Eĉ se li finlernas mil sutrojn kaj abidarmajn librojn, se li ne povas forlasi la memon, fine li enfalos en la diablan kavon.

Malnovulo diris “Sen la darma korpo kaj koro, per kio vi povas fariĝi budho aŭ majstro!? Forlasi la memon signifas ne lerni por si, sed lerni nur por la vojo.

Se vi jam fordonis sin al budhismo, vi devas sinekzeri, eĉ se tio estas suferdona kaj ne-vola, kaj klopodi laŭ la ordono de budhismo. Se vi ankoraŭ timas alies okulojn pro la almozado, vi ne povas eniri en budhismon. Forgesu alies rigardojn, sed marŝu laŭ la rezono de budhismo. Se vi pensas, ke vi ne taŭgas al budhismo pro la kvaliteco, tio ankaŭ estas via mem-obsedo. Timi alies okulojn kaj mallaŭdojn estas origino de la mem-obsedo. Vi nur lernu budhismon, ne timu socian okulon.

Vol. 6-11 (Kio estas la tradicia lerno-metodo en la viharo?)

Iun tagon mi (=Ejoŭ) demandis: Kio estas la tradicia lerno-metodo en la viharo?

La majstro montris: Tio estas rektanima zen-sidado. La lernantoj devas ĉiam zen-sidadi en kaj ekster la domo ne babilante kun la aliaj, kvazaŭ ili estus surdaj kaj mutaj, sed ĉiam sola sidadu.”

Vol. 6-12 (La zenisto Dadaŭ Guĉjŭan diris)

Iun tagon post la lekcio liber-vola la majstro montris: La zenisto Dadaŭ Guĉjŭan (ĉino) diris “Mi sidas al venteto kaj dormas sub la suno. Mia vivo superas tiun de potenculo, kiu vivas kun or-ŝtofa vesto.”

Kvankam la vortoj estas tiu de la malnovulo, mi sentas suspekton. Kion li celas per la vorto “potenculo”? Se ĝi signifas homon profito-avaran, tio estas tre mizera komparo, tute ne necesas menci. Aŭ se ĝi indikas kolegon-budhiston, kial li povas kompari ilin? (Ĉar neniu budhistoj ornamas sin per multekostaj vestoj. -tradukanto) Mi supozas, ke li ankoraŭ estas obsedita de vestoj. La ver-vekiĝintoj ne estas tiaj. Ili vidas oron samvalora kun tegol-peco, ne restas en ili obsedo. Gotamo la Budha manĝis lakto-kaĉon regalitan de vilaĝa knabino, ankaŭ hordeon por ĉevalo (Vidu Vol. 2-13 -tradukanto). Por Li ambaŭ manĝaĵoj estas same valoraj.

En la darmo ĉiuj estas egale valoraj, nur homoj dividas ĉiujn laŭ sia plaĉo. Nuntempe inter homoj troviĝas tiu, kiu ne akceptis oron pro pezeco (, malgraŭ, ke

oni donacis ĝin kiel valoraĵon), kaj okaze troviĝas tiu, kiu volonte akceptas kaj ŝatas arbo-branĉon pro malpezeco. Sciu, ke oni elprenas oron el sub la tero, kaj la branĉon sur la tero. Kioma diferenco troviĝas inter ambaŭ!? Se iu volas havi pezaĵon pro obsedo, kaj la alia malpezaĵon pro ŝato, tiam ambaŭ pekoj estas egalaj. La lernantoj estu singardaj de la pekoj.

Vol. 6-13 (Kiam mia gvidanto-zenisto Mjoŭzen planis viziti Song)

La majstro rakontis: Kiam mia gvidanto-zenisto Mjoŭzen planis viziti Song (Ĉinio), lia iama gvidanto, la aĉarjo Mjoŭjuŭ sur la Monto Hiei-zan morte malsaniĝis.

La aĉarjo diris “Mi jam estas maljuna kaj pro la grava malsano alfrontas al la morto. Ĉu vi ne bonvolus flegi min, kaj forokuli min al la transa mondo? Prokrastigu la viziton. Kaj post mia morto vi povos plenumi vian esperon.”

La zenisto Mjoŭzen kunvenigis la kolegojn kaj disĉiplojn. En la kunveno li parolis “Mi eliris el la hejmo, kiam mi estis knabeto. De tiam mi kreskis sub la protekto de la aĉarjo ĝis nun. Kiel vi scias, la kreskigo de infano estas plej granda en la homaj favoroj. Kaj, ke mi oficiale fariĝis budhismo, lernadis la sutrojn kaj la teorion de budhismo, ankoraŭ pli, ke mi povis ricevi honoron okupi la unuan lokon inter kolegoj, kaj ekhavis intencon viziti Song, ĉiuj ĉi tiuj estas rezulto nur de lia favoro. Sed nun li grave malsaniĝis. Neniu scias lian restantan viv-longon. Probable pro lia maljuneco mi ne povos denove renkonti lin post la Song-vizito. Pro tiu kialo li volas deteni min. Estas malfacile ne obei al lia deziro. Dume la kialo viziti Song, eĉ riskante la vivon, estas por la kompato kaj merito al ĉiuj vivuloj, kiel esti la voj-iranto. Nun mi demandas vin, kiel vi opinias pri mia vizito al Song spite al la deziro de la aĉarjo. Volu respektive montri al mi viajn opiniojn.”

Tiam preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj diris “Vi ne vizitu Song ĉijare. La aĉarjo estas maljuna kaj malsana. Oni timas lian baldaŭan forpason. Estas pli bone, ke vi detenos vin ĉijare, sed en la venonta jaro vi vizitu Song, ĉar tio ne spitas al lia deziro, sed estas la okazo rekompenci al lia granda favoro. Nenia malhelpo troviĝus, eĉ se vi prokrastas la viziton je unu aŭ duon-jaro. Tio ne kontraŭas al natura rilato inter gvidanto kaj disĉiplo. Kaj poste vi povas realigi vian esperon.”

Mi mem respondis en la lasta sid-loko “Se vi pensas, ke vi jam certgrade lernis budhismon, vi ne bezonas viziti Song, mi pensas.”

La zenisto Mjoŭzen respondis “Jes, vi pravas. Mi pensas, ke iagrade mi akiris, kio estas la voj-irado. Se la vojo tiel daŭras, mi ne bezonus viziti Song.”

Mi diris “Se vi pensas tiel, vi nun restu ĉi tie.”

Post kiam la diskuto ĉesis, la zenisto Mjoŭzen diris “Ĉiuj opinioj montras, ke mi restu ĉi tie, sed mia opinio estas alia. Eĉ se mi restus nun kaj flegos lin, per tio la vivo de la aĉarjo ne longiĝos, lia doloro ne haltos. Kaj eĉ se mi forokurus lin en la lasta ceremonio, lia metempsikozo ne haltos. Kaj kiel gvidanto, lia ĝojo estas nur, ke disĉiplo obeas al la deziro de gvidanto. Tia konduto estas tute senutila por la elkateniĝo kaj por atingi la vojon. Precipe por la aĉarjo tio fariĝus peko, en kiu li malhelpas la disĉiplon viziti Song por serĉi la vojon. Male, se mi povas viziti Song kaj akiri eĉ pecon de ver-vekiĝo, malgraŭ, ke mi malobeis al erara sento de unu homo, sed al multaj homoj mi povus disdoni motivon al la vojo. Se mi povus akiri plimulte

da virto, ankaŭ tio estas rekompenco al la favoro de la aĉarĵo, mia gvidanto. Kaj okaze mi mortus survoje al Song, tio ne gravas (, ĉar mi havas fortan deziron al budhismo, en la venonta vivo mi certe povos finligni budhismon. – tiel aldonis interpretanto pro manko de kelkaj frazoj de originalo -tradukanto).

Rememoru la grandan vojaĝon de la tri-pitaka budhisto Ŝuangang (ĉino) al Hindio. (Li sen-permese eliris el Ĉinio ŝparante tempon -tradukanto) Certe budha volo ne estas vane pasigi la tempon pro unu homo. Post ĉio, mi rezolute decidis viziti Song.” Tiel dirinte li vizitis Song (kun mi).

Por la zenisto Mjoŭzen tia estis ĝusta voj-irado. Do, ankaŭ nuntempaj lernantoj ne perdu la tempon pro vanaj aferoj eĉ de gepatroj aŭ de gvidantoj. Ne vane pasigu la tempon preterlasinte la gravan voj-iradon.

Tiam mi (=Ejoŭ) demandis: Mi komprenis, ke ni devas forlasi la laikan favoron de la gepatroj kaj de la gvidantoj por aŭtentika voj-irado. Sed eĉ se ni devas forlasi la favoron, tamen, kiam ni praktikas bodisattan bonfaron, ni devas unue elekti alies meriton ol la nian, ĉu jes? Ekzemple, kiam ie estas homo³⁶ maljuna kaj malsana sen fleganto krom mi sola, sed se mi ne flegas tiun pro mia ekzercado, ĉu mi estas kontraŭa al bodisatta koro (servi al aliaj)? Budhisto devas ne malŝati bonfaron al la aliaj homoj. Se tiu rezonado estas prava, okaze de la ekzemplo, mi devus flegi la maljunulon. Kiel vi opinias?

La majstro montris: Kiam vi volas praktiki bonfaron por la merito de vi mem aŭ por la alia, kiel budhisto vi devas elekti plibonon faron el ambaŭ. Flegi maljunulon malsanan estas nur portempa iluzia amo. Eĉ se tio spitas al laika sento, sed daŭrigi ekzercon kondukos vin al la ver-vekiĝo. Tion vi devas kompreni, tion vi devas kompreni.

Vol. 6-14 (Laiko diris)

Iun tagon la majstro montris: Laiko diris “Mi ricevis la lecionon de budhisto, sed ĝi estis alia al mia koncepto.”

Mi (=Doŭgen) pensas, ke li eraras. Mi supozu la kialon; Li devus memligni la tekston de budhismo, kaj la leciono estus alia al lia koncepto ĝisnuna. Se jes, kial li ne demandas la budhiston? Aŭ ĉu li pensis nur en laika sento? Se jes, lia sento estas erara, kiu daŭras ekde la homa historio.

Por lerni budhismon, eĉ se kontraŭa al sia koro, oni devas unue forlasi sian opinion, kaj portempe sekvi la vortojn de budhistoj kaj sutroj. Kaj laŭ la gvido li devas ŝanĝi sian opinion. Tio estas ĉefa kor-pretado por lerni budhismon.

Kiam mi estis juna, troviĝis kolego, kiu insistis pri sia opinio. Li ne akceptis instruon, kiu ne konvenas al sia opinio, kaj li lernis nur laŭ sia volo. Li tiel vane pasigis la vivdaŭron ne povinte renkonti la veran budhismon. Tion vidinte mi rimarkis, ke lia sinteno estas malprava. Kaj mi decidis sekvi la vortojn de la gvidanto, kaj apenaŭ komprenis la ekzercon pens-manieron. Post tio mi trovis jenan frazon en

³⁶ ie estas homo; Sama temo troviĝas en la vol. 4-10, kaj la homo estas maljuna patrino de Ejoŭ mem

sutro "Se vi volas lerni budhismon, ne tenadu vian scikonon pasintecan.". Mi eksciis, ke ne tenadu malnovan scion, sed sekvu novan montron unu post alia.

En libro troviĝas "La orelo kontraŭas al bona deadmono." (konfuceanismo). Deadmono estas malŝatata, sed se vi perforte subigas vin al ĝi, certe vi akiros meriton.

Vol. 6-15 (En la homa koro dekomence ne troviĝas bono kaj malbono)

Iun tagon post babilado la majstro montris: En la homa koro dekomence ne troviĝas bono kaj malbono anticipe decidita. Ambaŭ ekestas pro la motivo. Ekzemple, kiam la lernanto komencis sinekzeri en monto, li pensas, ke monto estas bona loko, sed urbo estas maltaŭga. Tamen, kiam li deprimiĝis en la monto, li opinias ĝin malbona. Nome tio signifas, ke la koro ne havas konstantecon, sed laŭ motivo ŝanĝiĝas. La koro fariĝas bona pro la bona motivo, kaj malbona pro la malbona. Do, ne necesas pensi, ke mia koro estas origine malbona. Vi nur sekvu bonan motivon.

La majstro daŭre montris: Kaj mi (=Doŭgen) pensas, ke la homa koro ŝanĝiĝas ankaŭ de vortoj de aliuloj.

Jena anekdoto troviĝas en la libro 'La Ekzegezo de Maha-praĵna Paramito'.

Iam, kiam snobo paŝe iras kun mani-juvelo en la mano. Tion vidinte iu kritikis "He! Vi estas aĉa, ĉar vi mem portas aĵon en la mano." (Tiam kutimo; Altrangulo ne paŝas portante aĵon en sia mano, sed subula. -tradukanto) La juvel-portanto ne volas domaĝi la juvelon, (samtempe) volis ne perdi sian renomon. Post ĉagreno li elektis la renomon. Li postlasis la juvelon intencante, ke poste lia servisto reprenu. Sed la juvelo perdiĝis (ŝtelite).

Homoj tiel agas. Eĉ se li volis fari laŭ sia bontrovo, li finfine alprenas alies opinion. Pro tio eĉ se oni havis origine malbonan koron, se li submetas sin sub eminentulo, aŭ se li observas la bonajn vortojn de saĝuloj, lia koro iom post iom fariĝas bona. Male, kiam li alproksimiĝas al malbonulo, eĉ se li tiam sentis ion malbona, se longtempe li sekvas la malbonulon, baldaŭ ankaŭ li mem fariĝas aŭtentika malbonulo.

Aliokaze, eĉ se oni nepre ne volas doni ion al iu, sed se tiu postulema obstine petis, finfine la postulato donas ĝin al li, kvankam la postulato sentas lin malaminda en la koro. Male, eĉ se oni volas donaci ion al iu, sed se li perdis la ŝancon kaj pasis tempo, baldaŭ li ĉesas donaci.

Ĉar la homoj estas tiaj, kiam la lernanto ne havas la voj-koron, li devas alproksimiĝi al eminentulo, kaj fari ŝancon ripete aŭskulti kaj rigardi saman lernindan aferon. Li ne pensu 'Ĉar mi jam scias tion, jam ne bezonas nun aŭskulti.'

Ankaŭ por tiu, kiu jam starigis la voj-koron, estas ŝanco rafini sin ĉiufoje aŭdinte saman instruon. Tiu, kiu ankoraŭ ne starigis la voj-koron, unu-du-foje preter- aŭdus la vortojn de eminentulo, sed plurfoje aŭdinte li hontos pro sia sen-voj-koro, kaj spontane starigos la veran voj-koron, kvazaŭ oni sen-rimarke malsekiĝas, kiam li iras sur nebula vojo.

Ĉar tiel okazas, vi ripete legu la sutrojn, eĉ se vi jam scias tiujn. Ripete kaj ripete aŭdu la vortojn de gvidantoj. Kaj vi akiros pliprofundan komprenon.

Se troviĝas io malhelpa al la vojo, de antaŭe vi ne alproksimiĝu al ĝi. Male, al homo konfidinda vi devas alproksimiĝi por la lernado, eĉ se vi sentas vin suferi kaj malfacila.

Vol. 6-16 (Iun tagon la zenisto Dahui)

La majstro montris: Iun tagon la zenisto Dahui (ĉino, 1089~1162) malsaniĝis je absceso ĉe la postaĵo.

Konsultita kuracisto anoncis "Tio estas grava."

La zenisto demandis "Ĉu ĝi estas mortiga?"

La kuracisto "Estas tre danĝere."

La zenisto "Se jes, des pli mi devas zen-sidi." Tiel dirinte li perforte sidadis. La absceso ŝvelis kaj rompiĝis, sed nenio atenca okazis.

La kor-pretado de la antaŭulo estis tia. La malsaniĝo akcelis lian zen-sidadon. Des pli nuntempaj lernantoj sen-malsanaj devas ne esti maldiligentaj je zen-sidado.

Malsano ŝanĝiĝas laŭ la koro, mi pensas. Ekzemple, oni mensogas aŭ skoldas al singltanto, tiam tiu kun surprizo serĉante vortojn por pardonpeti forgesos la singleton. Ankaŭ mi (=Doŭgen) malsaniĝis je lakso sur la ŝipo al Song, sed sub tumulto pro ventego mi forgesis la malsanon, kaj senrimarke resaniĝis.

Per tio mi pensis, kiam ni diligente lernadas aŭ okupiĝas de io forgesinte aliajn aferojn, malsano ne proksimiĝas.

Vol. 6-17 (En laikaj proverboj troviĝas)

La majstro montris: En laikaj proverboj troviĝas "Oni ne povas estadi kiel dom-mastro, se li ne povas fariĝi surda kaj muta." Tio signifas, ke li ne aŭdu kalumnion, ne riproĉu aliulon. Nur tiam li povas plenumi sian okupon. Nur tiam homon oni nomas 'sinjoro'. Kvankam tiu proverbo estas por laikoj, ni alprenu ĝin kiel nian aferon. Kiel ni povas voji-iri sen riproĉo kaj plendo de aliuloj? Obstinaj lernantoj nepre havu tiun neflekseblan spiriton. Nur ili povas laŭiri laŭ la vojo.

Vol. 6-18 (La zenisto Dahui diris)

La majstro montris: La zenisto Dahui (ĉino) diris "Imagu vin esti persekutata protre granda ŝuldo, dume vi tute ne havas monon. Se vi povas imagi tian okazon, akiri ver-vekiĝon estas facile."³⁷

La tria sukcedanto Ĝjanĝi (ĉino, --~606) skribis la admonon en sia verko Ŝinŝin-ming "Atingi la vojon ne estas malfacile, se vi povas neniigi la diferencigan senton (distingi bonon kaj malbonon). Se la lernanto povas forlasi la diferencigan senton, senprokraste li povas kompreni la veron (=la vojon). Por tio vi bezonas forlasi la memon. Vi ne lernu budhismon por vi, sed nur por budhismo. Eĉ se vi legus milojn da sutroj kaj abidarmoj, kaj zen-sidadus ĝis la sidloko difektiĝus, se vi ne povas senigi la koron (lerni por vi mem), vi ne povos finlerni la budhan vojon. Entute, se vi

³⁷ Estimataj legantoj! Kiel vi komprenis ĉi alineon? Sen pag-povo ordinare oni farus eskapi, sinmortigi aŭ komisi sin al kreditoro. Sed tiuj ne kondukos lin al ver-vekiĝo. Kiel legi la tradukanto ne scias.

povas forĵeti vian koron kaj korpon en budhismon, sekvi la instruon de gvidanto, kaj forlasi koncepton ĝisnunan, vi povas tuj kompreni la veron.

Vol. 6-19 (En la libro Lu-ĉunkiŭ troviĝas)

La majstro montris: En la libro Lu-ĉunkiŭ (=el la ĉina historio) troviĝas la vortoj “Ŝtono estas malmola. Eĉ se oni rompis ĝin, li ne povas rabi de ĝi malmolecon. Cinabro estas ruĝa. Eĉ se oni dispecigis ĝin, li ne povas rabi de ĝi ruĝecon.”

Iu budhisto demandis al la zenisto Ŝuanŝa (ĉino, 835~908) “Kia estas fortikeco de la darma korpo?” La zenisto respondis “(Pro la kroma efiko de medikamento) nun pusu gutadas el de mia korpo (, kiu devas esti fortika korpo de darmo).” Probable ambaŭ havus saman signifon.³⁸

Vol. 6-20 (Malnovulo diris “komisianta ĝin al oficistoj, kiuj konas mastrumadon)

La majstro montris: Malnovulo diris “(Lernantoj ne bezonas sci pri la vihara administrado) komisianta ĝin al oficistoj, kiuj konas mastrumadon.” Tio signifas, ke la lernantoj rektanime nur sinekzercu per zen-sido, ne koncernante al vihara ofico.

Kaj “Estas plibone scipova eĉ simplan arton, ol havanta grandan riz-kampon rikolto-donan.”

“Kiam oni donas favoron (al aliaj), ne atendu repagon. Kaj ne pentu pri la doninta favoro.”

“Se vi regas la buŝon kvazaŭ la nazon, neniam damaĝo vin atakos.”

“Tiu, kiu hardas sin per ekzercado, estas spontane respektata. Tiu, kiu estas talenta, iam malvenkos de nova talentulo.”

“Profunde fosis, malprofunde semis, sed foje plago atakas.”

“Kiam oni profitas al si, kaj donas malprofiton al la alia, kial li povas eviti malbonan rekompencon (de la ĉielo)!?”

Lernantoj proksimigu la okulojn, kiam vi legas zen-demandojn (por pliprofunde kompreni).“

Vol. 6-21 (Malnovulo diris “Antaŭen unu paŝon de sur la stango”)

La majstro montris: Malnovulo diris “Antaŭen unu paŝon de sur la stango je cent ŝakvoj (=30 m.) alta.” Tio estas parabolo de la kor-pretado por la lernantoj, nome, ili kvazaŭ forlasu sin en la aeron el de la stango. Por klarigi tion troviĝas kelkaj menciindaj.

Lastatempe iuj diras, ke mi eliris el la familia rondo. Sed kompare kun la zenista tradicio, ili ne estas veraj elilinoj. Tiel nomata ‘elirinto’ unue devas forlasi memon, honoron kaj profiton. Se li ne povas forlasi tiujn, eĉ se li strebas sinekzerci, kvazaŭ li forbalaus fajron de sur la kapo, aŭ fortranĉus sian brakon kaj kruron, tio nur estas

³⁸ La unua kaj dua paragrafoj aspektas malsamaj. Ĉu ambaŭ havas saman signifon? - tradukanto.

Interpretisto supozas, ke eble posteulo aldonas la la lastan frazon (=Probable ambaŭ havas saman signifon). -piednoto

Sed direblas, ke malsano ne povas rabi de li ver-vekiĝon. -tradukanto

sensenca sufero, ne estas (vera) 'eliro'. Eĉ en Song (Ĉinio) troviĝas tiuj, kiuj ne povas atingi la vojon, nek koni sian koron, kaj sen-rezulte pasigas la tutan vivon, malgraŭ, ke li foriris de amata familio malfacile forigebla, forlasis havaĵon malfacile forlaseblan, kaj eniris en zen-viharon, kaj longe sinekzercis, ĉar ili eraris je la korektado.

Nome, kiam iu ekhavis la voj-koron, fariĝis lernanto, kaj sekvis antaŭulon, sed baldaŭ li forgesis la celon fariĝi la voj-iranto. Li volas koniĝi kiel nobla budhisto, kaj ankaŭ koniĝi, kiel membro de altranga viharo. Li diskonigis tiujn al liaj kredantoj kaj ofer-donantoj, parencoj kaj konatoj. Kaj iel ajn rimede li volas esti rigardata kiel honora budhisto, kaj esti varme akceptata. Aldone, li lerte konigas, ke li sola estas bonulo, kaj havas la voj-koron, malgraŭ ĉirkaŭaj kolegoj estas maldiligentaj kaj sentaŭgaj. Tia li ne valoras eĉ por kritiki, egalas al la iamaj kvin bikuoj-afektuloj (=legendo). Jam estas decidite, ke li devos enfali en narakon. Sed ofte troviĝas laikoj, kiuj akceptas tian sentaŭgulon kiel la voj-iranton kaj noblan homon.

Iom plibona estas lernanto, kiu ne flatas al kredantoj, eliris el la familia rondo, kaj lernas en viharo. Sed ĉar li estas origine maldiligenta, laŭŝance ripozas, kiam vihar-estro aŭ antaŭuloj ne vidas. Eble li hontus en si pro la maldiligentemo, li ŝajnigas sin diligente lernanta antaŭ la okuloj de gvidantoj. Tia sinteno estus iom pli bona ol laiko (ĉar li eliris el familia rondo), sed lia koro ankoraŭ estas obsedata de sia egoo, honoro kaj profito.

Kaj ankaŭ troviĝas lernanto, kiu neglektas la zorgon de gvidantoj, kaj estas indiferenta kontraŭ la rigardo de kolegoj. Li ĉiam pensas, ke la lernado ne estas por la aliaj, sed por si mem, kaj serioze klopodas por fariĝi budho. Ŝajnas, ke tiu lernanto estas pli bona ol la 3 antaŭaj, kvazaŭ aŭtentika voj-iranto. Sed ankaŭ li volas plibonigi nur sin, kaj pro tio li ankoraŭ ne foriras de si mem. Kaj ĉar li celas ĝojigi budhojn, atingi la bodion, li ankoraŭ ne povas forlasi honoron kaj profiton.

La menciitaj ekzemploj montras, ke ili ankoraŭ ne lasas sin de sur la alta stango, sed firme alkroĉiĝas.

La aŭtentikaj lernantoj forĵetas sin en budhismon, kaj sinekzercas neatendante eĉ la ver-vekiĝon. Ilin ni nomas sen-kleŝa voj-iranto. 'Ne haltu ĉe budho, rapide forkuru de tie, kie ne troviĝas budho.' Tiu flazo (de la zenisto Ĝaŭĝoŭ (ĉino)) signifas tian voj-iradon. Ankaŭ vi estu tiaj.

Vol. 6-22 (Vi anticipe ne rezervu vestojn kaj manĝaĵojn)

La majstro montris: Vi anticipe ne rezervu vestojn kaj manĝaĵojn. Kiam manĝaĵo mankas al vi, vi devas komenci almozpeton de ĉirkaŭe. Sed se vi anticipe promesis kun certa homo viziti por manĝaĵo, ankaŭ tio estas rezervo, malpermesita manĝaĵo. Ĉar zen-lernanto ne havas certan loĝejon kiel nubo, nek alvenotan bordon kiel akvo-fluo, oni nomas lin bikuo (=ekzercanto). Eĉ se li ne havas nepermesitajn aĵojn, se li havas certan subtenon de iu kredanto aŭ parenco, tio apartenas al la kateno (=unu el kleŝoj) por ambaŭ, kiel donanto kaj donato. Ankaŭ tiu rilato ne estas permesita.

Se li volas ver-vekiĝi per la korpo nutrita de tia malpermesita manĝaĵo, eĉ se li forte deziras koni kaj ver-vekiĝi je la pura darmo, ne povos sukcesi iel ajn metode. Same kiel tinkturita ŝtofo per indigo estas blua, kaj per felodendrono estas flava,

nutrita per malpermesita manĝaĵo estas ne-permesita korpo. Se vi alfrontas al budhismo per tia korpo, tio similas al, ke vi volas preni oleon premante sablon. Entute ni devas decidi kiel fari laŭokaze en la kadro de budhisma pensmaniero. Anticipe rezervi ne estas nia rimedo. Tion vi devas profunde kompreni.

Vol. 6-23 (La lernantoj devas scii, ke ĉiuj havas sian difekton.)

La majstro montris: La lernantoj devas scii, ke ĉiuj havas sian difekton. (En ili) la unua difekto estas orgojlo. Ne nur budhismo sed ankaŭ aliaj libroj tion rimarkigas. Konfuceanismo diras “Troviĝas tiu, kiu ne flatas malgraŭ malriĉa. Sed ne troviĝas tiu, kiu ne estas orgojla estante riĉa.” Tiel deadmone oni regas sian orgojlon. Tiu ĉi estas grava deadmono, vi devas sincere observi.

Troviĝas tiu, kiu estas sen-talenta kaj sen-kapabla kompare kun la aliaj, sed pensas sin supera. Tio estas orgojlo. Tamen, tiuokaze ne estas malfacile deadmoni lin. Sed, okaze troviĝas tiu, kiu estas riĉa, potenca, ĉirkaŭata de amikoj, kaj oni ne kalumnias lin. Kaj tion vidante najbaraj malriĉuloj flatas. Do, kiel kondukti la riĉulo por ne sentigi malsuperecon al najbaroj. Kvankam li ne volas fieri pri si, sed lia ordinara konduto naskas al la najbaro enviemon. Tiaj zorgoj estas ĉiam gravaj. Kaj kiam li zorgeme kondukas, oni diras pri li sen-orgojla. Male, kiam lia konduto kaŭzas antipation de malriĉuloj, oni nomas lin orgojla pro riĉeco,.

Malnovulo (=konfuceano) diris “Ne preteriru antaŭ malriĉuloj per luksa ĉaro.” Nome, ne paradu antaŭ malriĉuloj per riĉaĵoj. Eĉ ekster-budhisma instruo tiel instruas, ankaŭ ni devas imiti.

Sed la lernantoj kaj budhistoj nuntempaj pensas, ke la scikono estas plej grava. Ili ne fieriĉu per tio. Riproĉi miskomprenojn de subuloj, kolegoj kaj antaŭuloj estas terure orgojle.

Malnovuloj diris, “Eĉ se vi malvenkus ĉe saĝulo, ne venku antaŭ la malsaĝaj.”

Okaze troviĝas io, kion vi bone scias, sed ne-bone scias la aliaj, tiam se vi riproĉus la aliajn, tio mem estas via peko. Kiam temas pri la instruo, vi ne menciui erarojn de antaŭuloj. Kaj kiam vi parolas antaŭ laŭokaze kaj komencantoj, vi estu atentema por, ke ili ne sentu malsuperecon.

Kiam mi loĝis en la viharo Ken'nin-ĵi, multaj lernantoj demandis min pri la instruo. En la demandoj foje troviĝis miskomprenoj kaj ali-direktaj kritikoj, sed ĉar mi jam konis ilian kor-inklinon, mi nur respondis pri la merito kaj virto de la instruo, kaj ne menciis eraron aŭ devion de la demandoj. Pro tio neniam malordo okazis. Malsaĝa kaj obstina homo koleras, kiam li aŭdis kritikon de sia gvidanto kaj antaŭuloj. Dume, saĝa kaj sincera homo, se li povis kompreni la veran signifon de la instruo, ŝanĝas sian scikonon al la vera instruo, eĉ sen viaj klarigoj, rimarkinte erarojn de si kaj la antaŭuloj. Tiajn kondiĉojn vi devas bone memori.

Vol. 6-24 (En la lernado la plej grava estas zen-sido.)

La majstro montris: El la lernado la plej grava estas zen-sido. La kialo, ke multaj Song-anoj (=ĉinoj) povis akiri la vojon, estas nur la forto de zen-sido. Eĉ se oni estas analfabetaj aŭ malsaĝaj, se ili rektanime zen-sidas, plimulte da ili povas ver-vekiĝi, ol tiuj, kiuj longe lernadis kaj estas erudiciaj. Pro tio, vi nur strebu en zen-sidado, ne

rilatu kun aliaj aferoj. La budha metodo estas nur la zen-sido. Ne sekvu aliajn metodojn.

Mi (=Eĵoŭ) demandis: Kiam mi komparas zen-sidi kaj legi librojn, mi pensas, ke en la legado, kvankam tre malmulte, mi povus akiri ion pri la vojo, sed en la sidado nenio venas al mi. Ĉu mi tamen devas preferi zen-sidon, kiel vi opinias?

La majstro montris; Eĉ se vi povis akiri ion per la legado, tio fariĝas kaŭzo malproksimiĝi de la budha koro. Se vi kviete sidados tute ne pensante la meriton nek ver-vekiĝon, tio ja estas ĝuste budha metodo! Ankaŭ malnovuloj lernis de la legado kaj sidado, sed la unua estis la sidado. Certe troviĝis tiuj, kiuj ver-vekiĝis per la legado, sed ankaŭ ili ver-vekiĝis sur la bazo de zen-sido.

Ĝuste la kaŭzo de la sukceso estas zen-sido.